KRISTÁLY Tibor

ELEKTROFAKA KLARIGA TERMINARO

EN

ESPERANTO

Antaŭparolo

Dum la kompilado de ĉi tiu klariga terminaro mi klopodis uzi tiujn esprimojn, kiuj estas jam „disvaste” uzataj en la elektronika fako. Foje tamen mi alskribis ankaŭ alian terminon proponatan por la pli klara kompreno laŭ la faka senco, eĉ ankaŭ por fakuloj, (kontinua kurento – rekta kurento – *unudirekta* kurento), aŭ aldonis pluan klarigon laŭ ebla alia senco (rekta kurento). La klarigoj ne ĉiam egalas kun tiu de la Plena Ilustrita Vortaro, ĉar ties klarigoj ne nepre rilatas speciale al la elektroniko. Ekz., la vorto „amplitudo” povas esprimi ankaŭ mekanikan alternancon.

Ankaŭ en la naciaj lingvoj ekzistas *fakĵargonoj*, AKRONIMOJ, por ŝpari la tempon ĉefe en la parolado, kiam oni volas esprimi iun fakspecialaĵon. Tiel ankaŭ en Esperanto oni havas rajton uzi tiajn esprimojn. La alternativaj esprimoj jam estas konataj kaj uzataj en la fakliteraturo, aŭ parte estas proponataj, kiujn fakaj kompetentuloj nepre devas plu pridiskuti.

Nro	Titolvorto	Priskribo	Alia esprimo, *fakĵargono*
		A	
1.	**A-tipa amplif(ik)atoro**	Amplifatoro, kies elira signalo kopias la formon de la enira signalo. La kurento fluas dum la tuta periodo. Ĉi tiu bazkonekto estas uzata plejofte por amplifiloj sonfrekvencaj. Ĝia rendimento estas malgranda.	
2.	**AB-tipa amplif(ik)atoro**	Amplifatoro, kies elira kurento fluas dum pli ol duona tempo de periodo, tial la formofiereco ne estas preciza. Ĝi ne ŝarĝas la antaŭan blokon (ŝtupon) kaj ties rendimento estas malgranda.	
3.	**absorba ondomezurilo**	Ilo por mezuri la radiofrekvencojn, kiu mezurilo konsistas el bobeno kaj kondensilo, havanta kuplon lozan kun la mezurenda oscikvito.	
4.	**absorbo**	Estas tiu fizika fenomeno, kiam la energio (en elektro ekz., la kurento) transformiĝas al alia energio. Ekzemple la radioj, en la jonosfero parte, kliniĝas (speguliĝas), parte *absorbiĝas* kaj transformiĝas al varmo.	
5.	**adapta ŝtupo**	Kuplocirkvito. Ekz., ĝi adaptas la impedancon inter du cirkvitoj.	
6.	**adapta peco**	Peco por konekti antenon al la antenokablo.	
7.	**adapta transformilo**	Alĝustigas la impedancon al la eniro aŭ eliro de cirkvito.	baluno
8.	**adaptilo**	Konsistero, kiu helpas la kuplon unu al la alia de du cirkvitaj ŝtupoj, kies proprecoj teknikaj diferencas.	
9.	**adaptoro**	Help-aparato por kupli du diverssistemajn aparatojn.	
10.	**adicia cirkvito**	Cirkvito diĝita, kiu adicias la duumajn (binarajn) datenojn, plejofte jam preparita en unu kompleksa kapsulo.	adiciilo, sumigilo
11.	**adicitoro**	Cirkvito per operacia amplifatoro, kiu adicias tiujn tensiojn, kiuj estas konektitaj al ties enirejoj. La elira tensio de la cirkvito *adicitoro*, lineare proporcias kun la algebra sumo de tiuj tensioj, kiuj estas ĉe la (ajn-nombraj) enirejoj.	
12.	**admitanco**	Involucia valoro de la alternkurenta impedanco. Ĝia grandeco egalas kun la kvociento de la kurentointenso trafluanta cirkviton, per la interklema tensio, ties simbolo estas la Y. Y=G+jB. [Simenso]	

13.	**aerbreĉo**	Aerspaco, kiu estas trovebla en ferkerno por malgrandigi la induktan valoron aŭ la kuplon inter du bobenoj.	aero-fendo
14.	**aerkerno**	Kerno de induktilo sen fero. Bobeno ne havas ferkernon.	
15.	**agordi**	Agado, per kiu oni variigas la valoron de konsistero, determinanta la funkcoreĝimon.	akomodi
16.	**agordbobeno**	Bobeno, kies indukton variige oni povas ŝanĝi la resonan frekvencon de la oscila cirkvito (*oscikvito*).	
17.	**agordilo**	(PV: Ilo por agordi instrumenton.)	
18.	**agordindika lampo**	Speciala elektronika tubo, kiu eluzas tiun proprecon de la elektronradio, ke tuŝante, alpuŝiĝe kelkajn materiojn, tiuj eligas lumon.	
19.	**akcela anodo**	Elektrodo en elektronika tubo, kiu akcelas la movon de la flugantaj elektronoj.	
20.	**akcela relajso**	Relajso, kiu popaŝe altigas la bornotension de elektra motoro (ekz., en lokomotivo).	
21.	**akcelita kontaktilo**	Speciala kontaktilo, kies mekanika konstrukto certigas pli fruan ŝalton de cirkvito, ol tiuj de la normalaj kontaktiloj.	
22.	**akceptoro**	Fremda atomo enigita en duon-konduktanton. Tiu atomo havas malpli valenton je unu, ol tiu de la duon-konduktanto, pro tio ĝi povas **akcepti** la alvenantajn elektronojn, tiel havas gravan rolon por la kreado de kondukto.	Vidu ankaŭ ĉe la sordido!
23.	**akomodi**	Kiam oni serĉas radioelsendon en la radioaparato, tiu *akomodas* (alĝustigas) la ricevilon al la port-frekvenco de sendatoro. La homoj simile agadas, kiam serĉas televidilan dissendon. Teknike oni agordas oscikviton, variige aŭ la kapaciton, aŭ la indukton.	
24.	**akordumilo**	Cirkvito aŭ kompleta teknikaĵo por alĝustigi, la malnov-sistemajn radio- kaj TV-aparatojn al la novsistema tekniko.	alĝustigilo
25.	**akordumo**	Eco de iu nova sendosistemo en la radio kaj TV-tekniko, kiu ebligas la ricevadon de la nova, pli evoluinta tekniko per la malnov-sistema aparato, memkompreneble per la parametroj de la malnova sistemo. Diversaj konsisteroj, aparatoj povas funkcii kune, aŭ tiuj povas anstataŭigi unu la alian.	
26.	**aktiva cirkvito**	Cirkvito, kiu enhavas ankaŭ aktivajn konsisterojn, kiuj estas ekz., la transistoro,	

		elektronika tubo ktp.	
27.	**aktiva filtrilo**	Filtrilo, kiu enhavas *aktivan* (amplifan) konsisteron. Estas uzate plejofte en la sonfrekvencaj cirkvitoj, kun amplifa integrita cirkvito (IC).	
28.	**aktiva kontaktilo**	Kontaktilo de relajso, kiu en la vico de kontaktiloj apartenantaj al diversaj aliaj relajsoj, *laste konektiĝas* (ŝaltas) aŭ *unue diskonektiĝas* (malŝaltas) la cirkviton.	
29.	**akuero**	Unu akumulatorĉelo.	
30.	**akumulilo**	Kurentofonto, en kiu estas konservita (ŝargita) elektroenergio en kemia formo.	akumulatoro *akuo*
31.	**akustika lenso**	En kapaŭskultilo fokusigas la sonon al decida punkto.	
32.	**akustika rekuplo**	Se de la elirejo de amplifilo estiĝas pozitiva rekuplado al sia enirejo, la amplifilo ekscitiĝas. Rekuplo povas esti ne nur elektre, sed *akustike* de la laŭtparolilo al la mikrofono. Ĉi tiu fenomeno povas okazi inter radia dissendilo kaj ricevilo.	
33.	**akuŝargilo**	Cirkvito, per kiu oni povas ŝargi (kolekti) elektran energion en akumulilon.	
34.	**akvoelektrolizo**	Elektrokemia procezo, per kiu oni povas disigi la akvon al hidrogeno kaj oksigeno.	
35.	**aldrejo**	Materio por konduktilo, kiu estas kun-fandita el Al-Si-Fe-Mg.	
36.	**alterna kurento**	Oni parolas pri alterna kurento, kiam la ŝargoportantoj moviĝas *alterne* al ambaŭ direktoj.	ambaŭdirekta kurento
37.	**alternanco**	Duonperiodo de iu regule sinsekva alterna signalo.	
38.	**alternatoro**	Mekanika kurentofonto, produktanta alternan kurenton.	generatoro
39.	**alterna tensio**	Tensio, kiun la fluanta kurento alterna estigas sur la rezistanco de cirkvito. Tiu tensio, kiun la rotacia kurentofonto (generatoro) polusŝanĝe generas.	
40.	**alternativa ŝaltilo**	Speciala ŝaltilo, kiu en paro estas kapabla ŝalti kaj malŝalti cirkviton el du lokoj.	koridora ŝaltilo *alterna ŝaltilo*
41.	**alternkurenta rezistanco**	Rezistanco, kiun montras la konsistero nur kontraŭ alterna kurento. La alterna rezistanco estas nomata simple *reaktanco*, kiu povas esti, kaj kapacita, kaj indukta. La reaktanco dependas de la frekvenco.	*reaktanco*

42.	**altfidela**	Kvalite preciza. La funkciado de cirkvito/aparato estas tre stabila, tenante la difinitajn valorojn.	
43.	**altfrekvenco**	Kiu apartenas al la post 10^5Hz-a intervalo (pli grandaj ol la ultrasonfrekvencoj). El radiodissenda vidpunkto *altfrekvenco* estas inter la 3÷30MHz. Grava propreco de tiuj frekvencoj, ke reflektiĝas de sur la jonosfero.	
44.	**altirdaŭro (relajso)**	Tempo, kiu estas bezonata por funkciigi relajson el baza stato ĝis ekscita (firmtena) pozicio, dum kiu okazas la kontaktilmovo ĝis tuŝi la alian kontaktilon.	
45.	**altpasa filtrilo**	Filtrilo, kiu traigas signalojn nur super decida frekvenco. La malpli altajn frekvencojn tiu amortizas forte, do ne traigas. Ĝi konsistas el kondensilo(j) kaj bobeno(j), eble havas ankaŭ rezistilo(j)n.	
46.	**alttensia lineo**	Elektrokonduktiloj portantaj la elektran energion de la elektrocentralo al la substacioj.	
47.	**alttensio**	Pli alta potencialdiferenco ol 1000V.	
48.	**amatoro**	Homo, kiu faras radio-dissendon/ricevon ŝatokupe.	radioamatoro
49.	**amortizi**	Mildigi elektran signalon. Estas kontraŭefiko al la amplifo. Ĝia mezurunuo estas la *decibelo* (dB).	
50.	**amortizilo**	Konsisteraro el pasivaj elementoj por mildigi, ekz., la sentivecon de mezuriloj, por eviti la troan regadon de riceviloj kaj amplifatoroj. Plejofte farite el rezistiloj, atente pri la enira kaj elira impedancoj.	
51.	**ampermetro**	Instrumento, per kiu oni povas mezuri la intensonivelon de la kurento.	ampermezurilo
52.	**ampero**	Baza mezurunuo de la kurentointenso en la internacia sistemo de mezurunuoj (SI); Ties simbolo estas: A. Difino: Unu ampero intensa estas tiu kurento, kiu produktas magnetan forton $2x10^{-7}$Nm inter du paralelaj senfinaj konduktiloj de neglektebla kversekcio, je distanco de unu metro.	
53.	**ampervolvo**	Grava dateno de relajso, kiu esprimas la bezonan kurentointenson po volvo, por ekfunkciigi aŭ malfunkciigi tiun. La minimuma valoro estas tiu kurentointenso, kiu estas minimume bezonata por la ekfunkciigo, kaj la maksimuma valoro estas tiu kurentointenso, ĝis kiom devas	

		malintensigi la kurenton por la malfunkciigo de relajso.	
54.	**amplifad-regulilo**	Manipulilo, uzata por tio ekz., reostato.	
55.	**amplifa koeficiento**	Propreco de aktiva konsistero, kiu determinas la kapablecon por amplifi elektrajn signalojn.	*betao*
56.	**amplifatoro**	Cirkvito, kiu havas aktiva(j)n konsistero(j)n por pligrandigi amplitudon de tensio aŭ kurento.	
57.	**amplifi**	(PIV: Plifortigi elektrajn oscilojn aŭ alternajn kurentojn.)	
58.	**amplifo**	Efiko, per kiu oni grandigas la intenson de la tensio aŭ kurento.	
59.	**amplifilo**	Aktiva konsistero, kiu havas proprecon amplifan. Ekz., tiuj estas la transistoro kaj la plej multaj elektronikaj tuboj.	
60.	**amplitudo**	Maksimuma valoro mezurata inter la du polusoj de la alterna kurento aŭ tensio.	
61.	**amplitudo-modulado**	Procezo, per kiu oni variigas la amplitudo-grandecon de elektra signalo. Estas uzate ĉe radiodisendado.	
62.	**ampolo**	Lumigilo, en kiu oksigenmanka spaco estas bruligata metalfadeno (filamento). Tiun konsisteron inventis T.A. Edison.	lampo inkandeska
63.	**analoga**	La diversajn karakterizojn daŭre detekta aŭ variiga maniero. Daŭre varianta signalo. Ĝia inverso estas la diĝita, kiu reprezentas konkretajn numerojn.	
64.	**analog-diĝita transformilo**	El analoga signalo faras diĝitan signalon. La eniran signalon la AD transformilo skanas tempopaŝe, kaj ties grandeceron reprezentas per numeroj.	**AD** transformilo
65.	**analoga amplifilo**	Cirkvito, kiu povas amplifi analogajn elektrajn signalojn.	
66.	**analoga cirkvito**	Cirkvito, kiu prilaboras daŭre ŝanĝantajn elektrajn signalojn. Alia maniero estas la diĝita elektroniko.	
67.	**anjono**	Jono kun negativa ŝargo.	
68.	**angula levumilo**	Mekanika parto de relajso, sur kiu baskulas la vekto, tiel move la kontaktilojn.	
69.	**ankro**	Relajsa konsistero mekanika, kiu moviĝas al la ferkerno dum la ekscito pro la magneta kampoforto. Al ĉi tiu konsistero estas ligitaj la kontaktiloj movantaj.	

70.	**ankrofalo (relajso)**	Okazas, kiam malestiĝas la ekscito de relajso kaj ĝi poziciiĝas al bazo.	
71.	**ankrofalo prokrastita**	Post la malŝalto de la relajsocirkvito, la ekscitiĝon plutenas iom ekz., kondensilo aŭ diodo.	
72.	**anodo**	Pozitiva elektrodo de la elektraj konsisteroj.	
73.	**anstataŭiga cirkvito**	Tiu estas kapabla modeligi (imiti) la funkciadon de la praktika cirkvito.	modelcirkvito, provcirkvito *modelo*
74.	**antaŭamplifatoro**	Amplifilo aŭ amplifatoro por malfortaj signaloj. Krom la amplifo ĝia tasko estas ankaŭ disigi la utilan signalon de la perturba signalo, tial ofte estas muntita proksime al la signalfonto. Ties alia tasko estas adapti la impedancon. (PIV: Unuŝtupa amplifilo, uzata por plialtigi la nivelon de malfortaj signaloj ricevitaj de anteno, mikrofono ks.)	antaŭamplifilo
75.	**antaŭsigno**	(+), (–)	Diru: (+) plus (–) minus
76.	**antenbobeno**	Bobeno, kiu apartenas al tiu resonilo, kiun oni agorde povas akomodi la altfrekvencan cirkviton al la ĝusta frekvenco, apartenanta al la sendata aŭ ricevata ondolongo.	
77.	**antengajn(ec)o**	Kvociento de la disradiita kaj la enkondukita povumoj.	
78.	**anteno**	Kondukto por disradiadi aŭ kaptadi la elektromagnetajn ondojn. Estas uzata ekz., ĉe la radia, televidila kaj poŝtelefona tekniko.	
79.	**antenoalĝustigo**	Anteno tiam funkcias en harmonio kun la fidro, se la sistemo estas en resonado. Tiun oni povas atingi tiel, ke la reaktancon forigas ĉe la konektopunkto. Se la reaktanco estas indukta, tiam oni konektas kondensilon sur la fidron, kaj se tiu estas kapacita, tiam estas enmuntita bobeno serie kun la fidrokablo. En resono restas nur la radia rezistanco, kiu ne certe egalas kun tiu de la nutrokablo, tial oni devas uzi transformilon por eviti la starantajn ondojn.	
80.	**antenoimpedanco**	Ĉiu anteno ĉe la konektopunkto havas impedancon dependantan de la frekvenco. Tiu impedanco konsistas el du partoj: el radia rezistanco kaj el kapacita aŭ indukta reaktanco. La anteno tiam resonas, se la reaktanco estas nulo kaj la impedanco egalas kun la radia rezistanco.	
81.	**antenokurento**	Kurento, kiu fluas de la finamplifatoro al la anteno.	

82.	**antenopolarigo**	La polarigon de anteno determinas la fortolinioj de la elektromagnetaj ondoj. La polarigo povas esti lineara, aŭ rondforma. La lineara povas esti plejofte vertikala, aŭ horizontala. Sed estas konata la *interpolara*, kiu estas inter la vertikala kaj la horizontala polaroj. Grava estas la polarigo (direkto) de la disradiilo (anteno), ĉar la fortokampo paralelas kun tio. Do. la vertikala anteno estas vertikale polarigita, la horizontala drat-, aŭ stango-anteno estas horizontale polarigita. La inversa polarigado inter la sendilo kaj la ricevilo povas okazigi 30dB amortizon (gajnoperdon). Ankaŭ la disvastiĝo dependas de la polarigo. La vertikale polarigita anteno estas pli efika por la ondoj surfacaj, kaj horizontale pli efikas por la spacondoj.	
83.	**anteno-terkonekto**	Estas antenoj, kiuj povas funkcii nur kun terkonekto bonkvalita. Ekzistas aliaj, por kies funkciado ne estas bezonataj. Ĝenerale por la simetriaj antenoj oni ne uzas terkonekton. La bonkvalita terkonekto por *unudirekta* kurento ne estas konvena por altfrekvencoj. Ekz., tro longa terkonektilo ne efikas.	
84.	**aparato**	Kompleksa cirkvitaro por konkreta celo.	
85.	**apartiga reljunto**	Speciala relfino, kiu elektre disigas du relcirkvitojn per plastik-enmetaĵo. Tie la reloj estas ligitaj per izolantaj splitoj.	
86.	**apiko**	Esprimas en ecaro, kiel intense grandiĝas aŭ malgrandiĝas ia karakterizo de elektro-proprajo.	
87.	**apogita relajso**	Relajsoparo, kies relajsoj estas kunligitaj mekanike. La mekanismo certigas pluan aktivecon post la malŝalto de la funkcianta kurento, laŭ la pozicio rilate al iu relajso.	*apogrelajso*
88.	**aretacio**	Kvalito, kiu montras la stabilecon de mekanika konsistero en ripoza stato. Ekz., kontaktilo de ŝaltilo, relajso, sensilo ktp.	
89.	**arbocirkvito**	Cirkvitoreto konsistanta el konektiloj de relajsoj. Tiu cirkvito havas unu enirejon kaj plurajn elirejojn. La tuta cirkvito enhavanta „n" relajsojn povas havi 2^n elirejojn. Inter la elirejoj ĉiam nur unu povas konektiĝi al la enirejo en difinita relajsofunkcia kombino.	
90.	**arko**	Daŭra elektra sparko, ekz., ĉe veldado inter la elektrodo kaj la veldata objekto.	elektra arko
91.	**arkoestingilo**	Procedo, per kiu eblas bari la ekaperon de arko, aŭ la jam kreiĝantan estingi.	

92.	**armaturo**	Bobeno de la generatoro, kiu donas elektran energion, en kiu indukiĝas tensio. (PV: Fera peco, kiu fermas la magnetan cirkviton.) (PIV: La rotacia parto de elektra maŝino.) Rilate al la armaturo ekzistas dusencaj uzoj ankaŭ en la nacilingvaj fakliteraturoj!!!	induktato
93.	**ASCII**	*American Standard Code for Information Interchange,* t.e. «Usona norma kodo por inform-interŝanĝo»): sepbita kodo por prezenti tekstajn datenojn, oficialigita en 1963, disponebla en la plimulto de la nunaj komputiloj.	*askio*
94.	**atomo**	Materiero ne videbla per okuloj sen helpilo. La atomo konsistas el kerno ĉirkaŭata de elektronoj. Mem la kerno enhavas protonojn kaj neŭtronojn.	
95.	**aŭskultilo**	Eta laŭtparolilo, kies sonon oni povas aŭdi nur tiun tenate proksime aŭ sur la orelo(j).	
96.	**aŭtomata frekvencoteno**	En cirkvito estas aŭtomate agordata tiu konsistero, kiu determinas la frekvencon.	**AFT**
97.	**aŭtomata regado de amplifado**	Cirkvita maniero por alĝustigi la amplifadon por la enireja signalintenso. Ĝi estas uzata ĉefe en ricevatoroj pro la ne stabila antenosignalo.	**ARA**
98.	**aŭtomato**	Maŝino, instalaĵo ktp., kiu funkcias sen homa manipulado.	
99.	**aŭtostopilo**	Atentemon kontrolanta instalaĵo, kiu pro la mankoj de la manipulado(j) difinita(j), donas signalon kaj/aŭ haltigas la maŝinon, procedon.	
100.	**aŭtotransformilo**	Dratŝpara transformilo, en kiu la primera kaj sekundara bobenoj parte apartenas al sama volvaĵo. Ĉi-tipa transformilo ne certigas disigon galvanan inter la primera kaj la sekundara cirkvitoflankoj.	ŝpartransformilo
		B	
101.	**bakelito**	Artefarita materio, izolanta substanco, konsistanta ĉefe el karbolo kaj formolo, tre ofte uzata en la elektrotekniko.	
102.	**bakelitplato**	Platforma objekto el bakelito.	
103.	**bakvard-diodo**	Speciala tuneldiodo, en kiu la tn. „Esaki-kurento" estas tiel malintensa, ke ĝia karakterizo ne havas malsupreniĝan parton. Pro tio en la malfermdirekta reĝimo ĝis iom da tensionivelo ne fluas kurento. Sed en	inversa diodo

		malfermdirekta reĝimo pro la zener-efiko jam tre malaltaj tensioj povas fluigi tre intensan kurenton. Tial la bakvard-diodo havas inversan karakterizon rilate al la normaldiodo.	
104.	**balanc-modulatoro**	Similas al la ring-modulatoro, sed ĉi tie oni povas reguli, fari balancon per reostato, la frekvencon de la elira signalo, ĉu tio estu la sumo aŭ la diferenco de la eniraj frekvencoj.	
105.	**balun-tranformatoro**	Larĝbenda, impedanca kaj simetria transformilo. Koeficiento de la impedanco-transformado estas 4:1.	*baluno*
106.	**bananŝtopilo**	Kontaktilo sur la fino de mezurilkablo.	*ŝtopilo*
107.	**bandaĝo**	Multaj dratoj, kabloj ligite estas aranĝitaj unu apud la aliaj.	
108.	**barbobeno**	Limigas la intenson de la frekvencohavaj kaj impulsoformaj kurentoj. Kontraŭ la *unudirekta* kurento ĝi havas malgrandan, oman reziston. Ĝi estas fabrikata por sonfrekvencaj kaj por radiofrekvencaj alternaj kurentoj. Por radiofrekvenco estas uzata aerkerna bobeno, kaj por la sonfrekvenco ferkernohava. L plej efika por barboneno estas la toroid-tipa.	
109.	**bareto**	Gashava elektronika tubo, tra kiu fluas konstanta kurento en decida tensiointervalo.	kurentostabiliga tubo
110.	**barioferito**	Durferito, el kio oni povas fabriki tre bonkvalitan konstantan magneton. $Ba^{2+}(Fe^{3+})_{12}(O^{2-})_{19}$	
111.	**bartensio**	Povas esti minimuma aŭ maksimuma, kiun valoron la tensio ne povas trapasi.	
112.	**bartransformilo**	Alĝustigas impedancon en malaltfrekvenca intervalo, samtempe limite la ĵamon de la altfrekvencaj aŭ impulsaj influoj.	
113.	**basa tensio**	Malalta tensio inter 24V÷65V.	
114.	**baskulŝaltilo**	Ŝaltilo, inter kies pozicioj la transiro okazas abrupte.	
115.	**baskultensio**	Tensioalto, ĉe kiu la tiristoro, triako, dinistoro, diako ŝaltiĝas.	
116.	**baterio**	Kurentofonto havanta pli ol unu piloĉelojn.	
117.	**baŭdo**	Informo-transiga rapideco. La nombro de baŭdo reprezentas la impulsonombron transigitan dum unu sekundo.	
118.	**baŭdoto**	Kodsistemo konsistanta el kvinopaj unuoj.	kvinopa kodo

		Uzata tiu por la telegrafoj.	
119.	**baz(a) signalo**	Signalo, al kiu oni komparas la kontrolendan signalon.	referenc-signalo
120.	**bazfrekvenco**	Frekvenco, ĉe kiu cirkvito, oscikvito, aŭ anteno resonadas. Ties multobligaj frekvencoj estas la superharmonoj. Ĉe pura sinuso estas nur la bazfrekvenco, sed en la praktiko tia ne ekzistas.	
121.	**bazharmono**	Signalo, kies amplitudo estas la plej granda rilate al la superharmonoj kaj ties periodeco, havas la plej malgrandan frekvencon.	unua harmono
122.	**bazo, bazpunkto**	Komuna punkto, al kiu rilatas la diversaj nutro- kaj regtensio de cirkvito.	
123.	**bendo**	Frekvencointervalo	frekvencozono
124.	**bendofiltrilo**	Filtrilo, kiu traigas signalojn en decida frekvencointervalo, kaj la pli malaltajn kaj pli altajn frekvencojn retenas.	
125.	**bendobasa filtrilo**	Filtrilo, kiu traigas malaltfrekvencajn signalojn.	
126.	**bendoetendigo**	Larĝigo de la frekvencozono.	
127.	**bendolarĝo**	Grandeco de la transiga frekvencointervalo.	
128.	**bendotrateno**	Esprimas tiun bendolarĝecon de signaloj, kiun elektronika ŝtupo povas transporti sen malaltiĝo de intenso kaj sen distordo-grandiĝo.	
129.	**betao (=h21)**	Kurentoamplifa koeficiento de transistoro emiterkonektita. Esprimas la proporcion inter la bezkurent-ŝanĝo kaj kolektorkurent-ŝanĝo, dume la kolektortensio estas konstanta.	amplif(ik)eco
130.	**bezo**	Regelektrodo de transistoro.	
131.	**biasi**	Anticipe ĝustigi la reĝimon de iu (plej ofte aktiva) elektra elemento, movante ties laborpunkton en sensignala reĝimo.	preagordi
132.	**biastensio**	Konstanta *unudirekta* tensio, liverata al la rega elektrodo (grido, bezo, giĉeto). Kun ĉi tiu tensio estas agordita la laborpunkto en la sensignala reĝimo.	
133.	**bifilara (bobeno)**	Konstruita kun du dratoj paralele volvitaj, ĉe iu fino kunligite. Ties signifa propreco estas la seninduko, ĉar en la unuopaj bobenoj la kurento kontraŭdirekte fluas.	
134.	**bildoregada ŝtupo**	Cirkvito en la televidila tekniko, kiu regas	

		rekte la katodon de la kineskopo kaj servas sinkronsignalojn por la defleksigaj ŝtupoj.	
135.	**bildotena ekrano**	Ekrano de la elektronfaska tubo, kiu la bildon plumontras ankaŭ post la malŝalto de ekscito.	memoranta ekrano *storekrano*
136.	**binara**	Numerosistemo, kiu nur du ciferojn 0 kaj 1 havas.	
137.	**bito**	La plej malgranda datenelemento en la komputila tekniko.	
138.	**bitoko**	Datenelementoj, bitserio. La komputiloj unu bitokon uzas kiel unuo. La unuo ĝenerale havas ok bitojn.	bajto
139.	**blokanta oscilatoro**	Estas grava diferenco rilate al la jam konataj indukto-kuplitaj oscilatoroj, ke ĉi-tipa cirkvito ne oscilas senhalte. Se la bezcirkvita RC valoro estas granda, tial la boneca faktoro estas malgranda, tiel povas okazi, ke la cirkvito „start-stop" funkcias periode. En ekstrema kondiĉo, plumalgrandige la bonecan faktoron, povas okazi tiel, ke la oscilatoro ekscitas nur dum unu impulso. Poste ĝia ekscito haltas. Ĉi-tipa oscilatoro estas uzata plejofte en la TV tekniko kaj ĉe la komputilmonitoroj.	
140.	**bloko**	Funkcia unuo.	modulo
141.	**blokskemo**	Nedetala cirkvita skemo. Ĝi estas uzata nur por klarigi la ĝeneralan funkciadon. Ĉi tiu desegnaĵo ne montras la unuopajn konsisterojn.	blokfiguro
142.	**bobenkadro**	El izolanta plato fabrikita kadro, kiu kuntenas la bobenon.	bobentenilo, haspelo
143.	**bobenkorpo**	Mem la bobeno sen kadro.	
144.	**bobeno**	Survolvita drato, kiu povas esti memtenanta aŭ enkadra.	induktilo
145.	**boneca faktoro**	Numero, kiu montras la kvaliton de cirkvito.	*boneco*
146.	**bolometro**	Termosentiveca rezistilo, kies termofaktoro estas granda. Ĝi estas uzata por mezuri povumon.	
147.	**borno**	Konektopunkto por nutri cirkviton. Konektopunkto de pilo, baterio, akumulilo ktp., ĝenerale de elektrofonto.	klemo de nutrotensio
148.	**bornotensio**	Tensio, kiu estas mezurebla ĉe la konektopuntoj de la nutroeniro de cirkvito. Tensio de pilo, baterio, akumulilo ktp., ĝenerale de elektrofonto.	

149.	**Brakhaŭzen efiko**	Fenomeno ekzistanta en feromagnetaj materioj, laŭ kiu la daŭran intensigon de la magneta kampoforto, la induko nur pokvante sekvas.	
150.	**bremsogrido**	Speciala *grido* en elektronika tubo, kiu limigas la movon de la elektronoj.	
151.	**bruo**	Signalo ĵama, kiu ĉeestas apud la utila signalo.	
152.	**bruogeneratoro**	Elektronika aparato, kiu produktas signalojn kun difinitaj propraĵoj daŭre variige en certa spektro. Se rilate al la frekvencoŝanĝo la povumo de la signalo estas konstanta, tiam oni parolas pri *blanka bruo*. Se la povumo dependas de la frekvenco, tiam oni parolas pri *roza bruo.*	
153.	**bruoreduktilo**	Cirkvito, kiu malgrandigas la bruosignalon.	
154.	**bruotensio**	Alterna tensio, kiu estas mezurebla apud la *unudirekta* tensio. Tiu alterna tensio estas *supersidanta* sur la *unudirektan* tension.	
155.	**B-tipa amplifatoro**	Amplifatoro, kies elira kurento fluas nur dum duona periodo, tial la signalo estas grave distorda.	
156.	**bufrokondensilo**	La unua kondensilo uzata post rektifigo por stapli ŝargojn. Tiu niveligas la fluktuan aŭ pulsantan tension. Ŝargite ĝi havas tiom da elektra energio, kiu estas sufiĉa por kompensi la periodajn mankojn de la nutrotensio.	
157.	**bufromemorilo (storo)**	(PIV: provizora memoro por datenoj, ekz., por pli efike uzi aparatojn, kiuj traktas datenojn kun malsamaj rapidoj.)	*staplo*
158.	**bufroŝtupo**	Interŝtupo, kiu mildigas la kontraŭefikon inter la antaŭa kaj la sekvanta ŝtupoj. Servas ekz., la impedanco-adaptadon.	*bufro*
159.	**burst-signalo**	Uzata en la TV tekniko kolora ĉe la NTSC kaj PAL sistemoj.	kolorreganta signalo
160.	**buso, bussistemo**	Konektotipo, kies esenco estas tio, ke ĉiuj elementoj de kombina aparato estas konektitaj al sama konektilaro. Tiu sistemo certigas tre fleksan evoluigeblecon kaj uzas la plej malmultajn konektilojn.	
		C	
161.	**C-tipa amplifatoro**	Amplifatoro, kies enira kurentointenso estas pli malalta ol la duono de la maksimuma amplitudo. Tial la ĉi-tipa amplifatoro havas tre grandan distordon. Por lineara amplifado ĝi ne estas konvena, sed ties avantaĝo estas	

		la bona rendimento.	
162.	**ciferdisko**	Sur la malnovtipaj telefonoj tiu disko, kiun turnante oni povas fari telefonvokon.	
163.	**cifereca indikatoro**	Indikilo, kiu per ciferoj montras la indikendan nombron.	*ciferindikilo*
164.	**cirkvita panelo**	Panelo, kiu estas farita el kuprokovrita izolaĵplato por cirkvito. Estas uzataj unuflanka (nur unu flanko estas kovrita kun kuprofolio) kaj duflanka (ambaŭ flankoj estas kovrita kun kuprofolio) paneloj.	*panelo*
165.	**cirkvita skemo**	Desegnaĵo pri la cirkvito, montrante la konsisterojn kun ĝiaj kunligoj.	*skemo*
166.	**cirkvitbrecĥilo, cirkvitbrecĥo**	Konsistero, kiun povas trarompi supertensio, tiel ŝunte defendas la aparatojn kontraŭ difektiĝo aŭ/kaj elektrokutiĝo.	sparkobrecĥo
167.	**cirkvito**	Aro de interkonektitaj elektronikaj konsisteroj, tra kiuj fluas elektra kurento pro la alkonektita tensio.	
		Ĉ	
168.	**ĉasio**	Lamenportilo, sur kiu oni lokumas kaj enmuntas la konsisterojn kaj konstru-elementojn de cirkvito.	muntopanelo, muntokadro
169.	**ĉelotensio**	Bornotensio de unu akumulatorĉelo. Tiu tensio havas valoron nominalan ĉe acidaj akumulatoroj 2V. Ĝia minimuma valoro estas 1,83V kaj la maksimuma valoro estas 2,7V. Tiu tensiovaloro, kiam komenciĝas gaso-eliĝo estas 2,4V.	
		D	
170.	**D/A konvertilo**	Diĝita / Analoga konvertilo estas tia cirkvito, kiu transformas la signalojn diĝitajn al signaloj analogaj.	
171.	**darlington-konekto**	Amplifatoro per du kunkonektitaj transistoroj. La enira signalo estas konektita al la bezo de la unua transistoro, kies emitero rekte konektiĝas al la bezo de la dua transistoro. La kolektoroj estas kunkonektitaj. La suma amplifeco estas la produta amplifeco de la du transistoroj.	
172.	**dateno**	Informo, informoportanto.	
173.	**datenportilo**	Teknikaĵo, kiu storas la koditajn informojn. (ekz., magnetrubando, truigita karto, truigita rubando, magnetdisko, kompaktdisko.)	
174.	**datenprilaboro**	Operacio pri datenoj por aranĝi tiujn, aŭ por ricevi novajn informojn.	

175.	**debranĉiĝo, debranĉo**	Konduktilnodo en cirkvito, al kiu aŭ de kiu la kurento povas flui pli ol unu direktoj.	debranĉejo, nodo
176.	**deciBelo**	Mezurunuo, kiu esprimas la proporcion inter la enira kaj elira kurento, tensio aŭ povumo, rilate al decida frekvenco. Tiu esprimas ekz., la amortizon. La baza mezurunuo estas la „*Belo”* (Bell), sed tio estas tro granda valoro, tial estas uzata ties dekono, nomata *deciBelo*. (dB)	
177.	**defaldaŭro**	Tempodaŭro, dum kiu la relajso el aktiva pozicio transiras al trankvila (baza) pozicio.	
178.	**defazigilo**	Cirkvito, kiu modifas la fazon de la enira signalo.	
179.	**defaziĝo**	Se du alternaj signaloj ne estas en ĝusta koincido. Ilia diferenco povas atingi la duonperiodon. Se la defaziĝo estas ĝuste duonperioda, la signaloj estas en kontraŭa fazo (*malfazo*).	
180.	**defleksi**	Influi la vojon de la flugantaj elektronoj en ikonoskopo.	
181.	**defleksanta bobeno**	Bobeno sur ikonoskopo, per kiu eblas krei tian elektromagnetan kampon, kiu povas fleksi la vojon de la elektronoj flugantaj.	
182.	**deforiga kapeto**	Estas tiu konsistero en magnetofono, per kiu oni povas forigi la informojn de sur la bendo.	
183.	**degeneritaj osciloj**	Oscilado, kies intenso daŭre amortiziĝas.	*dubloj*
184.	**dekatrono**	Speciala elektronfaska tubo por kalkuli impulsojn laŭ la dekuma sistemo.	
185.	**dekodilo**	La antaŭe koditan datenon, signalon rekodas al la originala formo.	
186.	**dekremento**	(PIV: Nombro, kiu karakterizas la amortizon de osciloj.)	
187.	**dekstra-mana regulo**	Se la dekstran manplaton vi tenas tiel, ke tiu estu perpendikla al la fortolinioj, kiuj fortolinioj devenas el la norda poluso de magneto, kaj la dikfingro etendata montru la movdirekton de la konduktilo, tiam la kvar fingroj montras la direkton de la indukita tensio.	
188.	**deltoforma konekto, Δ-konekto**	Alkonekta sistemo ĉe la trifaza nutrado. La tri bobenoj estas deltaforme kunmuntitaj. „Δ”	triangula konekto *deltokonekto*
189.	**delto-modulado**	Speciala impulso-modulado, kies esenco estas tio, ke ne la momenta transportenda valoro estu kodita, sed la ŝanĝo rilate al la	**DM**

		antaŭa signalero. Ju pli ofta estas la modeligado, des pli preciza estas la ricevata signalo.	
190.	**demodulado**	Forigo de la modulanta signo de sur la radiofrekvenca signalo. La demodula cirkvito dependas de la tipo de modulado.	malmodulado
191.	**depolarizilo**	Poziciośanĝilo de polareco.	
192.	**detektilo**	Rektifanta konsistero por altfrekvencaj ondoj.	detektoro
193.	**devoro**	Elektrodo de FET-oj, al kiu moviĝas la ŝargoportantoj.	defluilo (Estas renkontebla termino la *drenilo*, sed tiu havas sencon fuŝan rilate al elektroniko laŭ PIV.)
194.	**diafonio**	Fenomeno, kiam signalo de iu cirkvito aperas en alia, aparta cirkvito. Ekz., en iu stereo-sistemo la signalo de la unua kanalo aperas ankaŭ en la alia. Mezurata per decibeloj.	
195.	**diagramo**	Grafikaĵo pri datenoj.	
196.	**diako**	La diako estas du dinistoroj kontraŭdirektaj en paralela konekto en komuna kristalo. Simetria dinistoro.	
197.	**diamagneto**	Ĉiu materio, kies permeablo (μ_r) malpli ol 1, estas *diamagneto*. μ_r=1 permeablon havas la vakuo. Tia materio estas ekz., la ligno, arĝento, parafino ktp.	
198.	**dielektrika konstanto**	Materia propraĵo, kiu reprezentas la grandecon de polarizado pro elektra kampo en la izolaĵoj. Tiun numeron, kiu montras la diferencon (malgrandiĝon) kompare al la vakua fortoefiko, oni nomas *dielektrika konstanto*, kaj signas per la greka litero ε (epsilono). Ĉi tiu dielektrika konstanto konsistas el du partoj: el la dielektrika (absoluta) konstanto de vakuo (el ε_0), kaj el la relativ-dielektrika konstanto ε_r, kiu konstanto montras la diferencon kompare al la vakua absolut-dielektrika konstanto. $\varepsilon=\varepsilon_0 \cdot \varepsilon_r$ La ε_0 havas konkretan kvanton: $\varepsilon_0=8{,}86 \cdot 10^{-12}$As/Vm	permitivo *dielektra konstanto*
199.	**dielektrika perdo**	Estas izolantaj materioj, kiuj en elektra kampo varmiĝas pro la perdoj, kaj estas aliaj kiuj ne. La dielektrika perdo ĝenerale intensiĝas pro la frekvencoaltiĝo, sed ekzistas escepto, ekz., „nylon” (nilono).	*dielektra perdo*

200.	**dielektrika rezistanco**	Rezistanco de la izolaĵo.	*dielektra rezistanco*
201.	**dielektrika stabileco**	Propreco de izolaĵo, montrante tion, kiom altan tension ĝi kapablas elteni sen trarompo.	*dielektra stabileco*
202.	**dielektrika trarompo**	Se sur la dielektrikon estas konektita pli granda tensio, ol kiun ĝi povas elteni, tiam la izolanta materio komencas kondukti; do ĝi *trarompiĝas*. La trarompa tensio estas kV nivela. La trarompo difektas la solidajn materiojn.	*dielektra trarompo*
203.	**dielektriko**	Elektra izolaĵo por kabloj, kondensiloj, bobenoj. La materio povas esti papero, gumo, vitro, plasto ktp.	*dielektro*
204.	**diferenciatoro**	Diferencia cirkvito kombinita kun integrita operacia amplifatoro.	
205.	**diferenceca amplifatoro**	Cirkvito, kiu amplifas la diferencon de du signaloj. La *diferencecaj amplifatoroj* konsistas el du simetriaj ŝtupoj. Tiuj estas aplikataj plejofte en integritaj cirkvitoj. Se la du eniraj signaloj havas egalan intenson, tiam la elira signalo estas nulo.	simetria amplifatoro
206.	**diferenceca kondensilo**	Variebla kondensilo, kiu havas du statorojn kaj unu rotoron. Kiam turnige la rotoron, la kapacito de unu parto grandiĝas, la alia malgrandiĝas.	
207.	**diferenceca regado**	Regadmaniero de la diferencecaj amplifatoroj. En ĉi tiu okazo ambaŭ regelektrodojn regas diversaj signaloj rilate al la terpunkto.	
208.	**diferencia cirkvito (ŝtupo)**	Kvarpoluso, al kies eniro konektita tensiosalto (ortangulo) ĉe la eliro aperas diferencie. Kiam la enira tensio estas ŝaltita, la elira tensio tuj atingas sian maksimuman valoron, sed poste laŭ la tempokonstanto logaritme malaltiĝas.	
209.	**difuza kurento**	En la praktiko la duonkonduktaj materioj ne estas homogenaj. Vere la sordido estas malhomogena, tial la plie movkapablaj negativaj ŝargoportantoj faras movon ne hazardan, sed plenigas la terenon egalmezure. Tiun movecon de la ŝargoportantoj, kiun estigas la diversa sordid-koncentriteco, oni nomas *difuza kurento*.	
210.	**difuza tensio**	La ŝargoj, ĉe ambaŭ flankoj de junto, estigas *potencialmuron*. Pro la potencialmuro la dominaj ŝargoportantoj jam ne povas plu difuzi. Inter la du finoj de la kristalo estiĝas potencialdiferenco, do tensio, kiun tension oni nomas *difuza tensio*	

		(U_{dif}). La difuza tensio de la siliciobazaj transistoroj estas 0,6÷,7V, kaj ĉe la germaniobazaj estas 0,2÷0,4V.	
211.	**difuzo**	(PIV: Fenomeno, per kiu gaso, lumo, varmo estas disigata al ĉiuj direktoj.)	
212.	**diĝita**	(PIV: Funkcianta per kvantoj, kiuj povas alpreni nur certajn difinitajn valorojn kaj ne estas kontinue ŝanĝeblaj.)	cifereca
213.	**diĝita cirkvito**	Ĉiu cirkvito, kiu funkcias laŭ la diĝita maniero; ekz., vibratoroj, logikaj elementoj ktp.	
214.	**diĝita indikilo**	Indikilo, kiu kun ciferoj montras la indikatajn valorojn.	
215.	**dinamika agordo**	Ekz., ĉe nutrilo estas grava la tensioagordo. Se tiu agordo reagas kontraŭ rapidaj ŝanĝoj, tiam ni povas diri, ke la dinamika agordo estas bona. La manko de la dinamika agordo povas okazigi difekton en la nutrata cirkvito.	
216.	**dinamika karakterizo**	La ĝeneralaj ecaroj ĉe *unudirektaj* kurentoj montras la karakterizojn de la aktivaj konsisteroj (elektronikaj tuboj, transistoroj). Ĉe alternaj kurentoj estas gravaj diferencoj, tial oni komencis uzi ankaŭ la dinamikecajn karakterizojn, kiuj estas pli kapablaj montri la dumfunkciadajn situojn.	
217.	**dinamika laŭtparolilo**	Estas tia ilo, kiu la alternan kurenton transformas al sonvibrado. La kurento trafluas bobeneton, metita tio en konstantan magnetan kampon. Sur la bobeneton estas kuplita membrano, kiu movas la aeron.	
218.	**dinamika mikrofono**	La sonvibrado movas la membranon, kiu movas bobenon en konstanta magneta kampo, tiel induke tension.	
219.	**dinamikeca zono**	Ĉe ricevatoroj kaj amplifatoroj estas tiu intervalo de sonforto, en kiu la sono ankoraŭ estas sendistorda.	
220.	**dinamo**	Elektromekanika kurentofonto rotacia, kiu eluzas la dinamo-efikon, dum la transformado de la mekanika energio al elektra energio.	
221.	**dinamotoro**	(PV: Elektra maŝino, kiu povas funkcii samtempe kiel motoro kaj kiel generatoro por kontinua fluo.)	
222.	**dinistoro**	Kvartavola diodo, havante „pnpn” strukturon. Ĉe malalta tensio tre malintensa kurento fluas, do la diodo estas fermata. Altige la tension, ĉe decida tensionivelo	binistoro

		okazos la zenera fenomeno, en la meza junto. Ĉi tiun tensionivelon oni nomas *baskultensio* (U_B).	
223.	**dioda bruo-limitilo**	Ilo, per kiu oni povas *limigi* signalnivelon inter du ŝtupoj. Plejofte ĝi konsistas el du duonkonduktaj diodoj, konektitaj paralele sed inverse. Ĝi estas uzebla nur por malintensaj signaloj, ĉar la diodoj ekz., siliciaj limigas la nivelon ĝis 0,6V. Pli grandaj signaloj tiel estus havantaj distordojn.	
224.	**dioda miksilo**	Ĉi-tipa cirkvito eluzas la nelinearan karakterizon de la diodo, por miksi du signalojn havantaj diversajn frekvencojn. Post la miksado eliras, kaj la suma kaj la diferenca frekvencoj de la du miksitaj signaloj. La dioda-miksilo ne amplifas, eĉ okazigas iometan perdon. Ĝia avantaĝo esta, ke aplikebla ankaŭ por mikroondoj.	
225.	**diodokapacito**	Ĉe duonkonduktanta diodo kiam ĝuste ne konduktas kurenton, aperas kapacito inter ĝiaj elektrodoj. Ĉi tiun kapaciton oni devas kalkuli en altfrekvencaj cirkvitoj. Estas specialaj cirkvittaskoj, kiam ĝuste ĉi tiu propreco de diodoj estas eluzata, kiam kun la ŝanĝo de tensionivelo estas variiga la kapacito. (Vidu ĉe la varikapo!)	
226.	**diodo**	Rektifilo, kiu povas esti elektronika tubo (valvo), aŭ duonkondukta rektifilo.	
227.	**diodohava detektilo**	Diodo en radiofrekvenca cirkvito, kiu nur duonperiodon traigas. La tegoondo estas sonfrekvenca signalo.	
228.	**dipleksa**	(PIV: Povanta efektivigi du malsamajn sendojn sur du malsamaj ondolongoj samtempe.)	dupleksa
229.	**dipolanteno**	Simetria anteno, ĉe kies du eliraj kontekto-punktoj la ricevitaj signaloj ĉiam aperas en kontraŭa polareco.	
230.	**dipolo**	Antenoparto de la duon-ondolonga (*duononda*) anteno, sur kiun estas konektata la antena kablo.	
231.	**direktilo** (ĉe anteno)	Elemento de Yagi-tipa anteno, kiu estas lokita al la *direkto* de la dissendejo.	
232.	**disagordita amplifatoro**	Amplifatoro enhavanta plurajn agorditajn ŝtupojn, sed tiuj ŝtupoj estas agorditaj ne precize al sama frekvenco. La frekvencoj estas, kaj malalte, kaj pli alte rilate al la difinita mezfrekvenco. La ŝtupoj ne nur rilate al la agorditaj frekvencoj diferencas, sed ankaŭ en la bendolarĝeco.	

233.	**disbranĉa konekto**	Nodo, el kiu estas elkondukata la kurento al pluraj direktoj.	
234.	**disiga kondensilo**	Kondensilo, kiu havas funkcion por bari la *unudirektan* kurenton. La alternan kurenton la kondensilo traigas.	
235.	**disiga transformilo**	Transformilo, kiu certigas senmetalan kontakton inter la kurentoretoreto kaj la konsumilo.	protekta transformilo
236.	**disipado**	Transformiĝo de elektra energio al termoenergio en la konsisteroj. Ĝi estas malutila fenomeno.	
237.	**disipebla povumo**	Tiu maksimuma povumo, kiun la konsistero povas elteni sen difekto.	
238.	**disketo**	Storilo fleksdiska kaj konekteble uzata al komputilo. Ĝi estas kapabla stori relative nur malmultajn datenojn.	fleksdisko *flopio*
239.	**diskoaparato**	Diskoforma akcesor-storilo muntita en komputilo. Ĝi estas kapabla stori grandvolumajn datenojn, ankaŭ post la malŝalto de komputilo.	
240.	**diskokanelo**	Sur la bakelita sondisko trovebla kanelo, kiu portas la soninformojn. Ĝia zig-zago per transformila pinglo donas tian elektran informon, kies ondoformo kongruas kun la sonondo. Tiun elektran ondosignalon amplife oni povas aŭskulti.	diskosulko
241.	**diskonekti**	Malligi kontakton, post kio ne fluas kurento.	
242.	**disilo de N-konduktilo**	Cirkvitelemento, per kiu oni povas disigi la N-konduktilon (NULo) de la publika elektroreto	diskonektilo
243.	**diskriminatoro**	Ĝustigebla cirkvito por akcepti aŭ malakcepti signalojn laŭ ilia frekvenco. Ĝi *diskriminacias* la ricevitajn signalojn. Demodulator-tipo en la frekvenco-modulita dissendo.	frekvencodistingilo
244.	**dispenso**	Malestigo de eksteraj, neintencaj influoj, al iu cirkvito aŭ cirkvitelemento.	senefikigo
245.	**dissendi**	(PIV: Disaŭdigi parolon, muzikon ktp. per radiotelefonio.)	
246.	**dissendilo**	(PV: Aparato por dissendi radiofonaĵojn.)	
247.	**disŝuta koeficienta**	La *disŝuta koeficiento* esprimas tion, ke el la fortolinioj kiom da parto ne efikas, disŝutiĝas. Oni signas la disŝutan koeficienton kun la litero **σ** (sigmo).	

248.	**distordo**	(PIV: Aliformiĝo de elektra aŭ magneta kampo sub la influo de alia kampo aŭ de okaza kaŭzo. Neĝusta reprodukto de sono aŭ signalo ĉe ricevado.)	
249.	**diverĝa flukso**	Flukso ekster la ferkerno aŭ tiu, kiu ne tuŝas la bobenon kuplantan, tiel ĝi ne transigas magnetan energion.	neutila flukso, malbena indukto
250.	**diverĝa indukto**	Ĉiu konduktilo, kablo, eĉ ankaŭ la konsisterpiedoj havas indukton, kiu dependas de ties longeco kaj strukturo. Ekz., pro tio oni devas konekti konsisterojn kun mallonga piedo en altfrekvencan cirkviton.	neutila indukto, malbena indukto
251.	**diverĝa kapacito**	Ĉiu konduktilo kaj konsistero havas kapaciton rilate al alioj. Ĉi tiu kapacito dependas de la grandeco de surfaco kaj distanco. Plej ofte kaj ĉe malaltfrekvencoj ĝi ne okazigas problemon, sed en la altfrekvencaj cirkvitoj devas atenti la muntolokumon de la konsisteroj.	neutila kapacito
252.	**dopler-efekto**	Sono, aŭ la frekvenco de elektromagneta ondo ŝajnas varia por la observanto, se la fonto de tiuj estas moviĝanta. Se la fonto de signalo proksimiĝas, tiam ŝajnas la frekvenco pli kaj pli altiĝa, kaj kiam malproksimiĝas tio, en tiu okazo la observanto spertas, ke la frekvenco pli kaj pli malaltiĝas.	
253.	**drato**	Konduktilo, kiu estas kapabla trafluigi kurenton.	metalfadeno
254.	**dratplektaĵo**	El multaj dratoj plektita konduktilo.	
255.	**dratrezistilo**	Rezistilo, kiu estas fabrikita el metalfadeno speciala. La metalfadeno estas volvita sur izolanta tenilo.	
256.	**driftkurento**	Tiu ŝargomovo, kiu estiĝas pro (ena aŭ ekstera) elektra kampo, kiun povas okazigi la ŝanĝiĝo de la temperaturo, la tensiofluktuado, oldiĝo ktp.	
257.	**drifto**	Malrapida ŝanĝiĝo (ofte devio de la nulvaloro) de iu elira parametro (plej ofte kurento) pro la ŝanĝiĝo de la temperaturo, pro la tensiofluktuado, oldiĝo ktp.	nulpunkto-migrado
258.	**dropo**	Propraĵo de transformilo, emfazita en procento. Tio esprimas la diferencon inter la nominala bornotensio primara kaj tiu tensio, kiu estas bezonata fluigi nominalan kurenton primaran, kiam la sekundara flanko estas konektita en kurtcirkvito.	
259.	**dufadena bobeno**	Bobeno, kies volvoj estas preparitaj kun du	bifilara bobeno

		paralelaj dratoj.	
260.	**dukluza MOD-FETo**	MOD-FETo havanta du regantajn enirejojn.	
261.	**dukurenta trakciilo**	Ekz., lokomotivo, kiu estas kapabla funkcii laŭ bezono kun ajna kurentotipo el inter la 50Hz aŭ 1/16Hz frekvenca kontaktlineo.	
262.	**Duobla Balanc-Modulilo /Miksilo/**	Pasiva modulilo/miksilo per diodoj ĉe kies eliro ekaperas, kaj la diferenco, kaj la adiciita frekvenco de la du eniraj frekvencoj.	**DBM** Vidu ankaŭ ĉe la Ring-Modulilo/Miksilo!
263.	**duonkondukta relajso**	Konstruelemento, konsistanta el duon-konduktiloj, kiu havas tiajn aŭ tre proksimajn proprecojn elektrajn, kiel la magneta relajso.	
264.	**duonkonduktanto**	Izolanto, al kiu donante fremdan materion ekhavas kapablecon konduktigi kurenton.	
265.	**duonkonduktilo**	Konsistero, kiu estas fabrikita el duonkondukta materio. Tiaj konsisteroj estas ekz., la transistoroj, tiristoroj, triakoj, integritaj cirkvitoj ktp.	
266.	**duonkondukto**	Poluso-dependa kondukto, kies traiga rezistanco dependas de la alkonektita polustipo de la tensio.	
267.	**duon-ondolonga anteno**	Estas tia radiilo, kiu havas geometrian mezuron duonan de la ondolongo. Ĝia plej simpla formo estas la dipolo. La ideala longeco estas kalkulebla kun la sekva ekvacio; 150/f, kies rezulto en metro [m] estas, se la frekvenco estas en [MHz]. En la praktiko estas uzata *simpligita koeficiento*, ĉar la ondoj malplirapide disiĝas en metalo ol en la aero. La valoro de tiu koeficiento estas 0,95, se la materio estas kompakta metalo, kaj estas 0,9, se la antenomaterio estas tuboforma.	
268.	**duon-ondolonga dipolo**	La plej simpla anteno duon-ondolonga.	
269.	**duopa bobeno**	Du bobenoj de relajso, kies datenoj elektraj ne egalas.	
270.	**dupleksa**	Telegrafia, telefona aŭ radia sistemo, kiu ebligas samtempe la sendon kaj la ricevon.	
271.	**dupleksa reĝimo**	Tiu parto de funkciado, kiam la aparato estas uzata samtempe, kaj sendi, kaj ricevi.	
272.	**dupleksilo**	Aparato, per kiu eblas funkciigi send-ricevatoron uzante unu antenon dum sama tempo.	
273.	**dupolara**	Geometrie dupozicia ondoformo disradiata, kiu rilatas unu al la alia ortangule.	

274.	**dupolusa**	Havas du elektre diversajn konekto-punktojn.	dupolu(um)a
275.	**dupoluso**	Tiujn materiajn korpusklojn, en kiuj estas, kaj pozitivaj, kaj negativaj ŝargoj, oni nomas dupolusoj. Ankaŭ en cirkvito oni diferencas du- kaj kvarpolusojn. En cirkvito en tiu okazo oni parolas pri dupoluso, se la konsistero aŭ cirkvitelemento (rezistilo, induktilo, kondensilo ktp. kaj ties ajna kombino) per du punktoj/polusoj, estas ĝi konektita al la cirkvito. Depende de la karakterizo de konsistero aŭ konstru-elemento la dupoluso en cirkvito povas esti lineara aŭ nelineara kaj aktiva aŭ pasiva.	dipoluso
276.	**duradia osciloskopo**	Tiu estas kapabla mezuri kaj aperigi du apartajn signalojn. Tiel eblas facile kompari la du signalojn.	
277.	**dustata vibratoro**	Vibratoro, kiu havas du stabilajn statojn.	
278.	**dutakta rektif**	Funkcia maniero de cirkvito, kiu rektifas alternan kurenton.	
279.	**dutakta rektifilo**	Cirkvito, kiu faras el alterna kurento, fluktue *unudirektan* kurenton. Ĝi konsistas el du aŭ kvar diodoj. Por la dudioda tipo estas bezonata tia transformilo, kies sekundara bobeno havas ankaŭ mezkonekton. La kvardioda tipo estas nomata Graetz (*grec*)-ponto.	
280.	**duvoja kontaktilo**	Konektilmekanismo kun unu movanta kaj du fiksaj kontaktiloj. La movanta kontaktilo en ambaŭ pozicioj povas fermi cirkvitojn apartajn.	alterna kontaktilo *morso-kontaktilo*
		E	
281.	**ecargeneratoro**	Speciala mezurilo, kiu estas kapabla montri grafike la mezuritajn datenojn de cirkvito.	
282.	**ecaro**	Karakteriza kurbolinio.	
283.	**edison-konektingo**	Ŝraŭbe konekta ingo.	
284.	**efektiva valoro**	Plejofte uzata valoro, reprezenti alternan signalon. La difina bazo de la efektiva valoro estas tiu *unudirekta* kurento, kiu povas produkti tiom da termoenergio, kiel la sinusforma. U_{ef}=0,71Û	
285.	**efika alteco**	Alteco de anteno, kiu estas efika por la emanigo.	
286.	**efika longeco**	Longeco de anteno, kiu estas efika por la	

		emanigo.	
287.	**efluva tensio**	Tensio de la koron-efluo/koron-lumo.	(Vidu ĉe korona-deŝarĝo!)
288.	**efluvo**	La ŝargita kondensilo, akumulatoro sen ŝarĝo perdas sian ŝargon.	
289.	**ekarto**	Permesata histerezo de la valorintervalo.	
290.	**ekfunkciigas**	Ŝaltas aparaton, alkonektas nutrotension al cirkvito, kiu komencas funkcii.	
291.	**ekran-krado**	En multkolora kineskopo estas uzate pro tio, ke la elektronradio nur la ĝustan kolortavolon ekscitu. Estas uzata t.n. *ombromasko*. Tiun ombromaskon en la envicaj tuboj oni nomas *brecomasko*.	ombromasko, brecomasko
292.	**ekrano**	Faco de la kineskopo kaj la elektronfaska tubo.	
293.	**ekscita kurento**	Kurentointenso, kiu estas minimume bezonata por teni en funkcia stato la relajson.	
294.	**ekscita stato**	Aktiva stato de relajso.	ekscitiĝo
295.	**ekscitatoro**	(PV: Aparato por produkti elektran eksciton aŭ kurenton de ekscito.)	
296.	**eksciti**	Igi pli intensan energionivelon. Konekti tension sur relajsobobeno.	
297.	**ekscita kontaktilo**	Tiu kontaktilo de relajso, kiu tiam ŝaltas cirkviton, kiam la relajso estas en *ekscita* stato.	
298.	**ekscita kurento**	Kurentointenso, kiu estas bezonata minimume por teni relajson en ekscita pozicio.	
299.	**ekscita tensio**	Tensiograndeco, kiu estas bezonata minimume por fluigi ekscitan kurenton tra la bobeno de relajso.	
300.	**ekscito**	Influo por estigi pli intensan energio-nivelon.	
301.	**ekscitrono**	Jontubo (hidrargvapora) kun unu anodo, ekfunkciiga per sparkoarko. Tiu tubo estas kapabla rektifi kurenton.	
302.	**ekstera temperaturo**	Temperaturo de medio. Tiu temperaturo, kiun oni mezuras ekstere de la kapsulo de konsistero, aŭ ekstere de la ujo (skatolo) de cirkvito.	
303.	**ekstra kurento je interrupto**	Memindukata kurento, kiu tiam indukiĝas, kiam kurento estas malŝaltita kaj la cirkvito havas induktilon.	

304.	**ekstrema valoro**	Ne ordinara valoro.	
305.	**ekvalizo**	Multbenda tonregulilo, uzata en sonfrekvencaj amplifatoroj.	
306.	**elbranĉo**	Nodo en cirkvito, de kie disiĝas la kurento al pluraj direktoj.	debranĉo
307.	**elektra**	(PIV: Rilata al la elektro. Funkcianta per la elektro.)	
308.	**elektra bremsado**	Per forta elektromagneto haltigi kaj fiksi plejofte veturilon, ekz., tramon. Alia maniero, kiam la movantan energion la elektra motoro de veturilo konsumas kiel generatoro. En ĉi tiu okazo la generatoro estas konektita en kurtcirkvito.	
309.	**elektra fajrero**	Simila al la *elektroarko*, sed ĉi tie la nutrilo ne povas teni kontinue la bezonatan tensionivelon, tial la arko estas nur momenta.	*sparko*
310.	**elektra hejtado**	Varmigi ĉambron estas uzata elektra energio.	
311.	**elektra hejtilo**	Hejtilo, kiu uzas elektran energion por krei varmon.	
312.	**elektra izolaĵo**	Materialo, kiu ne konduktas kurenton.	
313.	**elektra kampo**	La elektroŝargoj kreas *elektran kampon* ĉirkaŭ si mem. La elektra kampo estas *fortokampo*, kiu signifas tion, ke enmete elektroŝargon en ĉi tiun fortokampon, al la elektroŝargo impresas diversintensaj kaj diversdirektaj fortoj. **La fortokampo reprezentas tiun spacon, en kiu la kampon-kreita energio estas efike laborkapabla.**	
314.	**elektristo**	Fakulo, kiu okupiĝas pri la konsumado kaj efika eluzo de elektra energio.	
315.	**elektrizado**	Prepari eblojn per konvena teknikaĵo por uzi la elektran energion. ekz., konstrui tensioreton publikan.	elektr(um)ado
316.	**elektro**	Grekdevena vorto el la *elektron* **(**sukceno**)**, kiu esprimas al tiu rilatan fizikan fenomenon kaj praktikan uzadon. Unu el la formoj de la fizika energio, kiu montriĝas per lumaj, varmaj kaj mekanikaj fenomenoj.	
317.	**elektroarko**	Pro tre alta tensio povas joniĝi la aero inter du elektrodoj. En ĉi tiu joniĝanta kanalo la ŝargoportantoj jam povas movi, kiu okazigas lumefekton.	sparkoarko

318.	**elektrodinamiko**	Parto de la fiziko, kiu pritraktas la fenomenojn de la reciproka efiko de magneta kampo kaj de elektra fluo.	
319.	**elektrodinamismo**	(PV: Aro da fenomenoj kreitaj de la elektraj fluoj.)	
320.	**elektrodinamometro**	(PV: Aparato, kiu metita en elektrodinamikan efikon inter du cirkvitoj, servas por mezuri kurenton, tension aŭ alian elektran forton.)	
321.	**elektrodo**	(PIV: Ekstremaĵo de konduktanto, ekz., en elektroliza bano aŭ elektra pilo, ĉe kiu konduktado per elektronoj estas ŝanĝita al konduktado per jonoj aŭ aliaj ŝarg-portantoj, aŭ ĉe kiu la inversa transiro okazas.)	
322.	**elektroforo**	(PV: Aparato de elektrostatika indukto, kiu servas por produkti malgrandajn ŝargojn de statika elektro.)	
323.	**elektroforto**	Intenso de elektro.	
324.	**elektrokemio**	Parto de la kemio, kiu pritraktas la kemiajn efikojn de la elektro.	
325.	**elektrokut(iĝ)o**	Tuŝante altan tension, kurento fluas tra la homa korpo, kio okazigas kontraŭvivan efikon. Tra la viva korpo fluanta kurento el ekstera kurentofonto, kiu havas pli grandan intenson ol tiu de la biokurentoj.	elektrovund(iĝ)o elektroŝoko
326.	**elektrolita disiĝo**	La disfalo de kemiaĵoj al jonoj estas la *elektrolita disiĝo*. Ĉi tiu impreso fariĝas pro solviĝo aŭ fandiĝo.	dissocio
327.	**elektrolita kondensilo**	Speciala kondensilo, inter kies elektrodoj la izolanta tavolo estas elektrolito. La tiaj kondensiloj povas havi eĉ tre grandan valoron de kapacito.	*elko*
328.	**elektrolita tensio**	Inter la elektrolito kaj la en tion enmetita materio mezurebla tensio. La *elektrolita tensio* estas signifa propreco de la materioj. Tiu tensio povas esti aŭ pozitiva aŭ negativa, depende de la materio. ekz. 1. Se la pozitivaj metaljonoj iras en la solvaĵon, tiel en la metalo fariĝas elektron-pluso, kaj en la fluaĵo fariĝas elektronmanko. *Do, la elektrolito havas pozitivan, la metalo negativan ŝargon.* 2. Se la jonoj el la elektrolito eliĝas sur la metalon, tial la *metalo havas pozitivan, la solvaĵo negativan ŝargon.*	

		Se oni metas du elektrodojn el diversaj materioj en elektroliton, la elektrolitaj tensioj unuopaj povas adiciiĝi.	
329.	**elektrolito**	(PIV: Ĉiu solvita substanco, parte aŭ tute joniĝinta, kiu ebligas kondukton de elektro.)	
330.	**elektrolizi**	Oni parolas pri *elektrolizo*, kiam pro la impreso de kurento, la jonoj fariĝas neŭtralaj atomoj en la elektrolito.	
331.	**elektromagneta kampo**	Magneta kampo, kiun kreas kurentofluo.	
332.	**elektromagnetismo**	(PIV: Tuto de la fenomenoj rilataj al elektraj ŝargoj k magnetoj.)	
333.	**elektromagneto**	Artefarita magneto, konsistanta el fera stango (ferkerno), ĉirkaŭ kiu estas volvita drato, kaj kiu magnetiĝas pro la trafluanta kurento.	
334.	**elektromagneto por levado**	Uzata ĉefe en la deponejoj de la eluzitaj feroj por aranĝi tiujn.	
335.	**elektromekanikisto**	Elektronika fakulo, muntisto, reparisto de elektroteknikaj cirkvitoj, aparatoj.	
336.	**elektrometro**	(PIV: Plurfunkcia aparato por mezuri diversajn elektrajn kvantojn.)	
337.	**elektromuntisto**	Elektra fakulo, muntisto, reparisto de elektraj cirkvitoj, aparatoj.	
338.	**elektronelpaso**	En ĉambrotemperaturo la elektronoj ne povas elpasi el la metaloj kontraŭ tio, ke tiuj puŝas reciproke unu la alian. La elektronoj havas alian energion la tn., *kinetikan energion*. Tiu kinetika energio dependas de la temperaturo de la metalo. Elektronoj nur tiam povas elpasi el metalo, se ties temperaturo estas alta.	emitiĝo
339.	**elektronika tubo**	En envelopon preparita elektroteknikaĵo. En la envelopo estas aŭ vakuo aŭ gaso. Laŭ la funkcikapablo tiuj estas multtipaj de la rektifiloj ĝis la diversaj amplifiloj.	elektrontubo, vakua tubo, *etubo*
340.	**elektronika voltmetro**	Voltometro, kiu havas elektronikajn cirkvitojn.	
341.	**elektroniko**	Tiu parto de elektrotekniko, en kiu estas ofte uzataj la duonkonduktaj konsisteroj.	
342.	**elektronĵetilo**	Elektrodkomplekso en la elektronfaska tubo. Per tiuj elektrodoj estas akceligaj la elektronoj, ke tiuj grandrapide atingu la ekranon.	elektronkanono
343.	**elektrono**	La elektrono(j) rondiras ĉirkaŭ la atomkerno.	

344.	**elektroskopo**	(PIV: Instrumento por konstati la ĉeeston de elektro kaj difini ĝian pozitivecon aŭ negativecon.)	osciloskopo *skopo*
345.	**elektrosonorilo**	Sonkreilo eluzante la elektromagnetan efekton. Elektromagneto movas „martelon”, kiu martelo dum la movado frapas kloŝon.	
346.	**elektrostatiko**	(PV: Parto de la fiziko, kiu pritraktas la fenomenojn aŭ la elektrajn ŝargojn, kiuj manifestiĝas per ripoza aŭ statika stato.)	
347.	**elektrosubstacio**	Tensioŝanĝa nutrouzino inter la elektro-produktejo kaj la konsuma reto.	
348.	**elektroteknikisto**	Fakulo, kiu okupiĝas pri la elektrotekniko. Tiu faknivelo, kiu estas inter metiisto kaj inĝeniero ekzistanta ekz., en Hungario.	
349.	**elektroterapio**	(PIV: Terapio per elektraj kurentoj.)	
350.	**elfazigi**	(PIV: Ŝanĝi el la origina fazo.)	defazigi
351.	**elira impedanco**	Kvarpolusa propreco ĉe la eliro, kiu reprezentas kompleksan rezistancon kontraŭ alterna kurento.	
352.	**elira kapacito**	Ĉe la eliro de kvarpoluso mezurebla aŭ kalkulebla kapacito.	
353.	**elira transformilo**	Transformilo por alĝustigi la eliran impedancon al la ŝarĝilo aŭ konsumilo.	
354.	**eliro**	Flanko de kvarpoluso, kie estas konsumebla la prilaborita signalo.	
355.	**elirpovumo**	Apartenas al tiu maksimuma ŝarĝokurento, kun kiu la aparato ne difektiĝas.	
356.	**elpasa laboro**	Laboro, kiu estas bezonata por elektronoj elpasi el metalo en vakuo. Ĝi Estas karakteriza signifo de metalo.	emita laboro
357.	**malŝalta enirejo**	Al kiu estas konektita la malfunkciiga signalo.	
358.	**malŝalta signalo**	Signalo, pro kies efiko cirkvito aŭ parto de cirkvito malfunkciiĝas.	
359.	**malŝalta tempo**	Bezonata tempo, dum kiu la trafluanta kurento nuliĝas. (Se la ŝaltilo estas elektronika, je malŝalto la kurento ne nuliĝas tute.)	
360.	**malŝalti**	Malfunkciigi cirkviton, aparaton, maŝinon ktp.	
361.	**emajlita drato**	Kuprofandaĵo kovrita kun speciala lako. Ĝi estas uzata ĉefe por volvaĵoj.	

362.	**emaniga diagramo**	Montras la radiad-intenson de la anteno rilate al la direkto.	
363.	**emaniga rezistanco**	Kalkulebla el la disradiita povumo kaj el la antenkurento. $$R_r = \frac{P_r}{I^2_{maks}}$$	
364.	**emanigi**	Disradii elektromagnetajn ondojn.	
365.	**emanigilo**	Parto de anteno, kiu disradias la elektromagnetajn ondojn.	
366.	**emanigo**	Disradiigo de la elektromagnetaj ondoj.	
367.	**emisii**	Eligi lumon.	
368.	**emitera ripetilo**	Amplifatoro el dupolara transistoro, kies elira signalo ripetas la ŝanĝon de emitero.	emiter-ripetilo
369.	**emitero**	Elektrodo de transistoro, el kiu venas la dominaj ŝargoportantoj, *emitas* elektronojn. Kompare al tiu elektrodo estas mezurata la biastensio de la bezo.	
370.	**emiti**	Eligi elektronojn.	
371.	**energia transformado**	La energio estas trovebla en diversaj formoj. Se estas bezonata ŝanĝi la energion inter la tipoj, tiam oni parolas pri energiotransformado. La procezo ĉiam havas malpli ol 100%-an rendimenton. La rendimento estas la kvociento de la elira kaj la enira energioj.	
372.	**energio**	Fizika forto, kapabla je iu laboro. Ĝia unuo estas la JOULE (ĵulo) [J]. La povumo estas la eluzata energo dum decida tempo - (J/sekundo), alinome Wato [W].	
373.	**enira inpedanco**	Kvarpolusa propreco ĉe la eniro, kiu reprezentas kompleksan rezistancon kontraŭ alterna kurento.	
374.	**enira kapacito**	Kapacito, kiu estas mezurebla ĉe la enira flanko de kvarpoluso.	
375.	**enira transformilo**	Transformilo por alĝustigi impedancon al la eniro de kvarpoluso.	
376.	**eniro**	Flanko de kvarpoluso, al kiu estas konektita la prilaborenda signalo aŭ, al kiu estas kuplita la eliro de la antaŭa ŝtupo.	
377.	**enmetaĵo**	Ŝanĝebla parto de la fandgardilo, kies metalfadeno fandiĝas pro la superkurento.	

378.	**enodo**	Elektronika tubo kun sep gridoj, havanta tiu entute naŭ elektrodojn. Ĝi estis evoluigita por frekvenco-demodulilo. Hodiaŭ jam ne estas uzate.	
379.	**ŝalta superŝarĝo**	Tiu pliintensa ŝarĝo, kiu estiĝas je la ŝalto de cirkvito, kiam la cirkvito enhavas tia(j)n konsistero(j)n, kies rezistanco estas malgranda komence de la kurentofluo. Ekz., ampolo je la ŝalto havas malgrandan rezistancon, ĉar ties filamento je la komenco ne ardas. Se en cirkvito estas kondensilo paralelkonektita, ties propreco simile okazigas ŝaltan plišarĝon.	
380.	**ŝalta tempo**	Tempo, kiu estas bezonata por atingi la maksimuman intenson de la trafluanta kurento.	
381.	**ŝalti**	Ekfunkciigi aparaton aŭ cirkviton certigante la fluon de kurento kun la konektado de la nutrotensio.	
382.	**envelopo**	Parto de la elektronika tubo, kiu ĉirkaŭas la internan parton, kaj en kies interno estas vakuo aŭ gaso. Ĝi estas produktata plejofte el vitro.	
383.	**epitaksio**	Kreskigitaj tavoloj unu super la alia, en la duonkonduktila fabrikado. Estas uzata ekz., ĉe la produktado de transistoroj, kiuj tipoj estas tre kapablaj por altfrekvencaj signaloj.	
384.	**eraro (funkcia)**	Neĝusta funkciado.	perturbo
385.	**erarsignalo**	Signalo, kiu estiĝas en tiu okazo, kiam estas eraro en la funkcio. Ĉi tiu signalo, aŭ aŭtomate kompensas la efikon de eraro, aŭ nur simple indikas por la uzanto la ĉeeston de la eraro.	
386.	**EREPROM**	(***Elektre REP**rogramebla **ROM***). La uzanto povas forigi la informojn kaj programi elektronike la memorilon.	
387.	**estinga tiristoro**	Helpanta tiristoro, kies ŝalto malŝaltas (estingas) la ĉeftiristoron.	helptiristoro
388.	**etalono**	Aŭtenta mezuro kaj norma ekzemplero de iu mezurunuo. Originalo, al kiu estas komparataj la pli postaj elementoj, cirkvitoj, aparatoj ktp.	
389.	**eta tensio**	Ne pli granda ol 50V.	
		F	
390.	**faksimila eliro**	Nombro, kiu tion montras, ke la koncerna elirejo de diĝita cirkvito, kiom enirejojn ĝi estas kapabla funkciigi.	*faks-eliro* (angl. fan-out)

391.	**faksimila eniro**	Nombro, kiu tion montras, ke la koncerna enirejo de diĝita cirkvito, al kiom da elirejo povas konektiĝi sen misfunkcio.	*faks-eniro* (angl. fan-in)
392.	**faksimila sendilo**	Bildotelegrafio por ne altkvalita dokument-sendo.	*faks-sendilo*
393.	**fado**	Fenomeno ĉe tiuj radioondoj, kiuj trairas la jonosferon. La jonosfero influas la disiĝon de la radioondoj, eĉ povas tiujn tute reteni kaj povas ŝanĝi la polarizecon. La fadon okazigas krome ankaŭ la fazdiferenco inter la alventantaj rektaj kaj reflektaj ondoj. (PIV: Fenomeno, konsistanta el sinsekvaj plimalfortiĝoj aŭ plifortiĝoj de aŭdebleco en radioriceviloj.)	
394.	**fandogardilo**	Protektilo kontraŭ la superkurento. Ĝia metalfadeno fandiĝas kaj tiel diskonektas la cirkviton de la nutrotensio aŭ de la ŝarĝo.	
395.	**fantombildo**	Sur la ekrano aperanta pala bildo apud la normala bildo.	
396.	**Faraday-efekto**	Tiu fenomeno, kiam la polarizeco de la radioondoj ŝanĝiĝas trairante la jonosferon. Oni kutimas nomi ĉi tiun fenomenon ankaŭ Faraday-rotacio.	
397.	**Faraday-kaĝo**	En la kaĝo ne estas elektroŝargo, ĉar la ŝargoj klopodas lokiĝi sur la randon. Tiel la kaĝo estas aplikebla por *kontraŭelektra ekranado*. Estas uzate tie, kie oni volas fari precizan mezuradon, tiel eviti la eksteran influon elektrostatikan al la instrumentoj. Ĉi tiu maniero ne estas efika kontraŭ la magneta kampo.	
398.	**Faraday-tezoj**	Estas konataj du tezoj. 1. – En konduktilo movanta en magneta kampo (aŭ staranta konduktilo en movanta magneta kampo) estiĝas kurento, kies intenso proporcias kun la rapideco de movo kaj kun la intenso de magneta kampo. 2. – En elektrolito la amaso de la eligita materio proporcias kun la intenso de la trafluanta kurento kaj kun la elektrokemia konstanto de materio.	
399.	**farado**	Unuo de la kapacito. Se kondensilon la tensio variiĝas kun 1V-o dum 1 sekundo kaj estiĝas 1A kurento, tiam la kapacito de kondensilo estas 1F (farado). Ĉi tiu estas tre granda valoro, tial en la praktiko ne estas uzata. En la praktiko estas uzataj unuoj: [µF] mikrofarado [nF] nanofarado	

		[pF] pikofarado	
400.	**faska tetrodo**	Tian strukturon havanta tetrodo, en kiu tiel densiĝas la elektronoj, atingantaj la anodon, ke tiuj repuŝas la sekundarajn elektronojn.	
401.	**fasko**	En malgranda sekco amasiĝantaj elektronoj, disradiataj ondoj.	
402.	**fazangulo**	Montras la fazdiferencon ĉe geometrie reprezentataj signaloj, se tiuj ne estas en sama fazo.	
403.	**fazkomparilo**	Cirkvito por kompari la situon de du signaloj.	
404.	**fazkomparo**	Ecaro por kompari la situon de du signaloj.	
405.	**fazkonduktilo**	Tiu konduktilo en la publika alttensia reto, kiu ne estas terumita. La konduktilo havas potencialdiferencon rilate al la tero kaj al la terumita nulkonduktilo.	
406.	**fazkorektado**	Maniero por kompensi la neagan povumon.	fazrilat-bonigo
407.	**fazkorektiga kondensilo**	Ilo por realigi la fazkorektadon. La kondensilo estas konektita paralele al la konsumanto.	
408.	**fazmaŝo**	Rekuplita cirkvito, en kiu kun la helpo de la fazmaŝo oni povas produkti signalojn ĝustigeblajn kun altfrekvenca stabileco. (PLL cirkvito laŭ la angla akronimo.)	frekvenco-sintezo
409.	**fazmodulado**	Modulado, kiam la portanta ondo havas stabilan amplitudon kaj frekvenco-valorojn, sed la fazo de oscilado variiĝas laŭ la moduliga signalo.	
410.	**fazo**	La momenta situacio direkta kaj intensa de la alterna kurento. Potencialhava konduktilo en tiu sistemo, kie la alia (nulkonduktilo) estas terumita. La fazkonduktilo, laŭ la sistemo povas esti, pli ol unu. Plej ofte tri.	
411.	**fazrilat-bonigo**	Tiam estas la plej efika la povum-transportado, kiam la tensio kaj kurento estas en sama fazo. En la praktiko la kurento rilate al la tensio aŭ malfruas, aŭ devancas. Korekti ĉi tiun defazigon oni kutimas uzi *fazrilat-bonigan* kondensilon.	fazkorektado
412.	**faztensio**	Potencialdiferenco, kiu estas mezurebla sur la fazkonduktilo rilate al la nulkonduktilo.	
413.	**ferito**	Estas speciala materio polvostruktura, uzata tiu kiel ferkerno por grandigi la *memindukton* de la bobenoj. Ĝi havas grandan *permeablon,* la relativa permeablo estas $\mu_r >> 1$. La ferito elektre estas izolanto,	

		sed ĝia *magneta konduktanco* estas tre granda, kaj pro la polvostrukturo ne kreiĝas en tio *kirlokurenta perdo*.	
414.	**feritringo, ferittubo**	Tre malgranda ferito, kiu kapablas filtri la radiofrekvencajn kurentojn surmete la konduktilon. Estis speciala uztereno la komputila *storelemento*.	
415.	**ferkerno**	Speciala kunfandaĵo el metaloj, kiun enmetante en bobenon, ties meminduko grandiĝas. Estas uzataj lamenaj kaj polvostrukturaj ferkernoj. La grandiĝo de la memindukto dependas de la permeablo de la ferkerno.	
416.	**ferma kontaktilo**	Kontaktilo en tia pozicio, kiam povas kondukti kurenton.	
417.	**fermodirekta kurento**	Kurento fluanta en tiu okazo, kiam sur la duonkonduktilo estas konektita tensio tiel, ke tiu tensio povas krei malplenigitan tavolon.	retrokurento *fermokurento*
418.	**fermodirekta tensio**	Tensiodirekto, kiu povas krei en duonkonduktilo malplenigitan tavolon. Kreiĝas pro tio tia tavolo, ĉar la truoj komencas movi al la negativa, la elektronoj al la pozitiva poluso de la ekstera tensio. En ĉi tiu stato de duonkonduktilo kurento ne fluas tra ĝi.	retrotensio *fermotensio*
419.	**FET-o**	Kamporegata transistoro. En ĉi-tipaj transistoroj la regado okazas per elektra kampo. Grava propreco de FET-oj estas ties tre granda enira impedanco, tiel ne bezonas povumon la regado. Laŭ la strukturo estas konataj diversaj tipoj, kiel estas: JFET, MOD-FET, VMOD-FET.	
420.	**fidro**	Nutrokonduktilo. Konduktilo, kiu alportas la elektran energion (kurenton) al la konsumanto(j).	lineo
421.	**fiksa kontaktilo**	Kontaktilo de ŝaltilo, kiu ne moviĝas dum ŝalto.	nemovebla kontaktilo
422.	**filamento**	Maldika drato el speciala metalo, kiu eligas varmon, lumon aŭ elektronojn, kiam trafluas ĝin kurento.	
423.	**filtrilo**	Cirkvito, kiu traformas la elektrajn signalojn, mildige la bruotension de bornotensio (ebenigas ĝian ondecon), baras difinitajn frekvencojn, tiel selektige la traigitajn frekvencojn. Tiuj filtriloj, kiuj havas nur pasivaj konsisterojn, ne konsumas kurenton por la funkciado, sed okazigas perdon. Tiuj, kiuj estas konstruitaj el aktivaj elementoj bezonas kurenton por la	selektilo, selektoro

		funkciado, sed povas ankaŭ amplifi.	
424.	**finamplifatoro**	En multŝtupa amplifatoro estas la lasta ŝtupo, kies eliro jam konektiĝas al la ŝarĝilo, konsumilo.	
425.	**finpozicia ŝaltilo**	Sekuriga ŝaltilo por haltigi la funkcion antaŭ la danĝera pozicio de movanta maŝino.	
426.	**finŝtupo**	Ĉe multŝtupa amplifatoro estas tiu ŝtupo, al kiu estas konektita la konsumilo aŭ ŝarĝilo.	
427.	**flankzono**	Apud la portanta ondo ambaŭflanke trovata zono, kies larĝeco estas difinita.	
428.	**fleksa disko**	Portebla storilo diskoforma por komputilo. (Nur mem la datenportilo havas disko-formon, la tuta storilo kun la portanta ujo havas kvadratformon.)	flopio
429.	**fleksigebla kablo**	Kablo, kiu povas elteni multajn kurbigojn sen disrompo. Tiun kablon kurbige ĝi ne restas en tia formo.	*fleksa kablo*
430.	**flopo**	Cirkvito havanta du statojn. La unustabila flopo (*monoflopo*) havas regatan staton nur dum decida tempo, post kiu tempo ĝi reŝaltas en la bazan staton. La dustabila flopo estas tia flopo, kies staton ĝi tenas ĝis la reregado (restatigo), tiel havante du stabilajn statojn.	
431.	**flueca kristalo**	Organika fluaĵo, kiun oni uzas por diĝitaj indikiloj. Tiu fluaĵo enhavas longajn molekulojn kaj en elektra kampo perdas sian diafenecon. Grava avantaĝo de tiu indikilo, ke dum la regado ĝi ne konsumas kurenton.	
432.	**fluidigilo**	Por lutado uzata helpmaterio, kiu solvas la makulojn, oksidojn sur la surfaco de ligendaj metalpecoj kaj defendas kontraŭ la plua oksidiĝo.	
433.	**flukso**	Nomo por reprezenti la fortecon de la elektra aŭ magneta kampo. Vektora dateno, esprimante la densecon kaj direkton de la fortolinioj. Ĝia mezurunuo estas la *Teslo*, 1T=1Vs/m^2. Ekzistas alia mezurunuo, kiu estas la *Gaŭso* „G”, kiu egalas kun 1-fortolinio/cm^2. La simbolo de la flukso estas la greka litero *fio* „*Φ*”.	
434.	**fluksomezurilo**	Instrumento por mezuri la fortecon de la magneta kampo. Oni kutimas nomi tiun ankaŭ *gaŭsmezurilo*.	
435.	**fluktua kurento**	Ekz., tiu kurento, kiu estas preparita el alterna kurento per dutakta rektifilo. Ties	

		momenta intenso senhalte ŝanĝiĝas.	
436.	**fortokampo**	**La fortokampo reprezentas tiun spacon, en kiu estas efike laborkapabla la kampon kreinta energio.** La elektroŝargoj kreas *elektran kampon* ĉirkaŭ si mem. La elektra kampo estas *fortokampo*, kiu signifas tion, ke enmete elektroŝargon en ĉi tiun fortokampon, al la elektroŝargo impresas diversintensaj kaj diversdirektaj fortoj.	
437.	**fortokurenta lineo**	Kablo aŭ drato, kiu transportas elektran energion.	
438.	**fotoĉelo**	Oni nomas *fotoĉelo* tiun vakuohavantan, aŭ gasplenigitan elektronikan tubon, kiu eluzas la fotoelektran impreson. La fotoĉeloj estas diversigitaj al tri tipoj laŭ la funkcia sistemo. 1, Fotoemisia fotoĉelo, en kiuj pro la lumo el la fotokatodo elektronoj elpaŝas. 2, Internajn lumefektojn eluzantaj fotoĉeloj, kies konduktanco variiĝas depende de la lumointenso. Ĉi-tipajn konsisterojn vi jam povis studi ĉe la rezistiloj. 3, Fermtavola fotoĉelo (*fotopilo),* en kiuj pro lumo estiĝas potencial-diferenco, do tensio. Ĉi-tipan konsisteron vi jam povis studi ĉe la kurentofontoj.	
439.	**fotoelektra**	Pro luma impreso kreita kurento.	
440.	**fotokuplo**	Tiu signaltransporta maniero, kiam la elektran signalon oni transformas al lumo kaj en la sekvanta ŝtupo tiu estas retransformata. Inter la du ŝtupoj ne estas galvana kontakto.	
441.	**fotopilo**	La *fotopilo* estas tia kurentofonto, kiu el la lumenergio rekte produktas elektran energion.	sunĉelo
442.	**fotorezistilo**	Estas duonkonduktilo sen *ferma junto*, kies rezistanco dependas de la allumigado.	(Lum-Dependa Rezistilo, **LDR**).
443.	**fototelegrafio**	(PIV: Sistemo de transsendado de bildoj per telegrafio.)	
444.	**fototransistoro**	Speciala silicio-transistoro, kiu havas lumigeblan bezkolektor-junton. Vere la sentiveco de la fotodiodo estas intensigebla kun la transistor-impreso.	

445.	**framo**	Komplekso de tiu parto de maŝino, aparato, instalaĵo, kiu dum funkciado normala estas izolita de la tensiohavantaj partoj. Ties funkcio estas la kovrado, tenado certigi mekanikan stabilecon.	
446.	**frekvenco**	Ĉe periodeca signalo estas la ciklonombro dum decida tempo. Temas pri tio, kiom direktoŝanĝon faras la fizika fenomeno (nun temas nur pri kurento, tensio) dum unu sekundo al sama direkto. Ĝia simbolo estas la minuskla „f", kaj la mezurunuo estas la herco [Hz]. 1Hz signifas tion, ke la unu ciklo okazas dum unu sekundo. La reciproka valoro de frekvenco estas la *periodo*.	ofteco *freko*
447.	**frekvencobendo**	Frekvencointervalo, en kiu povas funkcii sendatoroj. La plej konataj estas: **L**ong-**O**nda (LO), **M**ez-**O**nda (MO), **K**urt-**O**nda (KO), **U**ltra-**K**urt-**O**nda (UKO). Estas uzataj diversaj televidaj, radio-amatoraj kaj aliaj industriaj radio-ondolongoj, apartenantaj al diversaj frekvencobendoj.	
448.	**frekvenco-demodulilo**	Demodulas la frekvencomodulitajn radiosignalojn. Ĉi tiu cirkvito ne sentivema estas por la variiĝo de amplitudo. Ĝi estas uzata plejofte en la **U**ltra-**K**urt-**O**nda intervalo.	
449.	**frekvencodependa inversa retrokuplo**	Nur ĉe decida frekvencobendo estas efika la retrokuplo.	
450.	**frekvenco-divido**	Cirkvito, kies elira frekvenco estas grave malofta, ol la enira.	
451.	**frekvenco-duobligilo**	Amplifatoro, kies eniro estas agordita al decida frekvenco, kaj la eliro al ties duoblo. La laborpunkton devas tiel elekti, ke la amplifeco ne estu lineara.	
452.	**frekvenco-ecaro**	Datenaro karakteriza la aparaton rilate al la traigo de frekvencobendo.	
453.	**frekvenco-kalibrilo**	Tiu estas uzata por aŭtentigo de aparatoj, kreante senmodulitajn, treprecizajn oscilojn je decida frekvenco. Tiu oscilo estas nomata *markero*. La bazoscilatoro plejofte estas kristalreganta, stabiligate en termostato.	
454.	**frekvenco-komparilo**	Aparato (cirkvito), kiu komparas du frekvencojn kaj indikas ties diferencon. Per tiu diferenca frekvenco eblas regi la oscilatorcirkvitojn, tiel certige la stabilan frekvencon.	
455.	**frekvenco-kompensado**	Preferas decida(j)n frekvenco(j)n traigi aŭ reteni en diversaj cirkvitoj, ekz., en amplifatoto. La kompensadon povas realigi	

		per kondensiloj kaj bobenoj, sed tiuj enhavus ankaŭ rezistilojn. Krom la pasivaj konsisteroj estas uzata ankaŭ analoga (operacia) amplifatoro.	
456.	**frekvenco-konvertado**	Foje estus bezonate modifi la *inter-portantan frekvencon* de modulita signalo, sen tio, ke la modulacio ne ŝanĝiĝu. Tion oni faras tiel, ke la inter-portantan frekvencon miksas kun la signalo de la loka oscilatoro ricevante, kaj la diferencon, kaj la sumon de la du frekvencoj. Tiu konvertado estas uzata ekz., en la *superheterodinaj radio-ricevatoroj.*	
457.	**frekvenco-konvertilo**	Suplementa cirkvito antaŭ la ricevatoro, por certigi la ricevon de tiu frekvencobendo, kiu situas ekster la ricevebla ondolongo. Laŭ la konstrukto ĝi konsistas el oscilatoro kaj miksilo.	
458.	**frekvencometro**	Mezurilo por decidi la oscilonombron. Hodiaŭ jam ĝenerale uzataj la ciferecindikilaj, diĝitteknikaj mezuriloj.	frekvencomezurilo
459.	**frekvenco-migrado**	La resona frekvenco de oscilatoro variiĝas hazarde. Tiun frekvenco-malstabilecon okazigas la valormodifiĝo de la konsisteroj.	defrekvenciĝo
460.	**frekvenco-modulado**	La sendata informenhavo modifas la frekvencon momentan de la interportanta ondo. La plej simpla maniero fari frekvencomoduladon estas variigi la resonancan frekvencon de la oscilatoro kun la modulanta signalo. Per la frekvencomodulado la sondissendo estas plikvalita, ol tiu per amplitudo-modulado.	
461.	**frekvenco-multobligo**	Cirkvito, kiu produktas entjerajn multoblajn frekvencojn de la bazondo. Ĝia funkcia principo baziĝas sur la apliko de nelineara konsistero, kiu produktas superharmonojn.	
462.	**frekvenco-regulilo**	Permane manipulebla konsistero aŭ cirkvitoparto, kiu aŭtomate regas la frekvencon de oscilatoro.	
463.	**frekvencoresonanco de anteno**	Mezurata frekvenco, kiam la reaktanco estas nulo ĉe la fidro(konekto)punkto de anteno.	
464.	**frekvencostabileco**	Kiel mallarĝa la balanco de la frekvenco de iu oscilatoro, tiel pli bonkvalita la cirkvito.	
465.	**frekvencotraigo**	Frekvencointervalo inter la plej alta kaj la plej malalta frekvencoj, kie la traigata signalo jam havas –3dB-an malintensiĝon. Estas karakteriza dateno pri amplifatoroj, filtriloj, laŭtparoliloj ktp.	

466.	**frotilo**	Komutil-konektilo al rotoro en rotaciaj elektraj maŝinoj: motoro, generatoro, dinamo. Oni fabrikas tiun el karbobaza materio aŭ el bronzo.	
467.	**F-tavolo**	Jonigita tavolo en la supra parto de la tera jonosfero. Ĝia alteco estas inter 160÷420km. Ĉi tiu tavolo helpas la granddistancan radiodisendadon. Dumtage tiu tavolo konsistas el du partoj: F1 estas la malsupra parto, F2 estas la pli supra. Dum nokto la F1 parto malaperas ĝenerale. La F-tavolo la plej grandan jonigitan nivelon enhavas dum posttagmezo. Kiam okazas forta sunmakula aktiveco, tiam la F-tavolo ne malaperas dum nokto.	
468.	**fulmo**	Natura fenomeno kun grandega eklumo kaj tondro fortega, kiam la amasiĝintaj elektraj ŝargoj trairas la aeron al la tero.	
469.	**fulmoforigilo**	Speciala anteno terumita por kapti la fulmon kaj ties kurenton kondukti en la teron.	fulmokonsumilo, kontraŭfulma defendilo
470.	**fulmotrafo**	Povas okazi, ke la fulmo ne rekte la teron trafas, sed tuŝas objekton aŭ vivan organismon, ekz., eĉ homon.	fulmobato, fulmofrapo
471.	**funkcia maniero**	Reĝimsistemo.	
472.	**funkcia skemo**	Funkciadon laŭtakte montranta diagramo.	procezo-diagramo
473.	**funkcia temperatur-intervalo**	Minimuma kaj maksimuma temperaturoj, inter kiuj la cirkvito, aparato povas funkcii sen perturbo.	
474.	**fuŝkontakto**	Kontakto inter du kontaktiloj, kiam la trapasa rezisto estas grave pli granda ol tiu de normala funkciado.	*aĉa kontakto*
		G	
475.	**gajno**	Grandiĝo-kvanto de la tensio, kurento aŭ povumo. Estas esprimeble kun la proporcio de la enira kaj elira signaloj.	
476.	**galeno**	La galeno estas natura kristalo (plumb-sulfuro). Ĝi estas ofta materio. Ĝi estas duon-konduktilo. Kristalo por detekti radioondojn.	
477.	**galvana**	(PV: Rilatanta al elektra kurento produktita de pilo aŭ al io produktata de tia kurento.)	
478.	**galvana kuplo**	Okazas, kiam la ŝargoportantoj moviĝas rekte (senpere) tra konduktilo inter du cirkvitopartoj.	
479.	**galvanizi**	(PIV: Surkovri ion per maldika tavolo de metalo helpe de elektroliza kontinua	

		kurento.)	
480.	**galvanometro**	Kurentomezurilo tre sentiveca, kies nadlo estas meze en baza pozicio, tiel ankaŭ la direkton de kurento povas indiki.	
481.	**gardilo**	Ilo, kiu servas la protektadon de la tensioreto aŭ nutrilo. Je kurtcirkvito, aŭ superŝarĝo malŝaltas la cirkviton de la kurentofonto. Estas du tipaj laŭ la konstrukto, tiel oni diferencigas *fandgardilon* kaj *aŭtomatan gardilon*. En la fandgardilo estas ŝanĝebla la enmetaĵo, la aŭtomata estas reŝaltebla. Laŭ la funkciorapideco oni diferencigas rapidan kaj lantan tipojn.	
482.	**gaskondukto**	Pro sufiĉe granda tensio jonigiĝas la gaso, kiu en tia stato povas kondukti kurenton.	
483.	**Gaŭso**	Mezurunuo por esprimi la densecon de la magneta flukso. 1[G] (Gauss) egalas kun unu fortolinio en unu cm^2.	
484.	**gazotrono**	Kun hidrargvaporo plenita elektronika tubo (diodo), estas uzebla por malgranda tensio, maksimume $U_{a\text{-}k}$=15÷16V. Por granda povumo la gazotrono estas pli efika ol la vakua diodo.	
485.	**generatoro**	Signalfonto, kiu estas uzata plivaste por kurentofonto. La produktata signalo, kurento estas alterna.	
486.	**giĉeto**	Kluzelektrodo de tiristoro, triako kaj FET-oj.	
487.	**giratoro**	Kvarpoluso, kiu imitas grandvaloran indukton farante impedanco-transformadon, kiu indukto bobene estus malfacile realigebla.	
488.	**glatiga kondensilo**	En nutrilo uzata kondensilo, kiu plu glatigas la ondecon krom la bufrokondensilo de la bornotensio.	
489.	**glimkondensilo**	Strukture similas al la paper-kondensilo, sed ties dielektro inter la elektrodoj estas *glimo.* La glimo havas pli bonajn elektrajn proprecojn ol la papero.	
490.	**goniometro**	Aparato por konstati la radiodirekton. Tiu aparato ne havas turnigeblan antenon, sed du apartajn antenojn, kies signalojn kompare laŭ la fazangulo inter tiuj oni povas difini la direkton.	
491.	**gramofono**	Aparato por reprodukti la muzikojn, voĉojn de la sondiskoj.	

492.	**granda tensio**	Pli alta ol 600V inter la fazkonduktilo kaj la tero kaj pli alta ol 1000V inter du fazkonduktiloj.	alttensio
493.	**grec-ponto**	Dutakta rektifilo, kiu kvar diodojn havas.	grec-kvadrato
494.	**gridkurento**	Kurento, kiu fluas tra la kluzelektrodo de elektronika tubo. (Pluklarigan mencion vidu ĉe la grido!)	
495.	**grido**	Kluzelektrodo de la elektronikaj tuboj. Ĝi havas formon spiralan en la ĝeneralaj tuboj, sed povas havi alian formon, kiel ekz., en la kineskopoj. **Mencio:** estas pli praktike uzi ĉi tiun esprimon, prenante el la anglo, ĉar la *kluzo* aŭ *krado* en la simboloj mallongaj povas okazigi miskomprenon, ja ankaŭ la *katodo* estas signata kun la litero „*k*". Krome ties mallonga simbolo kongruas kun la jam ĝenerale uzata formo „*g*".	krado, kluzo
		Ĝ	
496.	**ĝekslo**	Speciala ŝaltilo multpozicia, kiun oni funkciigas kun turnado.	ŝtupŝaltilo rotacia
497.	**ĝemel-bobenoj**	Du bobenoj de relajso, kies elektraj datenoj estas egalaj.	
		H	
498.	**halioefekto**	Pro ekstera magneta efiko ŝanĝiĝas la movdirekto de la ŝargoportantoj.	Hall-efekto
499.	**haliogeneratoro**	Duon-konduktanta konsistero, kiu generas tension laŭ la efiko de Hall.	**HALL**-generatoro, haltoro
500.	**HAM**	**H**azarde **A**kirebla **M**emorilo. Kaj skribebla, kaj legebla storo.	**RAM** (el la anglo) *Mi devas mencii, ke la **RAM** akronimo por esprimi memorilon skrib- / legeblan, estas falsa. Certe tio okazis pro la neĝusta traduko el la angla (**R**andom Acces **M**emory), kiu vere esprimas tian memorilon, en kiu oni povas **rekte, laŭ volo** atingi ajnan storoĉelon. Tiel eĉ la **ROM** memorilo povas esti ankaŭ **RAM** memorilo. La **ROM** estas precize uzata el la angla (**R**ead **O**nly **M**emory).*
501.	**harmonenhavo**	Krom la bazfrekvenca signalo ĉeestantaj superharmonaj signaletoj.	
502.	**harmono**	Ĉiu elektromagneta oscilo havas krom la bazfrekvenco superharmonojn, kiuj havas multobligajn frekvencojn de la bazsignalo. La ideala sinusondo ne havas harmonojn. Tia ondo en la praktiko ne estas realigebla.	

		La plej multajn harmonojn havas la ortangula signalo.	
503.	**hejtotensio**	Tensio, kiu estas konektata al la filamento de elektronika tubo.	
504.	**heksodo**	Seselektroda elektronika tubo havanta du kluzelektrodojn (g_1, g_2). Ĝia malavantaĝo, ke ne povas nuligi la fenomenon de la sekundara emisio.	
505.	**helica-anteno**	Uzata en **U**ltra-**K**urt-**O**nda bendo. Ĝi konsistas el unu spiralforma radiilo kaj unu platforma reflektoro. La ĉefa radiaddirekto de tiu tipa anteno kongruas kun la aksodirekto de spiralo. La elradiitaj ondoj havas rondpolarecon.	spiral-anteno
506.	**helica reostato**	Por la plipreciza variebleco ĝia akso estas multfoje turnigebla.	
507.	**helprelajso**	Ekz., kiam ŝaltilo ne povas rekte kontaktigi intensan kurenton, tiam oni uzas inter la cirkvito kaj la ŝaltilo helprelajson.	peranta relajso
508.	**Henro**	Mezurunuo de indukto, kies simbolo estas [H]. 1H (Henry) egalas kun tiu indukto, en kiu estiĝas 1V tensio se la kurento ŝanĝas unu amperon dum unu sekundo. Por la praktiko tiu 1H estas tro granda kvanto, tial estas uzataj dividitaj unuoj, kiel la milihenro [mH], mikrohenro [µH], nanohenro [nH]. La dividanta numero inter la unuoj estas 1000.	
509.	**heptodo**	Elektronika tubo havanta sep elektrodojn. Ĝia kvina grido (g_5) estas bremsogrido, konektita al katodpotencialo. En ĉi tiu tubo la sekundara emisio estas nuligita.	pentagrido
510.	**Herco**	Mezurunuo de frekvenco, kies simbolo estas [Hz]. 1Hz (Hertz) estas tiu periodeco, kiu faras unu ciklon dum unu sekundo. En la praktiko ankoraŭ estas uzataj ties multobligaj valoroj, kiel la kiloherco [kHz], megaherco [MHz], gigaherco [GHz]. La multobliga numero inter la unuoj estas 1000.	
511.	**heterodino**	1. Generatoro produktanta senhaltajn oscilojn. 2. Funkcia sistemo de radio-ricevatoroj. La enira portanta ondo estas miksita kun la signalo de la loka oscilatoro.	
512.	**hibridcirkvito**	Por speciala funkcio fabrikita cirkvito kunhavanta tiu, kaj pasivajn, kaj aktivajn konsisterojn en sama kapsulo.	
513.	**hidrargvapora lampo**	La baza lumfonto estas la interna	

		kvarclampo hidrargvapora, kiu povas funkcii sen la ekstera vitrobalono, kaj havas karakterizan bluan kvarclumon. La kvarctubo eligas krom la kvarclumo ankaŭ nevideblan *ultraviolan* radion, kiu ekscitas la polvotavolon lumeligan sur la interna flanko de la ekstera vitrobalono. Ĉi tiu videbla lumo miksiĝas kun la kvarclumo kaj tiel estiĝas la finpretiga lumfenomeno. La hidrargvapora lampo estas kapabla funkcii dum 10000 horoj kaj povas estigi tre intensan lumon. Pro tiaj proprecoj ĝi estas uzata plejofte en la surstarta lumigado.	
514.	**hifia**	Altkvalita sonfrekvenca amplifatoro, plenumanta la preskribon de la normo DIN-45500. La traiga bendolarĝo de ĉi-tipa aparato estas 40Hz÷12,5kHz. (Mi nur mencias, ke la vere altkvalitaj amplifatoroj povas traigi frekvencojn inter 20Hz÷20kHz.)	**HI-FI**
515.	**histerezo**	Valorintervalo. (PIV: Fenomeno konsistanta en tio, ke, kun ŝanĝo de la cirkonstancoj, nova ekvilibro estiĝas malrapide.)	
		I	
516.	**ignitrono**	Alttensia kaj intenskurenta rektifilo, kies katodo estas hidrargo kaj tiam konduktas, kiam la anodo estas pozitiva. La anodo povas esti fero aŭ grafito. La konduktadon startigas kluzelektrodo preparita el silicio-karbido, etendiĝanta tiu 2÷5mm-ojn en la hidrargon. La startiga tensio estas variebla inter 60÷150V pozitiva rilate al la katodo. Pro la intensa varmoproduktado ĉi-tipa rektifilo bezonas daŭran malvarmigon.	
517.	**imerto magneta**	Pli precize, *imerto de la magneta kampo* similas al tiu de la maso. La konektitan tension sur bobenon (induktilo) la trafluanta kurento sekvas nur iomete malfrue. Do, en induktilo la kurento *malfruas* rilate al la tensio.	
518.	**impedanc-alĝustigo**	Alternkurenta cirkvito tiam funkcias en bona rendimento, se la nutrilo kaj la konsumilo havas saman impedancon.	impedanc-adaptigo
519.	**impedanco**	Rezistanco kompleksa kontraŭ alterna kurento. La rezistanco konsistas el du partoj, kiuj estas la reaktanco kaj la oma rezistanco. La parto reaktanca povas esti kapacita kaj/aŭ indukta.	
520.	**impulslarĝa-modulado**	Moduladmaniero, en kiu la informon portas la variiĝo de la impulsolarĝo.	
521.	**impulso**	Abrupta kaj tre kurttempa tensio, aŭ	

		kurento-intensiĝo, havantaj tiuj krutan apikon.	
522.	**impulsogeneratoro**	Aparato, kiu kreas impulsojn por diversaj mezuradoj.	
523.	**impulsoregistilo**	Cirkvito, kiu detektas kaj registras la ĉeeston de impulso-signalo(j).	
524.	**impulsreĝimo**	Funkcia maniero prilaboranta impulso-formajn signalojn.	
525.	**indikilo**	Ilo, per kiu oni povas indiki, aperigi elektran ĉeeston, kvantojn da proprecoj.	indikatoro
526.	**induko**	Magneta efiko, kiu okazigas energio-transdonon.	
527.	**induko-linio**	La induko-linioj ilustras la magnetan kampon. Tiuj linioj estas ĉiam fermitaj grafikaj linioj. La denseco de la induko-linioj dependas de la magneta kampo-intenso.	fortolinio
528.	**induktanco**	Rezistanco de induktilo kontraŭ alterna kurento, depende de ties frekvenco.	
529.	**induktanto**	Generatoro, kiu estas funkciigata per mano. Oni per mano turnadas la rotoron, tiel induktas tension.	induktoro
530.	**indukta retrokuplo**	Efiko, kiu okazigas energioretrokuplon de la eliro de cirkvito per indukto.	
531.	**induktatkerno**	Ferkerno de armaturo preparita el lamenoj.	
532.	**induktato**	Bobeno de la generatoro, kiu donas elektran energion, en kiu indukiĝas tensio.	armaturo
533.	**induktatreakcio**	Reinfluo de la armaturo. La magneta kampo de la rotoro influas la magnetan kampon de la statoro. Tio distordas la armaturan fortokampon, tiel kaŭze ĉe generatoro malintensiĝon de kreita tensio, kaj ĉe motoro altiĝon de la rivolunombro.	
534.	**induktatŝafto**	Akso de la rotora armaturo.	
535.	**induktilo**	Konsistero, kiu havante indukton faras indukon per la trafluanta kurento.	bobeno, volvaĵo
536.	**indukto**	Indukon farkapabla poveco. Kapableco por deponi energion magnetan. Ĝi estas signita kun la litero „L”, kaj havas mezurunuon Henry (Henrio). 1H egalas kun tiu indukto, kiu indukas 1V tension, se la kurento ŝanĝiĝas 1A-on dum unu sekundo. En la praktiko estas uzataj pli malgrandaj unuoj, kiel la: [mH], [µH]	valoro de induktilo

537.	**induktolado**	Lameno de la ferkerno.	
538.	**industria frekvenco**	Frekvencointervalo de 15Hz ĝis 150Hz.	
539.	**inerca efiko**	En oscikvitoj la energio restos ĝis iom da tempo post la malŝalto. La tempo dependas de la kvalito de la oscikvito.	
540.	**influko**	Elektra ŝargodisiĝo en konduktilo lokita en stabila elektra fortokampo.	elektra influenco
541.	**inhibitoro**	Inhibanta cirkvito, al kies inhibiga enirejo la konektita signalo difinas la elirejon, sendepende de la stato de la aliaj enirejoj.	malhelpantilo, malplifortigo
542.	**inkandeska**	Blanke ardanta (metalo).	
543.	**inkandeska katodo**	Katodo, kiu estas hejtata dum la funkciado. Inkandeske la katodo estas kapabla eligi elektronojn pli facile.	
544.	**inkandeska lampo**	Lampo, en kiu la lumfonto estas inkandeska metalo.	Edison-lampo
545.	**instrumento**	Celfunkcia cirkvitaro muntita en skatolon.	aparato
546.	**integratoro**	Integrala cirkvito kombinita kun integrita operacia amplifatoro.	
547.	**integrala cirkvito (ŝtupo)**	Kvarpoluso, al kies eniro konektita tensiosalto (ortangulo) ĉe la eliro aperas integralige. Kiam la enira tensio estas ŝaltita, la elira tensio ne tuj atingas sian maksimuman valoron, sed poste laŭ la tempokonstanto logaritme altiĝas.	
548.	**integrita cirkvito (IC)**	Cirkvito kunmuntita en unu kapsulo sur unu duonkondukta tavolo.	***IC****o*
549.	**intens-kurenta**	Tiel granda kurento-intenso, kiu estas kapabla okazigi elektrokutiĝon al la homa organismo.	
550.	**interfaco**	Parto de cirkvito kaj aparato, per kiu estas certigata la konekto inter la diversaj unuoj.	konektobloko
551.	**interfero**	Reciproka efiko (fortiga aŭ mildiga) de du ondoj renkontantaj. Tiu povas okazigi radioricevadan ĵamon.	
552.	**interfrekvenco**	En ricevatoroj uzata frekvenco, kiu estas efike amplifebla. Tiu estas kreita kun la miksado de la enira alta radiofrekvenco kaj la loka oscilator-frekvenco.	**IF**
553.	**interinduka koeficiento**	Tiu ĉi faktoro esprimas la kapablecon pri induko de elektromagneta energio el unu induktilo en alian induktilon. La interinduka koeficiento estas signata kun la litero (***M***).	reciprokinduka koeficiento

		La interinduka koeficiento en tiu okazo estas 1H (henrio), kiam en bobeno 1A ŝanĝo dum 1 sekundo indukas en la alia bobeno 1V tension.	
554.	**interinduko**	Induko, kiu povas estiĝi inter du induktoj interligaj. La induktoj estas en induka kontakto. Metu unu apud la aliajn du bobenojn tiel, ke la fortolinioj povu kruciĝi!	reciproka induko
555.	**intermita kurento**	Kurento, kiu fluas sendaŭre, nekontinue inter la ŝalto kaj la malŝalto. Ekz., tia estas ankaŭ la kurento unutakte rektifita el unufaza sinusa kurento. La intermita tempo povas okazi laŭ periodo kaj kun pluraj periodoj.	*pulsanta kurento*
556.	**intermita lumo**	Sendaŭra lumado. La intermito estas perioda.	
557.	**interplektita skeno**	Televidteknika sistemo. Kaj en la ikonoskopo, kaj en la kineskopo la elektronradio skanas la ekranon laŭ linia divido. La interplektita signifas tion, ke la skanado okazas ne vice, sur unu post la aliaj linioj, sed alterne la parajn kaj la malparajn liniojn.	
558.	**interportanta frekvenco**	Bazfrekvenco, kiun havas tiu interportanta signalo, kiu ne estas modulita. La modulita interportanta signalo havas frekvenco-bendon.	
559.	**interportanta ondo**	Ondolongo, kiun havas tiu interportanta signalo, kiu ne estas modulita. La modulita interportanta signalo havas bendolarĝecon.	
560.	**interportanta signalo**	Signalo disradiata daŭre, kiu havas stabilan frekvencon, amplitudon kaj fazon. Ĉi tiu signalo estas kapabla porti informacion kun modulado.	
561.	**interrelajso**	Kiam ĉefrelajso ne havas sufiĉan kontaktilnombron, en tiu okazo estas uzata plua relajso, kiu estas funkciigata per kontaktilo de la ĉefrelajso. (Mi mencias, ke en sekurinstalaĵoj la interrelajso estas funkciigata unue, kaj tiu ŝaltas la cirkviton de la ĉefrelajso.)	suplement-relajso (Ne pri helprelajso temas.)
562.	**interrompilo**	Speciala ŝaltilo, kies funkciado havas esencon ĉefe por malŝalti, interrompi la kurentofluon. Estas evidente, ke ĝi faras ankaŭ ŝalton de cirkvito, sed rilate al la aliaj cirkvitopartoj, ĝia ĉefa funkciotasko estas la interrompo.	malŝaltilo
563.	**interspaco minimuma**	Distanco inter la tensiohava tuŝebla konduktilo, kaj iu alia tension nehavanta objekto aŭ terpunkto, kiun distancon la	

		maksimuma tensio ankoraŭ ne povas trarompi.	
564.	**interspaco sekura**	Distanco inter la tensiohava tuŝebla konduktilo kaj la laboristo, kiu dum la agado ankaŭ per laboriloj ne povas proksimiĝi malpli proksime, ol la interspaco minimuma.	
565.	**interŝtupa kuplo**	Kuplomaniero inter la diversaj apartaj cirkvitoj aŭ cirkvitopartoj (oscilatoroj, amplifatoroj, miksiloj ktp.) La kuplo povas esti rekta (galvana), kapacita, indukta aŭ optika. La kapacita kuplo estas uzebla por alterna kurento, la *unudirektan* kurenton deigas. La rekta kuplo estas farita per drato, tiel la *unudirektaj* tensioj de la ŝtupoj estas samnivelaj. La avantaĝo de la rekta kuplo estas la sendependeco de la frekvenco. Ĉe indukta kuplo la *unudirekta* kurento estas izolita.	*ŝtupokuplo, kuplo*
566.	**intertuŝa kontaktilo**	Kontaktilo movanta en ŝaltilo aŭ sur relajso, kiu dum ŝaltado daŭre tuŝas unu kontaktilon ripozan, ĝis kiam la alia kontaktilo jam estas tuŝata. Tiel oni povas sen interrompo ŝalti cirkviton.	
567.	**intervalo**	Bendo inter la minimuma kaj la maksimuma valoroj.	
568.	**inverta amplifatoro**	Amplifatoro, kies enira kaj elira signaloj estas en kontraŭa fazo.	invertilo
569.	**izola interspaco**	La plej malgranda distanco inter du diverspotencialaj punktoj.	
570.	**izolaĵdifekto**	La izolaĵo parte aŭ tute perdas sian propraĵon materian kaj pro tio traigas kurenton senbare.	
571.	**izolaĵo**	Materio, kiu ne povas fluigi kurenton, pli precize nur tre, tre malintense.	izolanto
572.	**izola rezistanco**	Ankaŭ la izoliloj trafluigas kurenton, sed tre malintensan. Ĉi tiu rezistanco estas mezurata en Ω/cm. La bona izolilo havas pli ol 10 miliard Ω/cm rezistancon. Estas grava propreco de la izoliloj la *trarompa tensio*. (Vidu tie!)	
573.	**izola trakonekto**	Ekzemple ringo, kiu traigas konduktilon izolite tra metallameno de kestomuro. Estas fabrikite el vitro aŭ porcelano.	
574.	**izolilo**	Teknikaĵo, kiu estas fabrikita el izolanta materio, por bari la fluigon de la kurento.	
575.	**izolita kablo**	Permantelo ŝirmita metalfadeno. Tiu mantelo estas preparita el izolanta materio,	

		plej ofte el plasto.	
576.	**izoltavolo**	Speciala ($Si0_2$) tavolo en la MOD-FET teknologio inter la kanalo kaj la kluzelektrodo.	
		J	
577.	**jonigo**	Elektra ŝargigo de atomoj kaj molekuloj.	jonizo
578.	**jonkaptilo**	Forigilo de la malefikaj jonoj.	
579.	**jonkondukto**	Konduktiveco pro la joniĝo.	
580.	**jono**	(PIV: Elektre ŝargita formo de molekulo aŭ de atomo, kiu akiris aŭ perdis elektronojn.)	
581.	**junto**	Interspaco de la tavoloj en la duon-kondukantaj konsisteroj.	
		Ĵ	
582.	**ĵakingo**	Speciala konektilingo.	
583.	**ĵakŝtopilo**	Speciala konektilo.	
584.	**ĵamfiltrilo**	Cirkvito, kiu estas kapabla reteni la eteran ĝenon.	
585.	**ĵamo**	Etera ĝeno, kiu malfaciligas la radio-ricevadon.	
586.	**Ĵulo**	(PIV: Unuo de energio en la internacia sistemo de mezurunuoj (SI); simb.: J; difino: 1J=1Nm (energio bezonata por apliki forton de unu neŭtono dum movo de unu metro).	
		K	
587.	**kablo**	Speciala konduktilo, havanta tiu tre multajn tipojn rilate al la dratnombro kaj al la izolada maniero. La konduktanta drato estas fabrikita el aluminio aŭ el kupro.	
588.	**kablobarelo**	Tenilo, kiu portas la volvitan kablon.	
589.	**kablofabriko**	Proceduro, per kiu oni produktas kablon.	
590.	**kablofasko**	Kunbandaĝitaj kabloj.	
591.	**kablofosto**	Kolono, sur kiu estas muntita la kablo.	
592.	**kablokanalo**	Speciala ujo por loki kablon. Tiu estas fabrikita el betono aŭ el metalo por eksteren kaj el plasto por en ĉambron. Uzante kablokanalon ne estas bezonate enterigi la kablon profunden en la teron.	
593.	**kablokerno**	Drato en la kablo.	kablofadeno
594.	**kablokonektilo**	Konektilo por la kablofino.	kablokapo

595.	**kablokoŝo**	Konektilpeco de kablofadeno.	
596.	**kablokovrilo**	Ekstera parto de la izolita kablo. Hodiaŭ jam estas fabrikite plejofte el plasto. Estas produktitaj unutavolaj kaj multtavolaj kovriloj. Por la mekanika stabileco, kaj por la elektra kaj magneta ombrumado, inter la plastaj tavoloj estas uzata aluminia tavolo kaj/aŭ ŝtalrubando.	kablomantelo
597.	**kablokunligo**	Por granda distanco aŭ okaze de kablovundiĝo estas bezonate kunligi kablopecojn.	
598.	**kablomufo**	Ujo por izoli eksteren kablokunligon.	
599.	**kabloskatolo**	Speciala skatolo, en kiu estas kunkonektitaj du aŭ pli multaj kabloj. El tiu skatolo eblas certigi disbranĉon el la ĉefkablo al diversaj direktoj.	
600.	**kablovolvaĵo**	Por transporti longan kablon oni volvas ĝin.	
601.	**kablovundiĝo**	Povas okazi, ke pro diversaj kialoj difektiĝas la kablomantelo, kaj distranĉiĝas la kablofadeno(j).	
602.	**kaĝovolvaĵa rotoro**	Rotoro, kies *konstrukto* (konstruaĵo) enhavas kurtcirkvitojn.	kaĝorotoro
603.	**kalibrigo**	Ĝustigado de iu aparato (plej ofte ties skalo) al iu determinita valoro en certaj punktoj. Aŭtentigigo: mezurado, per kiu estas determinata la mezur-eraro de la aparato. La komparado estas farata al iu norma mezurunuo aŭ aparato.	aŭtentigo
604.	**kalorimetro**	Aparato por mezuri grandajn povumojn super 100W.	
605.	**kama ŝaltilo**	Speciala ŝaltilo, kies kontaktilojn funkciigas diskoj havantaj elstaraĵon, lokitaj tiuj sur la akson.	
606.	**kamerao**	Aparato enhavanta ikonoskopon por skani bildon en la televidila tekniko.	
607.	**kampoforto**	Ekzistas elektra, magneta kaj elektromagneta kampofortoj. Temas pri tiu forto (potenco), per kiu la kampo povas fari laboron. La mezurunuo de elektra kaj elektromagneta kampoj estas la V/m, kaj de magneta kampo estas la G (Gaŭso). En alterna kampo la kampoforto proporcias lineare al la ondolongo kaj reciproke al la distanco. La poveco malgrandiĝas kun la dua potenco de la distanco.	kampointenso
608.	**kampondoj**	Radioondoj, kiuj disvastiĝas rekte kaj povas	

		trapasi la jonosferon.	
609.	**kamporegata transistoro**	Transistorojn, kies kurentojn fluigas nur unutipa ŝargoportanto (elektrono aŭ truo), oni nomas unupolara (*unipola*) aŭ *kamporegata* transistoro. En tiuj transistoroj estas speciala *kanalo*, preparita tiu el duon-kondukta kristalo, kies konduktancon eblas varii kun *elektrokampo*. La elektrokampon povas krei nur tensio konektanta al la *kluzelektrodo*. Ĉar la kreado de elektra kampo ne uzas kurenton, tial la regado ne bezonas povumon, ne ŝarĝas la antaŭan ŝtupon.	**FET**-o
610.	**kapacita kuplo**	Maniero kupli la ŝtupojn en la elektronikaj cirkvitoj. La eliro de la antaŭa ŝtupo konektiĝas (kupliĝas) al la eniro de la sekva ŝtupo per kondensilo. Tiu maniero certigas pluiron nur por la alterna kurento. La *unudirekta* kurento ne povas traflui la kondensilon. Malavantaĝoj de ĉi-tipa kuplomaniero, ke malfacile eblas fari konvenan impedanc-adapton kaj la traigo dependas de la frekvenco.	
611.	**kapacitanco**	Rezistanco, kiun havas la kondensilo kontraŭ la alternaj kurentoj, depende de ties frekvenco.	kapacita reaktanco kapacita rezistanco
612.	**kapacita retrokuplo**	La elira signalo estas parte retrokonektita (retrokuplita) al la eniro de amplifatoro per kondensilo.	
613.	**kapacito**	Estas propreco de kondensilo kaj akumulatoro. Por kondensiloj la mezurunuo estas la Farado [F]. En la praktiko la dividitaj unuoj estas plejofte uzataj, kiel la mikrofarado [µF], nanofarado [nF], pikofarado [pF]. Por akumulatoroj estas uzata mezurunuo la amperhoro [Ah]. La Ah tion montras, kiom maksimuman amperon povas la akumulatoro certigi dum unu horo, apud la nominala tensio.	
614.	**kapaŭskultilo**	Eta parolilo, kiu transformas la alternan kurenton al sono. Plej ofte havas tenilon por fiksi tion sur la kapon aŭ nur sur la orelo(j)n. Estas efike uzi tion en brua medio kaj tiam, kiam oni ne volas ĝeni la ĉirkaŭantajn.	*aŭskultilo*
615.	**kapsulo**	Ujo de konsistero.	kloŝo
616.	**karakterizaj parametroj**	Datenaro signifa de la koncerna konsistero aŭ cirkvito.	
617.	**karboelektrodo**	Pozitivelektrodo en pilo, kiu estas fabrikita el karbo.	

618.	**karbotavola rezistilo**	Rezistiltipo, kies aktiva parto estas elformita el karbo, tavolita sur izolaĵo.	
619.	**kaskada amplifatoro**	Cirkvito konstruita el du transistoroj, el kiuj la unua havas emiterkonekton kaj ties kolektoro estas rekte konektita al la emitero de la alia transistoro, kiu havas bezkonekton. La komplekso havas grandan amplifecon. Tiu konekto estas aplikata plej ofte en ricevatoroj por *preamplifatoro*, amplifi la antenosignalon.	
620.	**kaskadkonekto**	Per du amplifiloj (elektronikaj tuboj aŭ transistoroj) preparita cirkvito, kiu havas grandan amplifecon kaj malgrandan bruon. La unua amplifilo estas en katoda aŭ emitera konekto. (Tiuj estas la komunaj elektrodoj) La anodo aŭ kolektoro de la unua amplifilo rekte konektiĝas al la katodo aŭ emitero de la alia amplifilo. La dua amplifilo estas en krada aŭ beza konekto. (La komuna elektrodo estas la grido aŭ la bezo.) Plejofte estas uzate por *preamplifatoro* de ricevatoroj.	
621.	**katenario**	Trakcia konduktilo por tramo, lokomotivo elektra kaj trolebuso. La maŝinoj prenas la kurenton de la katenario per kurento-deprenilo, pantografo.	
622.	**katjono**	Pozitivŝarga jono.	
623.	**katodo**	Negativa elektrodo de konsisteroj. Tiu elektrodo en la elektronikaj tuboj, kiu eligas elektronojn. La katodo estas bruligata aŭ per filamento aŭ rekte.	
624.	**kaverna resonilo**	Spaco aŭ dielektriko kovrita per metalo, kiun tiel formitan *kavernon* oni ekscitas tra aperturo per maŝo (kuplomaŝo). En mikroonda oscikvito la kaverna resonilo povas atingi tre favoran bonecan faktoron.	
625.	**kilovato**	(PV: Unuo de potenco valoranta mil vatojn.)	**KW**
626.	**kilovolto**	(PIV: Mil voltoj.)	**KV**
627.	**kineskopo**	Bildaperigilo en la televid- kaj mezurilteknikо. (Speciala elektronika tubo por TV-ekrano, *osciloskopo* ktp.)	elektronfaska tubo
628.	**kirlokurento**	Se metallamenon impresas magneta kampo, simile kiel en konduktilo, ankaŭ en la lameno indukiĝas kurento. Ĉar la metala lameno havas tre malgrandan rezistancon, la kurento estas sufiĉe intensa kaj kirlas en la lameno.	
629.	**klaposcilatoro**	Unu specialtipa oscilatoro el inter la	

		Kolpic-tipaj oscilatoroj. En ĉi tia oscilatoro por la akomodo oni aplikas serie agordeblan oscikviton.	
630.	**klavaro**	(PIV: Aro de klavoj por funkciigi aparaton.)	butonaro
631.	**klavo**	Speciala (platforma) butono por manipuli ekz., komputilon.	
632.	**klemaro**	Konektilo, kiu certigas disigeblon por dratoj, konsisterpiedoj ktp.	pluropa klemo
633.	**klemo**	Konektilo, kiu certigas disigeblon por drato, konsisterpiedo ktp.	borno
634.	**kloŝo**	Ujo de konsistero.	
635.	**kluzelektrodo**	Reg-elektrodo. Ĉe elektronika tubo – **grido**. Ĉe transistoro dupolara – **bezo.** Ĉe tiristoro, triako, FET-oj – **giĉeto.**	*kluzo*
636.	**kluzo (logika)**	Diĝita cirkvito por reprezenti iun egalecon de Bul-algebro.	*kluzo diĝita*
637.	**koaksiala kablo**	Speciala altfrekvenca kablo, plej ofte produktata je ondoimpedanco 50, 75 kaj 120 omoj. La interna(j)n konduktilo(j)n ĉirkaŭas plasta izolilo, kovrata per metala plektaĵo, nomata mantelo. Ekstere refoje plasta kovrilo ŝirmas la kablon.	
638.	**kodcilindro**	Sur cilindro preparitaj valoj kaj montetoj movas konektilo(j)n. La valoj kaj montetoj laŭ programo sekvas unu la alian.	
639.	**kodita trakcirkvito**	Speciala alternkurenta trakcirkvito, en kiu la kurentofluo estas interrompita laŭ takto antaŭe difinita.	
640.	**koercita forto**	Tiom da intenso de la magneta kampoforto, kiam la materio perdas sian magnetecon.	
641.	**kolektoro**	Elektrodo de transistoro dupolara, kiu kolektas la ŝargoportantojn eligitajn el la emitero.	
642.	**kolpic-oscilatoro**	Oscilatoro kun variebla frekvenco, en kiu la rekuplilo estas kapacita dividilo. La kapacita dividilo estas parto de la oscikvito.	
643.	**kombina kapeto (indukta)**	Konsistero en magnetofono, per kiu oni povas kaj surbendigi kaj elpreni informojn (magnetajn datenojn). La informoj estas storataj en magneta strio sur la bendo.	
644.	**kompensa ŝargado**	Kontinua ŝargado de akumulatoro, kiu kompensas la malŝargojn funkcian kaj spontanean.	

645.	**kompensilo**	(PIV: Aparato, kiu funkcias per la kompensa metodo, ekz., ĉe la mezurado de elektra tensio.)	
646.	**komplementa konekto**	Kontraŭtakta amplifatoro konstruita el transistoroj komplementaj. Unu transistoro estas NPN-tipa kaj la alia estas PNP-tipa.	
647.	**komputilo**	Maŝino, kiu estas kapabla analizi kaj solvi problemojn laŭ programo, uzante storitajn datenojn.	analizilo
648.	**komunregado**	Regadmaniero de la diferencecaj ampli-fatoroj. La regsignalo estas sama sur ambaŭ regelektrodoj rilate al la terpunkto kaj intense kaj faze.	
649.	**komuti**	(PIV: Laŭvole direkti elektran kurenton aŭ en unu cirkviton aŭ en alian.)	
650.	**komutilaro**	(PV: Plato aŭ tabulo, sur kiu estas fiksitaj ĉiuj komutiloj, interrompiloj kaj mezuriloj de elektra konduktilaro.)	konektotabulo
651.	**komutilo**	(PIV: Elektra aparato, ebliganta komut(ad)on ĉe unu cirkvito aŭ samtempe ĉe pluraj cirkvitoj.) Pere de komutilo konektiĝas la rotoro tra frotiloj al la cirkvito.	komutatoro kolektilo
652.	**komutillameno**	Unu segmento de komutilo.	kolektillameno
653.	**kondensilo**	Konsistero, kiu konservas ŝargojn. Ĝian konservkapablecon oni nomas *kapacito*.	
654.	**konduktaj elektronoj**	Elektronoj, kiuj estas en la kondukta zono kaj partoprenas en la fluigo de kurento.	
655.	**konduktanco**	Kondukta poveco. Kapableco de materio movi elektronojn, do fluigi kurenton.	
656.	**konduktanto**	Materio, kiu facile povas fluigi la kurenton.	
657.	**kondukta zono**	Energionivelo, en kiu la elektronoj movante povas transporti elektran energion, do fluas kurento.	
658.	**konduktigo**	Transŝalto al stato kondukta de tiristoro, triako.	
659.	**konduktilo**	Konsistero, kiu estas fabrikita el konduktanta materio. Tiuj estas ekz., la diversaj dratoj, metalfadenoj, kabloj.	metalfadeno, drato
660.	**kondukto**	Propreco de materio, kiu povas fluigi kurenton.	
661.	**konekti**	(PIV: Kunigi per konduktilo, ŝtopilo ktp du punktojn de cirkvito; kontaktigi la erojn de cirkvito.)	

662.	**konektingo**	Truo, en kiu oni metas ŝtopilon por fari konekton.	ŝtopilingo *ingo*
663.	**konektopiedo**	Dratpeco de konsistero por konekti tiun.	
664.	**konektopinglo**	Dorna (pingla) metalpeceto por konekti draton al panelo cirkvita. Tiu povas esti sola, kaj kun pluraj.	
665.	**konektopoto**	El plasto fabrikita potformaĵo por certigi izolitan muntadon de la dratoj en la muron.	ligpoto, muntopoto
666.	**konektoskatolo**	Skatolo por kunligi dratojn disbranĉigitajn.	ligskatolo, muntoskatolo
667.	**konektoskemo**	Desegnaĵo pri la cirkvito, laŭ kiu oni jam povas konstrui la cirkviton, ĉar enhavas ĉiujn tiponomojn kaj valorojn de la konsisteroj.	*skemo, cirkvitskemo*
668.	**konektoŝranko**	Ŝrankoforma muntejo, en kiu estas disbranĉita la enira tensioreto al pluraj cirkvitoj.	muntoŝranko
669.	**konektotabulo**	Tabulo, sur kiun estas muntitaj diversaj ŝaltiloj kaj kontekingoj. Ĝi povas enhavi ankaŭ indikilojn (lampojn, mezurilojn). Tiu tabulo ne estas fermita en ŝrankon, tiel libere atingebla.	ŝaltotabulo
670.	**konektoŝtopilo**	Izolita metalpeco muntita sur la dratfinon, per kiu oni povas konekti tiun draton al la konektingo.	*ŝtopilo*
671.	**konsister-muntiga skemo**	Desegnaĵo pri la situo de konsisteroj sur la muntopanelo.	
672.	**konsistero**	El kiuj estas konstruitaj la cirkvitoj.	
673.	**konstanta kurento**	La valoro de kurento ne variiĝas.	
674.	**konsumanto**	Homo aŭ institucio, kiu uzas elektran energion el la publika tensioreto.	
675.	**konsumilo**	Ŝarĝilo de iu elektronika aparato, kiu eluzas la eliran signalon. Maŝino, kiu funkcias eluzante la elektran energion de la publika tensioreto.	
676.	**kontaktilo**	Metalpeco, al kiu tuŝante alian metalpecon oni certigas la fluadon de kurento. El tiuj metalpecoj ĝenerale unu estas senmova kaj la alia moviĝebla. Tiuj kontaktiloj estas videblaj plejofte sur relajsoj, kaj ne videblaj ekz., en la ŝaltiloj.	
677.	**kontaktinterspaco**	Distanco inter la kontaktiloj.	
678.	**kontinua kurento**	Kurento, kiu daŭre fluas de la ŝalto ĝis la malŝalto. (La tensioalto kaj ankaŭ la	ne intermita (pulsanta), ne alterna, ne fluktua

		kurento-intenso povas malgrandiĝi dum tempo rilate al la malŝargiĝo de pilo, baterio, akumulilo.) Originale ĝi estis uzata pri la *unudirekta* kurento, krome kiel rekta, kies elektronoj fluas nur al sama direkto.	
679.	**kontrasto**	Lumintensa proporcio inter la plej hela kaj la plej malhela partoj de bildo.	
680.	**kontraŭtakta**	Amplifator-tipo, en kiu la amplifiloj (transistoroj, elektronikaj tuboj) havas duonperiodan regadon alterne, kies fazrilato estas 180^0.	kontraŭfaza
681.	**kontroliga cirkvito**	Cirkvito por kontroli la ĝustan funkciadon de alia cirkvito.	
682.	**konvektilo**	Plej ofte el aluminio fabrikita metalpeco, kiu havas grave pli grandan surfacon ol la kapsulo de konsistero. Tiu tiel faciligas la termodisradiadon al la aero.	termokonvektilo, malvarmigilo
683.	**konvertilo**	Aparto, kiu modifas signalaspekton al ia alia formo. Ekz., el alterna kurento ĝi faras *unudirektan* kurenton aŭ la *unudirektan* kurenton konvertas al alterna kurento.	
684.	**korona deŝarĝo**	Tiu okazas kun brilanta lumefekto, kiu kreiĝas en gaso havanta normalan atmosferan premon, se ĉeestas intensa elektra kampoforto (tensio). La tensio devas atingi tian grandecon, ke la gaso povu joniĝi. Se tiu tensio superas la trarompan nivelon, en tiu okazo ne koron-lumo kreiĝas, sed sparko.	koron-deŝarĝo
685.	**korpusklo**	Ero, el kiu konsistas la materio.	partiklo
686.	**kristalfiltrilo**	Filtrilo, kiu enhavas kvarckristalon por la frekvencostabileco.	
687.	**kriza frekvenco**	Limfrekvenco, kiun la jonosfero ankoraŭ reflektas je ortangula incido.	
688.	**kriza tensio**	Limtensio danĝera, kiun superige jam povas okazi iu elektra difekto.	
689.	**krizookaza kurentofonto**	Loka kurentofonto, kiu certigas la senhaltan energioprovizon, kiam okazas manko en la publika tensioreto.	porokaza kurentofonto
690.	**krucfrekvenco**	Karakteriza punkto de tonregulilo. La traiga karakterizo de basa kaj soprana signaloj tie krucigas unu la alian. Tiu krucfrekvenco kutimas esti ĝenerale proksime al 1kHz.	
691.	**kubuttensio**	Tensionivelo, kiu estigas lavango-intensiĝon de la kurento. La nomo aludas al la formo de ecaro.	

692.	**kulombo**	Mezurunuo, kiu reprezentas la nombron de la elektroŝargojn. Unu kulombo egalas kun $6{,}28 \cdot 10^{18}$ elektronoj. En konduktilo fluas 1 kulombo dum unu sekundo je 1A kurento.	
693.	**kunagordo**	Alĝustigo de cirkviteroj aŭ aparatoj resonancaj kaj selektivaj unu al la alia rilate al la traigenda aŭ filtrenda frekvenco.	
694.	**kupli**	(PIV: Alproksimigi la induktancajn. kapacitancajn aŭ rezistancajn partojn de cirkvito, por la transigo de elektra energio.)	
695.	**kuplofaktoro**	Esprimas la ligokvaliton en la interinduko. Ĝi estas loza, se parto de la flukso ne efikas en la indukado. Ĝia simbollolitero estas la (***k***).	kuplokoeficiento
696.	**kuplomildigo**	Oni parolas pri kuplomildigo, kiam devas malintensigi la kuplon inter la ŝtupoj pro genero. Por eviti la generon la kuplon devas mildigo al loza, atente la funkcian frekvencon. Alia maniero por eviti la generon apliki barbobenojn kaj kondensilojn en la nutrilo kaj en ties konduktiloj. Ankaŭ ĉe antenoj estas uzata maniero ĉesigi la kuplon je decidaj frekvencoj, kiu estas la *ondoretenilo*.	kuploĉesigo
697.	**kuprokovrita plato**	El kiu oni preparas la muntopanelon.	kuprofolia bakelito
698.	**kurentamplifa koeficiento**	Parametro de amplifiloj (transistoroj), kiu determinas la grandecon de la amplifado. Esprime kun la *h* parametro, tiu estas la h_{21}, aliforme signata kun β.	betao
699.	**kurentgeneratoro**	Generatoro havanta tre grandan internan rezistancon (R_{in}), tial la elira kurento estas relative stabila, nur iomete ŝanĝiĝas de la ŝarĝo. Se $R_{in}=\infty$, tiel la *kurento* estas **sendependa** de la *ŝarĝorezistanco* (konsumo), tiam la kurentgeneratoro estas **ideala**.	
700.	**kurento**	Kurento estas movo de la elektronoj (ŝargoportantoj) en materio.	
701.	**kurentobato**	Vundiĝo pro kurento, kiun okazigas la tuŝo de granda tensio.	
702.	**kurentofonto**	Energiofonto, kiu certigas elektran energion, uzante diversajn fizikajn, kemiajn, mekanikajn efikojn.	
703.	**kurentodens(ec)o**	Rilate al la sekco de konduktilo, kiom da ŝargoportanto moviĝas dum sama tempo.	
704.	**kurentokonsumo**	La eluzata kurentokvanto por funkciigi aparatojn, maŝinojn elektrajn.	

705.	**kurentolimitilo**	Konsistero, kiu baras la intenson de la kurento.	
706.	**kurentolimito**	Maksimuma kurentointenso de nutrilo, kiun la cirkvito ankoraŭ povas elteni sen difekto. La modernaj nutriloj aŭtomate kontrolas kaj baras tiun kurenton.	
707.	**kurentopinto**	Maksimuma kurentointenso.	
708.	**kurentoprovizo**	Certigo de elektra energio.	
709.	**kurentosistemo**	Difinas la tipon de la kurento, kiu povas esti alterna aŭ *unudirekta*.	
710.	**kurtcirkvita kurento**	Kurento, kiam la ŝarĝrezistanco estas nulo, aŭ la kurento ne tra la konsumilo fluas, sed antaŭe rekonektiĝas.	
711.	**kurtcirkvita tensio**	Primara tensio fluiganta nominalan kurenton, kiam la sekundara bobeno estas superŝarĝita per kurtcirkvito.	dropo
712.	**kurtcirkvito**	En tiu okazo oni parolas pri kurtcirkvito, kiam la kurento ne tra la konsumilo fluas, sed antaŭe rekonektiĝas, aŭ la elira ŝarĝ-rezistanca valoro estas nulo.	
713.	**kurtondo, K**urt-**O**ndo	Radiodisenda bendo, havanta frekvenco-intervalon 3÷30MHz.	KO
714.	**kvarcagordilo**	Helpilo por agordi aparton, kiu enhavas kvarckristalon por krei oscilon frekvenco-stabilan.	
715.	**kvarckristalo**	La *kvarckristalo* estas natura mineralo, silicio-oksido (SiO_2). La frekvencon de la oscilatoroj oni povas stabiligi per la kvarckristalo.	*kvarco*
716.	**kvarononda**	Mekanika kaj elektra propreco de konsistero (ekz., anteno) estas kalkulita laŭ la kvarono de la ondolongo.	
717.	**kvarpoluso**	Sendepende de ĝia komplikeco, ĉi tiu cirkvito havas kvar konektopunktojn. Ĝiaj eniro kaj eliro konektiĝas per po du polusoj (entute kvar) al la antaŭa kaj la sekvanta ŝtupoj.	
		L	
718.	**labora kureno**	Kurentointenso minimuma, kiu estas bezonata por funkciigi relajson.	*laborkurento*
719.	**labora tensio**	Tensiograndeco minimuma, kiu estas bezonata por fluigi laboran kurenton tra la bobeno de relajso.	*labortensio*
720.	**laborpunkto**	Ĝenerale ĝi estas funkcia stato ĝustigita en	

		la karakterizo de maŝino, aparato ktp. Per *unudirekta* tensio alĝustigita funkcia kurento ĉe amplifatoro. Ĉi tiun ĉe transistoroj oni faras per la beztensio, ĉe elektronikaj tuboj per la kradtensio. La laborpunkto determinas la tipon de la amplifatoro, kie povas esti aŭ A, AB, B, C tipa.	
721.	**lamenstruktura ferkerno**	Ferkerno preparita el lamenoj.	ladfolia ferkerno
722.	**lampoŝirmilo**	Retenas la brilon de ampolo, aŭ/kaj flanken al konkreta direkto, tiel certigante koncernan lumefikon. Krom tio depende de la materio de ŝirmilo, tiu povas estigi koloran impreson.	
723.	**lanterna kolono**	Kolono sur, kies supro estas lokita lampo. Plej ofte estas uzate por la stratlumigado.	
724.	**larĝbenda amplifatoro**	Amplifatoro, kiu estas kapabla amplifi tre larĝan frekvencointervalon sen distordo.	
725.	**laringmikrofono**	Speciala mikrofono, kiu ne la aerobremsadon transformas al elektra signalo, sed la vibradon mekanikan de la epigloto.	kolmikrofono
726.	**lasero**	(PIV: Aparato kapabla produkti tre mallarĝan k tre intensan koheran lumondon kun tre preciza frekvenco (nomata laŭ la komencliteroj de «Lum-Amplifo per Stimulata Eligo de Radioj».)	
727.	**laŭtparolilo**	Sonindikilo, kiu estas kapabla redoni la homan parolon, konektite al la eliro de amplifatoro.	
728.	**lavanga trarompo**	Je decida tensiogrando la izolilo abrupte komencas kondukti kurenton.	
729.	**lavmaŝino**	Dommastra maŝino por purigi vestaĵojn.	
730.	**Lum-Eliganta Diodo**	Duon-konduktila diodo, kiu transformas la elektran energion al lumenergio.	**LED** (Lum-Emisia Diodo)
731.	**liberkolektora eliro**	Elir-tipo de la diĝitaj giĉetoj, kiam la kolektoro de la fin-transistoro estas konektita al la nutrotensio ekstere de la IC kapsulo.	
732.	**lika kurento**	Kurento, kiu ne faras efikan laboron, trafluante la konsumilon.	perda kurento
733.	**limfrekvenco**	Ĉe elektronikaj cirkvitoj kaj filtriloj permesata plej alta, kaj plej malalta frekvencoj. La du limfrekvencoj determinas frekvencointervalon.	
734.	**limitilo**	Cirkvito, kiu baras la intenson de elektraj	limigilo

		propraĵoj.	
735.	**limtensio**	Maksimuma tensiograndeco, kiun ne indas trapasi ĉar povas okazigi trarompon.	maksimume permesata tensio
736.	**lineo**	(PIV: Konduktiloj, uzataj por porti elektran energion laŭ fiksita vojo.) (PIV: Konduktiloj aŭ optika fibro, uzataj por porti telekomunikajn signalojn.)	
737.	**linearecо**	Tiu tion montras, kiom grade malproksimiĝas la valorintervalo de la lineara ŝanĝo.	
738.	**liniosekcia relajso**	Relajso, kiun funkciigas tensio, ŝaltata en la fora linioloko. Uzata ĉe la fervoja sekuriga instalaĵo koncerne en la interstacia bloksistemo.	
739.	**lisaĵukurbo**	Osciloskopa ekranfiguro, kiu estas kapabla kompari la frekvencojn de du signaloj. Kiam la figuro montras idealan ringformon, en tiu okazo la du frekvencoj estas egalaj.	
740.	**litzofadeno**	Speciala konduktil-plektaĵo por altfrekvencaj signaloj. Konsistas el pluraj tre maldikaj konduktiloj, kies suma surfaco estas signifa, do la tavol-fenomeno de altfrekvenca kurento kaŭzas nur negravan perdon.	*licofadeno* *lico*
741.	**logika cirkvito**	Cirkvito, kiu prilaboras diĝitajn signalojn.	diĝita cirkvito
742.	**logika elemento**	Diĝita cirkvito, kiu realigas kombinan funkcion: *AŬ-, KAJ-, MAL-, NE-, NEK-* ~ilo.	*kombinilo, kluzo logika*
743.	**loka oscilatoro**	Tiu oscilatoro radiofrekvenca, kies signalo ne estas disradiata, sed miksita kun alia signalo por krei alian frekvencon.	
744.	**longoondo**	Radio-dissenda bendo, havanta frekvenco-intervalon 30÷300KHz.	**LO**
745.	**loza kuplo**	Kuplo, tra kiu nur iometa energio aŭ signalo estas traigita.	
746.	**luma signalo**	Signalo en la televidtekniko, kiu reprezentas la luman bildon sur la ekrano.	
747.	**lumkablo**	Vitrofadenoj transportantaj la lumon.	
748.	**lumkopiilo**	Aparato por kopii surpaperan presaĵon.	
749.	**lutaĉo**	Lutaĵo malbona, kiu ne certigas bonan kontakton. Ĝi povas fariĝi, se la stano ne estis sufiĉe varma, aŭ se la konsistero ekmoviĝas dum la rigidiĝo de stano.	fuŝa lutaĵo
750.	**lutaĵo**	Kun stano fiksita kontakto inter la cirkvitaj	

		konsisteroj.	
751.	**luti**	Fiksi konsisteron en cirkviton aldone stanon.	
752.	**lutilo**	Laborilo, per kiu oni povas fandi la stanon por fiksi konsisterojn en la cirkviton.	
753.	**lutkuseneto**	Antaŭpreparita stanpeco sur la cirkvita folio tie, kien oni volas meti konsisteron ĉe la **S**urface **M**untita **T**eknologio (**SMT**).	
		M	
754.	**magneta kampo**	Erao, en kiu estas efika la magnetoforto. La magnetokampo startas de la Norda poluso kaj etendas ĝis la Suda poluso.	
755.	**magneta kontaktilo**	Speciala kontaktilo, kiun movas magneta kampo, kiam tiu fortiĝas pro ĉeesto (alproksimiĝo) de ferpeco. Ekz., tiu kontaktilo estas uzata ĉe la fervoja tekniko por senti radomovon de vagonoj.	
756.	**magneta rezistanco**	La magneta rezistanco (MR) estas tiu propreco de konduktanto, kies grandeco modifiĝas pro ekstera magneta kampo (*H*), tiel influe la intenson de la trafluanta kurento.	
757.	**magnetbendo**	Magnetigebla bendo survolvite, kiu estas kapabla magnete konservi elektrajn signalojn. Ĝi estas uzata ĉe la komputiltekniko por datostorado.	Vidu ankaŭ ĉe: magnetofonbendo
758.	**magnetkart-legilo**	Aparato, kiu povas detekti la datenojn de magneta karto.	
759.	**magnetkarto**	Kartoforma informportilo, kiu havas magnetstrion, modulita tiu laŭ la bezonataj datenoj.	
760.	**magneto**	Metalo el fero kaj nikelo, en kiu la molekuloj estas egalmezure (homogene). La tia ilo altiras la ferojn, aŭ alian magneton, estigante magnetan kampon. Ĉi tiu estas la permanenta magneto. Magnetan kampon eblas fari ankaŭ tiel, kiam oni kurenton fluigas tra bobebo. Ĉi tiu magneto estas nur dum tiom da tempo, ĝis kiam la kurento fluas. Ĉi tiu estas la elektromagneto. La magneto havas du polusojn, nomataj tiuj *Norda* kaj *Suda*.	
761.	**magnetofonbendo**	Magnetigebla bendo, survolvita bobene, kiu estas kapabla magnete konservi elektrajn signalojn. Ĝi estas uzata por sonregistrado.	Vidu ankaŭ ĉe: magnetbendo
762.	**magnetofonkaseto**	Mallarĝa magnetigebla bendo, survolvita bobene en kasedo.	sonkasedo

763.	**magnetofono**	Aparato por registri kaj resonigi sonojn (paroladon, muzikon).	
764.	**magnetrono**	Movonda tubo, uzata por **U**ltra-**K**urt-**O**nda kaj **M**ikro-**O**nda oscilatoroj. Tiu estas kapabla produkti altfrekvencajn kaj grandpovumajn oscilojn.	
765.	**malaltpasa filtrilo**	Konsistanta el kondensiloj, memindukaj bobenoj kaj/aŭ rezistiloj. Ĝi super la difinita frekvenco reprezentas tre grandan reziston en la cirkvito. Kontraŭe, sub tiu difinita frekvenco ĝi amortizas nur iomete.	
766.	**maldekstruma regulo**	Difinas la fortodirekton en magneta kampo rilate al konduktilo, tra kiu fluas kurento.	maldekstra-mana regulo
767.	**malekscita kurento**	Tiu minimuma kurentointenso, sub kiu jam la relajso el ekscita pozicio removas al baza pozicio.	defalkurento
768.	**malekscita tensio**	Tiu minimuma tensiogrando, sub kiu jam la malekscita kurento fluas tra la bobeno de relajso.	defaltensio
769.	**malferm-direkta kurento**	Tiu kurento, kiu trafluas duon-konduktilon ĉe la malfermdirekta polareco de konektita tensio (diodo), aŭ dum regata reĝimo (transistoro, tiristoro ktp.).	
770.	**malferm-direkta tensio**	Tiu tensiopolareco, kiu kapablas trafluigi kurenton grave pli intensan, ol je alia polareco, aŭ dum regeta stato de duon-konduktiloj.	
771.	**malgranda tensio**	Pli granda ol 50V, sed ne pli granda ol 600V inter la fazkonduktilo kaj la tero kaj ne pli granda ol 1000V inter du fazkonduktiloj. (Mi devas mencii, ke ĉi tiu ne egalas kun la malalta tensio. Vidu ankaŭ ĉe la basa tensio!)	
772.	**malhelsignalo**	Signalotipo ĉe la TV tekniko, kiu regas sur la ekranon malhelan punkton.	
773.	**malintens-kurenta**	Kies kurento ne estas kapabla okazigi elektrokutiĝon.	
774.	**mallineareco**	Tion esprimas, kielgrade diferencas la valorintervalo de la lineara ŝanĝo.	
775.	**malmodulado**	Operacio por separigi la datensignalon de la portanta signalo.	demodulado, remodulado
776.	**malplenigita tavolo**	Ĉi tiu tavolo kreiĝas en PN-junto. Ĉe la ĉirkaŭaĵo de PN-junto la plej multaj ŝargoportantoj foriĝas difundiĝe, tial la ŝargo de la jonoj en la kristalo, ne estas kompensataj, nome kreiĝas kampoŝargo.	

777.	**malstabila multivibra-toro**	Impulsoteknika cirkvito, kiu daŭre certigas impulsojn ĉe sia elirejo.	oscila vibratoro
778.	**malŝargiĝo**	Forigi elektran energion el io. (kondensilo, akuo)	
779.	**malvarmigilo**	Plej ofte el aluminio fabrikita metalpeco, kiu havas grave pli grandan surfacon ol la kapsulo de konsistero. Tiel faciligas la termodisradiadon al la aero.	konvektilo
780.	**manipulilo**	Aparato, per kiu oni mem povas modifi elektrajn valorojn per mana regado.	manipulatoro
781.	**markero**	Signalserio por aŭtentikigo de la ricevilskalo. La signalojn kreas marker-generatoro, funkcianta per 1MHz-a kvarckristalo. El tiu 1MHz-a signalo, estas dividitaj la markersignaloj.	
782.	**masframo**	Muntoĉasio, sur kiu estas lokitaj la konsisteroj. (PIV: Metala framo de elektraj aparatoj, uzata kiel maso.)	*ĉasio*
783.	**maŝamplifo**	Tiu estas kalkulebla ĉe retrokuplita amplifatoro. La produto de la du koeficientoj amplifa kaj retrokupla. H=ß·A	
784.	**maŝaro**	Sistemo de konektitaj elektraj konsisteroj. Energioportanta elektra lineo.	cirkvitoreto
785.	**maŝo**	(PIV: Aro da branĉoj, kiuj interkonektiĝas ĉe nodoj kaj formas fermitan cirkviton.)	cirkvitomaŝo
786.	**maŝrezisto**	Mezurita rezisto ĉe unu fino de dratparo, kiam ties alia finaĵo estas kunligita.	
787.	**maŝtezo**	En ajna fermata cirkvitomaŝo la sumo de la unuopaj tensioj egalas kun la tensio, mezurata sur la konsumanto(j).	II-a tezo de Kirĥof
788.	**megaomo**	Milionobla omo.	*megomo*
789.	**mekanika gardilo**	Mekanismo protekti kontraŭ superkurento.	
790.	**membrano**	Parto de mikrofono kaj laŭtparolilo, kiu transformas reciproke la aermovojn kaj la elektroŝanĝojn.	
791.	**memekscita oscilo**	Nedezirata oscilo, kreiĝanta pro retrokuplo inter elirejo kaj enirejo.	ekscitiĝo
792.	**meminduka koeficiento**	Estas propreco de la kondiktiloj kaj bobenoj, kiu montras tion, ke unueca kurentoŝanĝo, kiom fluksoŝanĝon okazigas.	indukto
793.	**meminduko**	Elektromagneta induko, kiun kreas la	

		intensoŝanĝo de kurento trafluanta la konduktilon. Do, meminduko fariĝas en ĉiu okazo, kiam la trafluanta kurento en la konduktilo abrupte ŝanĝiĝas.	
794.	**memorilo**	Gardas la informojn, datenojn elektrigitajn en diĝita formo.	storo
795.	**memselektiva**	Aŭtomate selektiva aparato, ekz., telefono.	
796.	**metalfadeno**	Konduktilo, kiu estas kapabla trafluigi kurenton.	drato
797.	**meza frekvenco**	En superheterodinaj riceviloj la signalon de la loka oscilatoro oni miksas kun la enira radiofrekvenca signalo. La diferenca frekvenco estas la meza frekvenco.	*mezfrekvenco* **MF**
798.	**mezondo, M**ez-**O**ndo	Radiodisenda bendo, havanta frekvenco-intervalon 300÷3000 KHz.	**MO**
799.	**mezuramplekso**	La mezuriloj, ne povas en unu paŝo mezuri la tutan valor-intervalon. Pro tio oni dividas po ampleksoj la mezuratan valorbendon.	
800.	**mezurilo**	Aparato por determini elektrajn valorojn.	
801.	**mezurilamplifatoro**	Cirkvito por bonigi la sentivecon de mezurilo.	
802.	**mezurileraro**	Erargrandeco rilate al la fina pozicio de la nadlohava mezurindikilo. Ĉe diĝitaj mezuriloj la erarecon determinas la nombro de la dekadoj post la decimala punkto.	mezurilĝusteco
803.	**mezurkablo**	Izolita drato por konekti mezurilon al la mezurenda cirkvito.	
804.	**mezurkvadrato**	Kvadratforma cirkvito, konsistanta el pasivaj elementoj (rezistiloj, kondensiloj, induktiloj), kies kontraŭflankaj angul-punktoj kun pare estas mezurpontoj kaj el tiuj unu reprezentas la nutrotensian eniron, la alia la eliron. Ĉe la eliro aperanta tensio proporcias kun la valoro de la mezurata konsistero.	mezurponto
805.	**mezurpunkto**	Loko en cirkvito, kie oni povas mezuri karakterizan datenon.	
806.	**mezurtekniko**	Aro de sistemo kaj aparato por aŭtentike mezuri elektrajn datenojn.	
807.	**mezvaloro**	Vektoriala sumo de la ekarthisterezo.	nominala valoro
808.	**mikrocirkvito**	Kompleksa cirkvitaro en unu kapsulo sur unu duonkondukta tavolo.	blato, mikroĉipo *MiCio*
809.	**mikrofarado**	(PV: Mezurunuo de elektra kapacito, egala al la milionona parto de la farado: *la*	

		mikrofarado estas tre ofte uzata por mezuri la kapacitojn en la radioelektro.)	
810.	**mikrofonio**	Vibrado de la mekanikaj konstruelementoj de la sonfrekvencaj aparatoj, kiu estas aŭdebla pere de la laŭtparolilo. Elektre temas pri pozitiva retrokuplo, kiu ĉefe tiam estas tre grava, kiam la laŭtparolilo estas lokita proksime al tiuj konsisteroj, kiuj inklinas vibradi.	
811.	**mikrofono**	Elektroakustika signaltransformilo, kiu transformas la sonondojn al elektraj signaloj.	
812.	**mikroondo**	Altfrekvenca radioondo.	
813.	**mikroprocezilo**	Integrita diĝita cirkvito en unu kloŝo, kiu estas kapabla fari operaciojn kalkulajn kaj logikajn.	*procezilo, ĉipo*
814.	**miksilo**	Cirkvito por miksi du diversfrekvencajn signalojn. La resumo povas esti aŭ la sumo, aŭ la diferenco de la du frekvencoj. Por miksi du signalojn estas bezonata aktiva konsistero, kiu povas esti ekz., la simpla diodo. La simpla diodo okazigas krom la miksado ankaŭ perdon, sed ne bezonas nutradon. Por eviti la perdon estas uzataj amplifiloj (ekz., transistoro).	
815.	**minimumfunkcio**	Ekz., ĉe sekurigaj instalaĵoj tia funkci-maniero, kiam pro iu difekto nur tiuj partoj funkcias, kiuj nepre estas bezonataj.	
816.	**misfunkciado**	Malbona, ne ĝusta funkciado de cirkvito, aparato.	
817.	**MODEMO**	Akronimo el la vortokombino Modulatoro-Demodulatoro. Estas dudirekta kuplo-cirkvito.	
818.	**Metal-Oksid Duonkonduktanto**	La nomon de ĉi-tipaj FET-oj determinis ĝiaj konstruoj. Oni kutimas nomi ankaŭ **Izolgiĉeta FET**-o (IGFET). La MOD-FET-oj povas esti similaj kiel la JFET-oj, kaj N-, kaj P-kanalaj. Alia propreco de ĉi-tipaj FET-oj estas tio, ke la MOD-FET-oj krome povas esti, depende de la konstrukto, aŭ baze *fermataj* aŭ *konduktaj*.	**MOD-FET**-o izolkluza **FET**-o
819.	**modulada indico**	Propreco daŭre modifiĝanta laŭ la modulado rilate al la valoro de la senmodula stato. Oni diferencigas indicojn, kiel: amplituda, frekvenca, faza, impulsa (laŭ tempo). Ekz. Tiu indico ĉe frekvencomodulado, signata per la litero (*m*), estas la kvociento de la portonda diferenco (*Δf*) kaj la modulanta	frekvencopulso

		frekvenco (*fm*). Je la maksimuma valoro de la modulanta signalo okazas la plej granda diferenco en la portonda frekvenco. *m=Δf / fm*	
820.	**modulado**	Modifo de disradiata (portanta) signalo por informacio-transporto. La modulacio povas esti: *amplituda, frekvenca, faza, impulsa.* (PIV: Variigi la amplitudon, frekvencon, aŭ impulson de portondo laŭ aŭdfrekvenca aŭ alia signalo, por tiel transsendi la signalon.)	
821.	**modulilo**	Cirkvito, kiu kapablas aldoni la informacion al la portanta ondo.	modulatoro
822.	**modulo**	Por certa tasko havanta plurajn cirkvit-unuojn.	bloko
823.	**molfero**	Materio kun malgranda koercita forto. Tiu estas uzata por ferkerno de elektromagneto.	
824.	**momanto**	La magnetaj kampoj, rotora kaj statora puŝas unu la alian per forto decida, dependanta tio de la kampofortoj. Tiu forto estas la *momanto*, kiu turnadas la rotoron.	
825.	**momenta valoro**	En momento mezurata valoro el la daŭre ŝanĝanta elektra dateno.	
826.	**monitoro**	Aperigilo, kiu estas kapabla por aspektigi elektrajn signalojn.	ekrano
827.	**morsa alfabeto**	(PIV: Kodo, en kiu literoj, ciferoj k interpunkciaj signoj estas prezentataj per diversaj kombinoj de nur du signoj, ekz., de punkto k streko, de longa k kurta ekbrilo ktp.)	morsa ABC
828.	**morso-signaro**	Alfabeto por senvoĉa radiotelegrafio.	
829.	**motorhaltiga ŝaltokombinilo**	Speciala ŝaltilo, kiu malŝaltas la bornotensio(j)n de sur la elektra motoro, se okazas iu difekto. (Tiu difekto povas esti ekz., grave pli intensa kurento pro kurtcirkvito, mekanika problemo aŭ manko de iu faztensio ĉe trifaza sistemo).	
830.	**movinduko**	Se konduktilo movas en magneta kampo, tiam en la konduktilo indukiĝas kurento. Ĉi tiun fenomenon oni nomas *movinduko*. Tiam estas la plej intensa la indukata kurento, se la konduktilo movas rektangule al la fortolinioj, ĉar en tiu okazo „tranĉas" (krucigas) la plej multon el tiuj. Se ni movas la konduktilon paralele kun la fortolinioj, la mezurilo montras nulon, ĉar la konduktilo nun ne tranĉas fortoliniojn. Kiam la movdirekto estas oblikva, la mezurilo montras la indukan tension laŭ la movdirekto, sed malpli intensan, ĉar la	

		konduktilo tranĉas malpli multajn fortoliniojn.	
831.	**multimetro**	Mezurilo, kiu estas kapabla mezuri plurajn, diversajn elektronikajn propraĵojn. (V, A, Ω)	
832.	**multimplekso**	Dum sama tempodaŭro estas transportataj pli ol unu informoj alterne po tempopecoj.	
833.	**multivibratoro**	Du seriekonektitaj amplifatoroj invertantaj, de kies dua eliro estas retrokuplo al la eniro de la unua ŝtupo. La multivibratoro funkcias, kiel rilaksa oscilatoro.	oscila vibratoro, multivibrilo *vibrilo*
834.	**multpolusa ŝaltilo**	Ŝaltilo, kiu povas dum sama tempo ŝalti multajn memstarajn cirkvitojn.	multcirkvita ŝaltilo
835.	**multpozicia ŝaltilo**	Ŝaltilo, kiu unu konduktilon povas po ŝalti al multaj aliaj konduktiloj.	*ĝekslo*
836.	**multŝtupa variebla kondensilo**	Sur komunan akson fabrikita kondensiloj, kiuj kondensiloj estas varieblaj komune en sama tempo. Ekz., tia estas uzata en radioriceviloj por agordi la modulan kaj la oscilatoran cirkvitojn.	
837.	**munti**	Fari, produkti cirkviton, aparaton.	
838.	**muntisto**	Fakulo, kiu produktas la cirkvitojn kaj aparatojn.	
839.	**muntita panelo**	Muntopanelo, sur kiun jam estas muntitaj la konsisteroj, do funkcikapabla cirkvito aŭ cirkvitero.	
840.	**muntopanelo**	Plato, sur kiun oni muntos la konsisterojn, por fari cirkviton.	panelo *ĉasio*
		N	
841.	**nadirimpedanco**	Radiada rezistanco de la anteno ekster resonancfrekvenco.	
842.	**nadiro**	Konektopunkto de la anteno, kiun nutras la finamplifatoro.	
843.	**nadirrezisto**	Radiada rezistanco de la anteno je resonancfrekvenco.	
844.	**nadlo**	Montrilo de mezurilo, kies pozicio super skalo montras la mezuratan valoron.	
845.	**nebullampo**	Speciala lampo por veturiloj, havanta tiu flavan koloron, uzi en nebulo.	
846.	**negativa**	(PIV: Apartenanta al la speco de elektro, produktata per frotado de rezino.)	
847.	**negativ-retrokuplo**	Elira signalo de amplifatoro estas retrokuplita kun inversa fazo al la eniro.	

848.	**negativ-rezistanco**	Ĝenerale, kiam la tensio altiĝas, ankaŭ la kurento pliintensiĝas. Estaj tiaj konsisteroj, ĉe kiuj tiu impreso estas mala: ja pli alta tensio kaŭzas plie malintensan kurenton. Ĉi tiun fenomenon oni nomas negativ-rezistanco.	
849.	**neinverta amplifatoro**	Amplifatoro, kies enira kaj elira signaloj estas en sama fazo.	
850.	**nerekta kurento**	Inter la fontoenergio kaj la elektra energio estas uzata pera energio. Ekz., en elektrocentralo oni bruligas materialon por produkti termoenergion. Ĉi tiun termo-energion uzante oni estigas rotacian movenergion, kiel pera energio, kaj ĉi tiu movenergio estas transformata al elektra energio.	pera kurento
851.	**nerekta ondo**	Speciala ondo, kiun ekz., domo(j), monto(j) kaj ĉefe grandaj metalobjektoj reflektas.	pera ondo *perondo*
852.	**nesinkrona motoro**	Se la rivolunombro ne egalas kun la frekvenco de tensio, en tiu okazo maŝino estas nesinkrona.	
853.	**neŝarĝita amplifatoro**	Amplifatoro, al kies eliro ne estas konektita ŝarĝo aŭ konsumilo.	
854.	**neŭtralizado**	Praktike estas negativa retrokuplo. La radiofrekvencaj amplifatoroj estas emaj ekscitiĝi (havi memnaskajn oscilojn), tial estas aplikata la neŭtralizado.	*neŭtrigo*
855.	**neŭtriga kondensilo**	Retrokupliga kondensilo, uzata en radioaparato ĉe la unua ŝtupo altfrekvenca, de la elirejo de amplifilo al ties kluzelektrodo. Ĝenerale ĝi estas preciziga.	
856.	**neŭtriga bobeno**	Ĝi estas uzata en radioaparato. Tiu bobenoparto, kiu produktas la kontraŭfazan signalon por retrokuplo negativa ĉe la elirejo de amplifilo en la unua ŝtupo altfrekvenca.	
857.	**nodo**	Tiu punkto de cirkvito, al kiu aŭ de kiu la kurento povas flui pli ol unu direkto.	debranĉo, elbranĉo
858.	**nodtezo**	Kiu deklaras, ke la sumo de la enfluantaj kurentoj en nodon egalas kun la sumo de la elfluantaj kurentoj el la nodo.	I-a tezo de Kirĥof
859.	**nombrokalkulilo**	Aparato (cirkvito) por kalkuli element-nombron de signaloserio. Ekz., ĝi kalkulas la nombron de impulsoj kondukitaj al ties enirejo.	nombrumilo, *nombrilo*
860.	**nominala valoro**	Ĝi reprezentas la mezvaloron, tiun valoron, kiun difinis la produktanto. La praktika	

		valoro povas variiĝi de ĉi tiu kun ekarto.	
861.	**nomogramo**	Ecaroj por helpi la kalkuladon de la elektraj datenoj kaj konsistervaloroj. Figuro por reprezenti grafike multvariantajn funkciojn, helpante la kalkuladon de la apartenantaj valoroj.	
862.	**nulmalŝalto**	Estas superflua aperigi tiujn nulojn, super kiu(j) la dekadoj simile havas nur nul valoron. Tiujn senvalorajn nulojn malebligas speciala enirejo RBI de la dekodiloj, se tiu estas konektita al L nivelo kaj samtempe la aliaj enirejoj de la dekodilo A, B, C kaj D havas 0 valoron.	
863.	**nulindikilo**	Cirkvito, kiu sentas tiun momenton, kiam la alterna kurento trapasas la horizontalan tempoakson, do ŝanĝas direkton, tial tiam ĝi havas nulvaloron. Estas aplikate por regi grandpovumajn ŝaltilojn, ke la en kaj malŝaltoj okazu je tiu nulvaloro, tiel estas eviteblaj la nedezirataj memindukaj efikoj kaj la abruptaj ŝarĝkurentaj ŝanĝoj.	
864.	**nulterigo**	La nul-potenciala punkto (konduktilo) de la tensioreto estas konektita al la tero.	*nuligo*
865.	**nultransiro**	Tiu punkto (momento), kiam la alterna tensio ŝanĝas direkton.	
866.	**nultrair-detektilo**	Speciala cirkvito, kiu povas senti, kiam la alterna kurento/tensio ŝanĝas direkton.	
867.	**nutrilo**	Memstara cirkvito, kiu el la reta tensio produktas nutrotension por aliaj cirkvitoj. Plej ofte stabiligitan.	nutrocirkvito, nutrobloko
868.	**nutroaparato**	Kroma (memstara) aparato por produkti nutrotension.	
869.	**nutrotensia bruo**	50Hz-a aŭ 100Hz-a modulado en la sonfrekvenca amplifatoro. Tiun bruon okazigas la nekvalita filtrado, ekranado, foje la manko de la terumo.	nutrofrekvenca bruo
870.	**nutrotensio**	Tensio, kiu estas bezonata por funkciigi cirkvitojn.	
O			
871.	**oksidkatodo**	Elektrodo de elektronika tubo, kies surfaco estas oksidigita.	
872.	**oktodo**	Elektronika tubo havanta ok elektrodojn. Ĝiaj gridoj funkcias jene: La g_1 estas uzata kiel reggrido, g_2 funkcias kiel anodo de triodo. La g_3 estas helpgrido kaj la g_4 funkcias simile kiel reggrido. La g_5 estas la dua helpgrido kaj fine la g_6 estas la bremsogrido.	

873.	**ombrumita kablo**	Speciala kablo por sonfrekvencaj cirkvitoj konekti la regajn konsisterojn. Tiu kablo estas kovrita per metala plektaĵo. La interna(j)n konduktilo(j)n ĉirkaŭas plasta izolilo. Ekstere sur la metalplektaĵo refoje estas plastokovraĵo.	
874.	**ombrumo**	Ŝirmado de iu elemento, cirkvito, ŝtupo aŭ aparato kontraŭ ekstera elektromagneta kampo per iu metala materialo, por ke tiu ekstera kampo ne povu penetri en la ŝirmitan spacon.	
875.	**omo**	(PIV: Unuo de elektra rezistanco en la internacia sistemo de mezurunuoj (SI); simb.: Ω (omego); difino: 1Ω=1V/A (rezistanco kaŭzanta tensian diferencon de unu volto pro kurento de unu ampero).)	
876.	**ondeca faktoro**	Estas kvociento de la maksimuma kaj minimuma tensioj kreiĝantaj apud la nutrokablo de anteno, signata kun la litero *(s)*.	
877.	**ondodisvastiĝo**	Disradiado en la kampo de la elektro-magnetaj ondoj.	ondopaso
878.	**ondoformo**	Grafike ilustrita funkcio (ecaro) pri fenomeno, kies formo variiĝas je tempo aŭ spaco.	
879.	**ondofronto**	Kversekco en la spaco, kie la disradiita ondo ĵus trapasis.	
880.	**ondogvidilo**	Mekanika konstrukto, kiu determinas la disradiadan direkton de la ondoj.	
881.	**ondokvanto**	Ondogrupo konsistanta el unu dominanta ondo, kaj apud tiu proksimaj ondolongoj.	
882.	**ondolongo**	Estas distanco inter ripetantaj fazpunktoj laŭ la ondo, signata tiu kun la greka (λ).	
883.	**ondoretenilo**	Seria oscikvito naturigi la efikon de la loka radiodissendilo. Ĉe tiu frekvenco, kun kiu radias la loka dissendilo la ondoretenilo ŝuntas la eniran oscikviton de la ricevilo.	
884.	**ondorezistanco**	La altfrekvenca fidro elektre montras tian proprecon, kvazaŭ ĝi konsistu el pluraj induktoj kaj kondensiloj, konektitaj tiuj, kaj sere, kaj paralele. Ĉi tiu rezistanco estas kalkulebla kun la sekva ekvacio: $$Z_0 = \sqrt{\frac{L}{C}}$$ Ĉi tiu rezistanco estas sendependa de la	

		frekvenco kaj de la longeco de la fidro. Praktike tiuj signifas tion, se la fidro havas maldikajn dratojn (sia induktanco L estas granda), kaj la distanco inter la dratoj estas granda (sia kapacito C estas malgranda), la Z_0 estas granda.	
885.	**opala ampolo**	Ampolo, kies envelopo ne estas travidebla.	
886.	**operacia amplifatoro**	Integrita unudirekt-kurenta amplifatoro, kies amplifa koeficiento estas tre granda (kelkmilio-obla). Ĉi tiu amplifatoro havas retrokuplon inter la elirejo kaj enirejo kaj faras aŭ ne fazreciprokon, depende de la regata enirejo (+) aŭ (–). La transigan karakterizon determinas la retrokuplaj elementoj.	**OPA**
887.	**optoelektra kuplo**	Speciala kuplo, kiu estas religita per optokonektilo, kiu transformas elektran signalon al lumsignalo kaj la lumsignalon al elektra signalo. Estas realigebla ankaŭ la luma-elektra-luma sekvenco, sed ĝin oni malofte uzas.	
888.	**optokonektilo**	Cirkvito, kies enirejo kaj elirejo ne havas metalan kontakton. La internan regadon faras lumo.	optokuplilo, *optilo*
889.	**ortangula signalo**	Impulsteknika signalo, kiun karakterizas ecaro kvadratforma. (En la praktiko ne ekzistas idealforma ortangula signalo.)	
890.	**ortikono**	Bildoskenila tubo, alinome *bildotransiga*. La ortikono havas tre bonan sentivecon, tiel povas detekti ankaŭ ne tro lumigitajn objektojn.	
891.	**oscikvito**	Paralele aŭ serie konektitaj kondensilo kaj induktilo, kiuj havas t.n. resonan frekvencon. Ĉe resona frekvenco (f_0) la oscikvito montras nur oman rezistancon. Resona frekvenco estas tia frekvenco, ĉe kiu la kapacita kaj la indukta rezistancoj estas egalaj (X_C=X_L). Pro tio, ke la vektoraj direktoj de kapacitanco kaj induktanco estas kontraŭaj, tiuj nuligas unu la alian. En la oscikvitoj la elektra energio transformiĝas al magneta energio kaj ree, periode.	
892.	**oscilatoro**	Cirkvito, kiu por konkreta celo produktas alternan signaloserion je determinita frekvenco.	vibrilo
893.	**oscili**	(PIV: Balanciĝi alterne en kontraŭajn direktojn ĉirkaŭ ekvilibra punkto.)	
894.	**oscilo**	Periode ripetiĝanta vibrado.	
895.	**oscilografo**	Aparato por registri oscilformon de iu	

		elektra aŭ mekanika vibrado.	
896.	**osciloskopo**	Mezurilo, kiu povas vidigi la elektrajn signalojn, aperigite per *elektronfaska tubo*.	elektroskopo *skopo*
		P	
897.	**paneo de fazo**	Funkcia perturbo de multfaza sistemo, kiam unu fazo mankas.	
898.	**pantografo**	Kurentodeprenilo de elektra lokomotivo kaj tramo.	
899.	**paperkondensilo**	Kondensilo, kies izolilo (dielektro) inter la elektrodoj estas fabrikita el papero.	
900.	**paralela cirkvito**	Kies konsisteroj inter du konektopunktoj konektiĝas paralele.	
901.	**paralela oscikvito**	Cirkvito, kiu konsistas el induktilo kaj kondensilo konektitaj tiuj paralele.	
902.	**paralela resonanco**	Resonanco en paralela oscikvito, kiu reprezentas la maksimuman tensionivelon.	tensia resonanco
903.	**paramagneto**	Materioj, kiuj estas kapablaj trapreni, kaj konservi magnetecon, alinome, kiujn altiras la magneto.	
904.	**parametro**	Numerigita proprajĵo, kiu karakterizas la konsisteron aŭ la jam funkciantan cirkviton.	
905.	**paŝanta motoro**	Elektra motoro kun konstanta magneto, kiu pro la regantaj impulsoj popaŝe faras decidangulan turnon.	paŝmotoro
906.	**pendokablo**	Kablo inter kolonoj, muntita alten super la tero.	
907.	**penetro**	Estas tiu fenomeno, kiam elektronoj aŭ elektromagneta ondo faras efikon en materion.	
908.	**pentodo**	Pentodo estas tiu elektronika tubo (lampo), kiu havas kvin elektrodojn. La tria grido en la pentodo havas funkcion por forigi la malavantaĝon de tetrodo, nome la sekundaran emision. Ĉi tiu grido estas lokita en la tubo inter la helpgrido kaj la anodo kaj estas tiu nomita *bremsogrido*.	
909.	**perakva malvarmigo**	Estas tiaj grandpovumaj konsisteroj, kies varmolikado estas tiel grandvoluma, ke eviti la supervarmiĝon eblas nur per akvo daŭre trafluigata.	
910.	**perda faktoro**	Inversa valoro de la boneca faktoro.	
911.	**perdo**	Ĉiu pasiva konsistero funkcias kun perdo. La perdo estas la diferenco de la enira kaj elira povumoj. Tiu perdo estas esprimata	likado

		kun decibelo [dB].	
912.	**perdokurento**	Kurento fluigata fare de la borno/nutro-tensio, kiu ne efikas, ne faras laboron.	
913.	**perdorezistanco**	Neutila rezistanco.	
914.	**perioda tempo**	Tempero de signalo, el kies serio konsistas la tuta signalo. Ĉe alterna kurento ekz., tiu tempodaŭro, kiu pasis inter du egalaj valoroj, koncerne ekz., al nulo, je samdirekta ŝanĝo.	
915.	**periodo**	Tiu parto en regule ripetiĝanta signalo, kiu estas inter la komenca kaj la ripetanta punkto.	
916.	**permeablo**	Primateria propraĵo, kiu konsistas el la specifa kaj el la relativa permeablecoj. Ĉiuj materioj havas indikon pri ĝia magnetigebleco, kiun oni nomas *relativa permeableco* (μ_r). Ankaŭ la vakuo havas permeablecon, kiun oni nomas *specifa permeableco* (μ_0). $\mu=\mu_0+\mu_r$ La specifa permeableco estas konstanta valoro: $\mu_0=1{,}256\cdot10^{-6}$ [Vs/Am]	
917.	**permitivo**	Materia propraĵo, kiu reprezentas la grandecon de polarizado pro elektra kampo en la izolaĵoj. Tiun numeron, kiu montras la diferencon (malgrandiĝon) kompare al la vakua fortoefiko, oni nomas *dielektrika konstanto*, kaj signas per la greka litero ε (epsilono). Ĉi tiu dielektrika konstanto konsistas el du partoj: el la dielektrika (absoluta) konstanto de vakuo (el ε_0), kaj el la relativ-dielektrika konstanto ε_r, kiu konstanto montras la diferencon kompare al la vakua absolut-dielektrika konstanto. $\varepsilon=\varepsilon_0\cdot\varepsilon_r$ La ε_0 havas konkretan kvanton: $\varepsilon_0=8{,}86\cdot10^{-12}$As/Vm	dielektrika konstanto
918.	**permutado**	Laŭ takta ŝanĝado de la fazkonduktiloj por kompensi la malsimetrion.	fazŝanĝo
919.	**perŝunta ekscito**	Paralela ekscito. La ekscitbobeno estas nutrata fare de tiu bornotensio, kiu estas konektita ankaŭ al la armaturo.	elektromotoro
920.	**perturbanta kurento**	Kurento, kiu krom la propra „tasko” okazigas efikon en eksterajn cirkvitojn.	
921.	**perturbanta tensio**	Tensio, kiu krom la propra „tasko” okazigas efikon en eksterajn cirkvitojn.	
922.	**perturbo**	(PIV: Interrompo en radioaŭskultado, kaŭzita de eksteraj fenomenoj.)	ĵamo

923.	**piezo-**	Se vi konektas *unudirektan* tension al kvarckristalo, tiu deformiĝas. Se vi deformigas la kvarckristalon, estiĝas tensio inter la flankoj perpendiklaj rilate al la mekanike tuŝataj flankoj. Ĉi tiun fenomenon oni nomas *piezoelektra impreso*.	
924.	**pilo(ĉel)o**	Kurentofonto, kiu transformas kemian energion al elektra energio. Pluraj piloĉeloj kunkonektite estas la baterio. Plurfoje ŝargeblaj ĉeloj estas la akumulatoroj.	galvana ĉelo
925.	**pilotsignalo**	Superdonita signaleto porti informon apartan.	triger-signalo
926.	**pingloimpulso**	Kurento aŭ tensio formo, kiu havas tre mallongan tempodaŭron kaj ĝia pintovaloro daŭrigas ideale ĝis „nulo” da tempo. La pintovaloran intenson ĝi akiris dum treege mallonga tempo kaj simile el tiu nivelo treege rapide malintensiĝas.	
927.	**pintotensio**	La plej granda valoro de la tensio.	
928.	**pintovaloro**	La plej granda valoro de la dumtempe valormodifita signalo.	
929.	**pleniga faktoro**	Rilato inter la impulsotempo kaj la perioda tempo (*k*). $k=T_i / T_p$	
930.	**polareco**	Esprimas pozicion, situon aŭ direkton de la magnetaj polusoj, krome rilatas ankaŭ al la direkto de la *unudirekta* kurento.	poluseco
931.	**polarizigi**	Loki antenon en direkton laŭ la bezonata ondopasa polarizo.	
932.	**polarizo**	La disradiataj ondoj fare de anteno konsistas el du fortokampoj, magneta kaj elektra. Tiuj ondotipoj situas, (havas pozicion), rilate unu al la alia kaj al la disvastiĝa direkto ortangule. Depende de la pozicio de la elektra kampo oni taksas *horizontala* aŭ *vertikala* la polarizon.	
933.	**polvostruktura ferkerno**	Pro la kirlokurenta perdo oni fabrikas tiajn ferkernojn, kiuj ne havas lamenojn, sed la tuta ferkerno estas presita el ferkunfandaĵaj polvoj. La tielfabrikitajn materiojn oni nomas *feritoj*. Estas simile fabrikitaj la t.n. *durmagnetaj-materioj*, kiuj estas uzataj tie, kie bezonas permanentaj magnetoj (laŭtparolilo, mezurilo ktp.). La plej oftaj presitaj formoj de feritoj: bastoneto, tubeto, ŝraŭbo, poto, E kaj U.	polvoferkerno *ferito*
934.	**pontorektifilo**	Cirkvito el du aŭ kvar diodoj, kiu rektifas ambaŭ amplitudojn (negativan kaj	

		pozitivan) de la alterna kurento. La elira signalo estas fluktua.	
935.	**portanta kablo**	Ĝi ne konduktas kurenton, nur tenas tiun kablon, tra kiu fluas la kurento. Tiu kablo certigas stabilecon mekanikan.	tenanta kablo
936.	**potencialo**	Elektra energio. Forto elektra, rilate al alia punkto.	
937.	**postlumado**	Post kiam la elektronfasko estas malŝaltita, la lumineska tavolo de ekrano plu lumas ĝis iom da tempo. Tiu tempo dependas de la lumeliga tavolo, kaj estas mezurate ĝis la 10%-a lumintensiĝo.	
938.	**poŝlampo**	Malgranda lumigilo, kies elektrofonto estas baterio.	
939.	**potencialdiferenco**	Energiograndeco inter du elektraj polusoj.	
940.	**potencialkampo**	Spaco, en kiu estas efika la elektra energio.	
941.	**potencialmuro**	Potencialgrandeco inter du tavoloj.	*potencialdigo*
942.	**potencialo (elektra)**	(PIV: Skalara kampo, kies gradiento estas elektra kampo. Specifa valoro de elektra potencialo en difinita loko.)	tensio
943.	**potenciometro**	(PIV: Triklema rezistilo, kies meza klemo, variigebla, ebligas disdividi tension.) *(Ne uzu, ĉar en Esperanto povas esti mis-komprenebla por nefakuloj, kiel mezurilo de potencialo (tensio)!!!)*	reostato
944.	**povumo**	Kapablo por produktado, fari laboron elektran. La povumon decidas la tensio kaj la kurento. $P=U\cdot I$	
945.	**povumo efika**	Ĝi estas egala kun tiu povumo, kiun oni povas mezuri ĉe unudirekt-kurenta konsumado nomata tie **utila** povumo. En tiu okazo oni parolas pri efika povumo, se inter la tensio kaj kurento ne estas fazdiferenco ($\varphi=0^0$) aŭ tiu $\varphi=180^0$, la tensio kaj la kurento estas en kontraŭa fazo. $P=U\cdot I\cdot\cos\varphi$, en kiu ekvacio nun la $\cos\varphi=1$, kaj reprezentas la faktoron de povumo. La mezurunuo de la efika povumo estas la vato [W], tial ĉi tiun povumon oni kutimas nomumi ankaŭ vathava povumo P_W. Tiun aparaton, en kiu la fazrilato ($\varphi=0^0$), oni nomumas *konsumanta* kaj se tiu $\varphi=180^0$, la aparato estas *produktanta*.	povumo aktiva
946.	**povumo blinda**	Estas tiu senfrukta povumo, kiu tiam kreiĝas, kiam la defaziĝo inter la tensio kaj kurento ($\varphi=90^0$). Temas nur pri tio, ke la povumo balanciĝas inter la konsumilo kaj la	povumo reaktanca

		kurentofonto. La konsumilo ĝuste tiom energon redonas al la tensioreto, kiom estas eluzate el tio. La povumon blindan krom la P_b oni kutimas simboli ankaŭ kun la litero Q, kaj kalkulas kun la sekva ekvacio: $Q=U\cdot I_b$, kaj ties unuo estas la [VAr] (*varo*).	
947.	**povumo kompleksa**	Estas tiu povumo, kiu kreiĝas tiam, kiam la fazo φ estas inter la $0^0 \div 90^0$ aŭ inter 90^0–180^0 grado. Kiel la fazangulo ju pli grandas, la povumo efika des pli malgrandiĝas. Ĉe 90^0 grada fazangulo la povumo efika jam estas nulo, kiel tion vi jam ekkonis ĉe la povumo blinda. La povumo kompleksa estas signata krom la P_k ankaŭ kun la litero S, kaj kalkulebla kun la sekva ekvacio $S=U\cdot I$, kies mezurunuo, estas la voltampero [VA]. Tiu povumo tial estas kompleksa, ĉar enhavas, kaj efikan kaj blindan povumojn. Povumo efika: $P_W=U\cdot I_W=U\cdot I\cdot\cos\varphi$ Povumo blinda: $P_b=U\cdot I_b=U\cdot I\cdot\sin\varphi$	povumo ŝajna
948.	**povumo neaga**	Povumo, kiu ne faras efikan laboron.	perda povumo *likado*
949.	**povumo perda**	Estas tiu senutila povumo, kiu likadas transformiĝe al termoenergio. Ekz., kiam varmiĝas transistoro, tiu varmo estas perdita povumo.	
950.	**povumo utila**	Estas tiu povumo, kiu efektive faras laboron. Uzata tiu termino por esprimi unudirekt-kurentan povumon.	
951.	**pozitiva**	(PIV: Apartenanta al la speco de elektro, produktata per interfrotado de vitro kaj silkopeco.)	
952.	**preamplifatoro**	La unua ŝtupo de la amplifatora aparato. La tre malintensajn enirajn signalojn ne eblas rekte amplifi al uzebla nivelo, kaj tensie, kaj kurente, kiom bezonas la konsumiloj. La preamplifatoro vere estas tensio-amplifatoro.	
953.	**preciziga kondensilo**	Valormodifebla kondensilo kun mallarĝa intervalo, manipulebla per ŝraŭbo.	
954.	**preciziga rezistilo**	Valormodifebla rezistilo kun mallarĝa intervalo, manipulebla per ŝraŭbo.	
955.	**prelo**	Kontaktiloj de ŝaltiloj kaj relajsoj je la tuŝo plurfoje perdas la kontakton ĝis la stabila kontaktiĝo pro la elasteco de la kontaktilmaterio.	

956.	**premagnetigo**	Per *unudirekta* kurento iomete magnetita ferkerno.	
957.	**prembutono**	Manipulilo, per kiu oni povas ŝalti cirkviton.	
958.	**preselektoro**	Preamplifatoro, kiu traigas nur decidan frekvencointervalon.	
959.	**presita cirkvito**	Muntita cirkvita panelo, sur kiu estas jam funkcikapabla cirkvito aŭ cirkvitero.	muntopreta cirkvito *prescirkvito*
960.	**pretensio**	Estas tiu *unudirekta* tensio, kiu estas ĉe transistoroj inter la bezo kaj emitero, kaj ĉe la elektronikaj tuboj inter la katodo kaj la antaŭa ŝtupo, kiam ne estas enira signalo. Kun ĉi tiu tensio estas agordita la laborpunkto.	biastensio
961.	**primara**	Bobeno de transformilo, al kiu estas konektita la enira tensio.	
962.	**proceza figuro**	Serio de blokfiguroj, kiuj reprezentas la paŝojn sinsekvajn dum la funkciado.	
963.	**procezilo**	Integrita cirkvito havanta tiu eksterordinare tre multajn cirkvitojn. Plejofte ĝi estas uzata en komutiloj.	**PC**
964.	**profildrato**	Konduktilo, kies sekco ne estas rondforma.	
965.	**programdisko**	Kodigita disko, kiu rotacie movadas la alkuplita(j)n kontaktilo(j)n.	
966.	**progres(ant)a ondo**	Se la elira impedanco de iu altfrekvenca generatoro, kaj la impedancoj de la ŝarĝilo kaj de la inter ili estanta fidro estas egalaj, la energio de la altfrekvenca generatoro tute konsumiĝas en la ŝarĝilo. Tiu energio propagiĝas en la fidro kiel progres(ant)a ondo. La amplitudo ne ŝanĝiĝas laŭ la fidro.	
967.	**progres(ant)onda tubo**	Amplifa tubo por mikroondaj elektro-magnetaj resonadoj, (300MHz÷50GHz).	
968.	**prokraste aga kontaktilo**	Kontaktilo apartenanta al tiu relajso, kies funkciado (plej ofte la malŝalto) estas prokrastita aŭ tiu speciala kontaktilo, kies mekanika konstrukto certigas malpli rapidan transŝalton, ol tiu de la normalaj kontaktiloj.	
969.	**prokraste aga relajso**	Relajso, kiu ne tuj havas ripozan (senaktivan) pozicion, kiam ĝia cirkvito funkciiga estas malŝaltita, sed nur post decida tempo, kiun tempon determinas la alkonektitaj konsisteroj.	prokrastita ankrofalo
970.	**prokrastiga cirkvito**	Cirkvito, el kiu la eniranta signalo nur post	

		decida tempo eliras. Ĝi retenas la eliron de la signalo.	
971.	**protektado kontraŭ elektrokutiĝo**	Principoj kaj teknikaĵoj por eviti la elektrokutiĝon.	
972.	**protekta ŝaltilo de motoro**	Speciala ŝaltilo por ŝalti-malŝalti kurenton de motoro, kiu estas kapabla elteni krom la nominala kurento la ŝaltan kaj la laŭfunkcio okazantan superkurentojn. Ĝi estas kapabla por multfoja ŝaltado, kiu je la okazo nepermesata superkurento (super-ŝarĝo) malŝaltas la motoron.	
973.	**protekt-giĉeta MOD-FET**	La giĉeto de la MOD-FET-oj estas tre sentiveca pro la elektrostatika ŝarĝeco. Pro tiu ŝarĝeco tiuj facile povas difektiĝi. Por eviti la difektiĝon oni jam fabrikas tiel MOD-FET-ojn, ke al la giĉeto estas konektitaj du zeneraj diodoj, kiuj limigas la tensioalton sur la giĉeta elektrodo.	
974.	**protektilo kontraŭ supertensio**	Aparato muntita inter la tero kaj la terumadon nehavanta tensioreto, kiu trarompiĝas, se la tensio superas la nominalan potencialon.	
975.	**postleviga konekto**	Baza konektotipo amplifatora, ĉe kiu la enira regtensio dinamike grandigas (levas) la valoron de la enira rezistanco.	(Bootstrap – angle)
976.	**primara bobeno**	Bobeno de transformilo, al kiu estas konektita la enira tensio.	
977.	**prokrasto de returno**	Je malŝalto de ekscito la relajso ne tuj moviĝas al baza pozicio, sed nur post decidita tempo.	
978.	**PROM**	(***P**rogramebla* **ROM**) memorilo. La informojn mem la uzanto povas enskribi (enbruligi) en la memorilon.	
979.	**protektrelajso**	Relajso, kiu malŝaltas la kurenton, se okazas kurtcirkvito, eviti la elektro-vundiĝon.	
980.	**protektrezistilo**	Rezistilo, kiu certigas la bazŝarĝon de la nutrilo. Je senŝarĝa stato la tensiointenso povas tro grandiĝi.	
981.	**provtensio**	Iomete malgranda ol la uzina (funkciiga) tensio. Tio estas uzata por la kontrolo de cirkvito, eviti la difektiĝon pro la eventuala ne ĝusta funkciado.	
982.	**pseŭdoanteno**	Estus pliprecize nomi *pseŭdoŝarĝilo*, kiu servas la kontrolon kaj alĝustigon de la radiodissendilo, evite la ĝemadon de la elektromagneta kampo. Praktike ĝi estas rezistilo ŝirmita sen induktanco.	

983.	**pseŭdoŝarĝilo**	Rezistilo, kiu anstataŭas la aplikotan ŝarĝilon aŭ konsumilon.	
984.	**pulsanta kurento**	Ekz., tia estas la kurento rektifita unutakte el unufaza sinusa kurento. Oni parolas pli pulsado, kiam la intenso ne senhalte ŝanĝiĝas, sed dume estas tempodaŭroj samintensaj. La samintensaj niveloj periode sekvas unu la alian. Se inter tiuj periodoj estas nulo-nivelaj, tiam temas pri „intermita" kurento.	
985.	**pupindistanco**	Distanco inter du pupin-bobenoj.	
986.	**pupinizado**	Ŝargado de sonfrekvenca kablolinio per bobenoj.	
987.	**pupinsektoro**	Pupinigita kablolongeco inter du amplifatoroj.	
988.	**puŝreostato**	Reostato, kies meza kontaktilo estas movebla laŭ rekta linio.	
989.	**puŝŝaltilo**	Du, aŭ multpozicia ŝaltilo, kies pozicion oni povas ŝanĝi puŝe sen abrupta movo.	
		R	
990.	**radianta kablo**	Speciala telereganta kablo, kiu pro la trafluanta kurento elradias ondojn. Ĝi estas uzata ekz., en la fervoja tekniko por transporti informojn al la lokomotivoj. Tiuj radiantaj kabloj estas lokitaj ekz., apud la reloj.	
991.	**radioamatoro**	Hobie komunikas per radioaparato funkcianta tio en decida frekvencointervalo.	
992.	**radiofonio**	(PIV: Telefonio, uzanta elektromagnetajn ondojn.)	radiotelefonio
993.	**radiofono**	(PIV: Ricevilo funkcianta per elektro-magnetaj ondoj.)	radioricevilo
994.	**radiotelegrafio**	Telegramo ekspedata per radioteknike.	*radiogramo*
995.	**radiolokatoro**	Aparato por esplori kaj mezuri per radioondoj.	*radaro*
996.	**radiostacio**	Dissendejo, de kie oni disradias radioprogramon.	
997.	**RAM**	Skrib- / Legebla Memorilo.	*Mi devas mencii, ke la **RAM** akronimo por esprimi memorilon skrib-/legeblan, estas falsa. Certe tio okazis pro la neĝusta traduko el la angla (**R**andom Acces **M**emory), kiu vere esprimas tian memorilon, en kiu oni povas **rekte, laŭ volo***

			*atingi ajnan storoĉelon. Tiel eĉ la **ROM** memorilo povas esti ankaŭ **RAM** memorilo. La **ROM** estas precize uzata el la angla (**R**ead **O**nly **M**emory).*
998.	**rastero**	Nomo de speciala signalo aperinta sur la TV-ekrano, kiam la elektronradio nemodulita desegnas vicojn el punktoj.	
999.	**reaktanco**	La reaktanco havas kapacitan kaj induktan elementojn, tiel rilate al la frekvenco tio povas esti aŭ negativa aŭ pozitiva, kaj en resonanco ĝia resonanco estas nulo.	
1000.	**receptilo**	Konsistero kapti la eksterajn instigojn kaj transformi tiujn al elektra signalo.	sentilo
1001.	**receptoro**	Aparato kapti la eksterajn instigojn kaj prilabori tiujn al uzebla elektra signalo por aliaj cirkvitoj aŭ aparatoj.	
1002.	**referenctensio**	Etalon-tensiovaloro tre stabila, al kiu estas komparata alia tensio.	
1003.	**reflektilo**	Antenoparto de la Yagi anteno.	
1004.	**reflektita ondo**	En konduktilo pasanta ondo, kiu reflektiĝas de certa loko, kiu loko dependas de la propraĵoj de la drato (kablo). Tiu ondo, kiun reflektas la jonosfero aŭ ajna malhomogenaĵo estanta en la direkto de disradiado.	
1005.	**reflekto**	(PIV: Fenomeno, per kiu radio (luma, elektrona ks), trafanta la surfacon de korpo, estas reflektata de ĉi tiu en direkto simetria al sia antaŭa rilate al la normalo al la surfaco.)	speguliĝo
1006.	**reflektometro**	Mezurilo, kiu funkcias eluzante la ondoreflektiĝon ekz., en en la eksplorado de surfacoj elektromagnete kaj por difini lokon de kablodifektoj.	
1007.	**reflektoro**	Lumigilo por fari intensan kaj direktitan lumon.	
1008.	**rega cirkvito**	Aŭtomata regilo influanta la funkciadon de la regato laŭ la ŝanĝo de cirkonstancoj.	
1009.	**rega grido**	La unua kluzelektrodo de elektronikaj tuboj.	
1010.	**regi**	Influi funkciadon.	
1011.	**regilo**	Rega (kluz-) elektrodo en elektronikaj tuboj. La regilo ĉirkaŭas la katodon. Laŭ la tipo de elektronika tubo estas uzataj pluraj regiloj.	kluzelektrodo

1012.	**registrilo**	Provizora storo. En tiu okazo oni parolas pri registrilo, kiam la grandeco de la storenda informo estas antaŭdifinita (bitoka, diĝitvorta) kaj la storokapacito relative malgranda.	
1013.	**registro**	Surbendigo ĉe la magnetofona tekniko.	
1014.	**regulatoro**	(PV: Aparato, plejofte uzata ĉe radiodissendoj, kiu regulas la frekvencan konstanton de dissendo en la radioelektraj stacioj.)	
1015.	**reĝimo**	Kondiĉoj de funkciado aŭ funkcimaniero de maŝino, aparato aŭ cirkvito je difinita tempo.	
1016.	**rekombiniĝo**	Kiam la jonoj diverspolusaj puŝas unu al la alia, tiuj refoje fariĝas neŭtralaj molekuloj.	
1017.	**rekta kurento**	1., Povas esti kontinua kurento (fluanta konstante tra cirkvito en la sama direkto). 2., Kiu estas produktata *rekte,* senpere el alia energio. Ekz., la sunĉelo rekte produktas elektran energion el la sunradio. (Sed per generatoro aŭ dinamo produktata elektro ne estas rekta, ĉar la kurento el la magneta energio ne povas kreiĝi sen kroma energio, nome movanta. Neparolante pri tio, ke ankaŭ tiu movanta energio estas transformita el alia, ekz., termoenergio.)	
1018.	**rekta ricevatoro**	Radioricevilo, en kiu la interna frekvenco egalas kun la aŭdebla frekvenco. Ĝia malavantaĝo estas la malalta selektiveco.	
1019.	**rektifi**	Produkti *unudirektan* kurenton el alterna kurento.	
1020.	**rektifita kurento**	Kurento *unudirekta*, kiu estas produktita el alterna kurento.	
1021.	**rektifilo**	Konsistero, kies rezistanco grave diferencas laŭ la polarizo de la alkonektita tensio. Tia estas la diodo, kaj la valvo. (PV: Aparato por rektifi alternan kurenton.)	
1022.	**relajo**	(PIV: Aparato, kiu ricevas malfortan efikon kaj kiu siavice resendas la saman aŭ similan efikon fortigitan, aŭ kiu resendas diferencan efikon deziritan; la efikoj ricevataj kaj elsendataj povas esti mekanikaj movoj, elektraj kurentoj, pulso de lumo ktp.)	
1023.	**relajso**	Elektromagneta ŝaltilo.	
1024.	**relajso direktosenca de kurento**	Nur je decida kurentodirekto ĝi povas ekscitiĝi.	

1025.	**relaksa oscilatoro**	Oscilatoro, en kiu la kondensil-ŝargoplenigon malŝargiĝo sekvas tra rezistilo, kaj ĉi tio periode daŭras. Estas konataj unustabila, dustabila kaj *flopo*-tipa.	
1026.	**reluktanco**	Magneta rezistanco de la (senbreĉa) ferkerno. Reciproka permeablo.	
1027.	**remanenco**	Restanta magneteco, post kiam estas ĉesigita la magnetigo.	
1028.	**rendimento**	Funkcia kvalito esprimata en procento, kalkulita kvociento el la utila energio dividite kun la enira energio.	
1029.	**reostata bremso**	La elektromotoroj povas funkcii, ankaŭ kiel generatoroj. Se oni malŝaltas la kurenton de sur la motoro, tiu dum iom da tempo haltos. Se oni volas haltigi plirapide, tiam konektas ŝarĝon sur la konektopunktoj de motoro, kiu nun funkcias, kiel generatoro transformante la movenergion al elektra energio. Laŭ la ŝarĝograndeco la motoro haltas dum malpli da tempo, ol simple malŝaltite. Tiu bremso estas uzata ekz., ĉe la tramoj.	
1030.	**reostato**	(PIV: Aparato de laŭdezire varianta elektra rezistanco por variigi kurentintenson en cirkvito.)	
1031.	**reprodukto**	La diversmaniere storita informo estas retransformata al spertebla formo por la homaj sentorganoj (aŭdi, vidi).	
1032.	**repulsiva motoro**	Unufaza, kurentokolektanta motoro, kies rotoro konektiĝas al kurtcirkvito pere de frotiloj tuŝantaj la kurentokolektilon. Tiuj frotiloj estas apartaj de la ĉefcirkvitaj frotiloj, tiel tiu motoro estas duobla frotilpara motoro. La regado de la rivolunombro de tiu motoro estas pli facila kaj simile ankaŭ la ŝanĝo de la rotaciodirekto.	repuŝa motoro, Déri-motoro
1033.	**resolvero**	Elektra maŝino havanta dufazajn volvaĵojn kaj en la statoro kaj en la rotoro. Tiu maŝino povas produkti tensiojn, kies fazoj havas rilaton unu al la alia 90^0, krome estas kapabla fari koordinatan transformadon.	
1034.	**resona frekvenco de anteno**	Kiam la reaktanco estas nulo ĉe la konektopunkto, la anteno resonas kun konkreta frekvenco. Ĉe duon-ondolonga dipolo la frekvenco *f*=143/*sm*, kie la *f* estas en MHz kaj la longeco *sm* estas en metro. Ĉe kvaron-ondolonga anteno *f*=71/*hm*, kie la *hm* estas la alteco de la antenomasto en metro. La antenoj povas resoni kun superharmonoj, sed tiam la nadirimpedanco	

		ŝanĝiĝas.	
1035.	**resonanca amplifatoro**	Speciala amplifatoro, kiu nur decidan bendon de frekvencoj estas kapabla amplifi.	
1036.	**resonanco**	Kunoscilado; io oscilas kun sama periodo rilate al la baza frekvenco.	
1037.	**resonilo**	Ilo, kiu povas transpreni la oscilon de sia ĉirkaŭaĵo.	resonatoro
1038.	**restanta kurento**	Fluanta kurento tra la malŝaltita duonkonduktila konsistero. Ekz., se la bezkurento I_B=0, tiam la kolektorkurento egalas $I_K=(1+B)\cdot I_{KB0}$. Ĉi tiu restanta kurento estas neglektebla ĉe la silicio-transistoroj.	
1039.	**restatigo**	Funkcio en diĝitaj aparatoj, la dustabilajn kaj nombrigajn cirkvitojn statigi (agordi) al decida starta pozicio.	
1040.	**reta tensio**	Potencialdiferenco, kiu estas mezurebla en la multfaza sistemo inter du fazkonduktiloj.	linea tensio
1041.	**retroinfluo**	En la aktivaj konsisteroj okazas, ke la kurentoŝanĝo de la elirpunkta elektrodo reefikas al la regelektrodo. Oni parolas pri retroinfluo ankaŭ inter cirkvitopartoj, kiun eblas bari per ŝirmado kaj uzante optokuplilon.	*retroigo*
1042.	**retrokonduktilo**	Plej ofte la nulkonduktilo aŭ la (–) konduktilo de *unudirekta* tensio.	
1043.	**retrokupla koeficiento**	La grandecon de la retrokuplado, la *retrokuplan koeficienton* (*rk*) donas la ono de la bazamplifado (A) kaj la retrokupla amplifado (A_{rk}). $$rk = \frac{A}{A_{rk}}$$	retrokupla faktoro, (β), *retrofaktoro*
1044.	**retrokuplo**	Efiko, kiam energio retroiras de la eliro al la eniro de cirkvito. La retrokuplo povas okazi intence aŭ neintence kaj povas esti aŭ pozitiva aŭ negativa. La neintenca retrokuplo estas malefika. La negativa retrokuplo okazigas malintensiĝon de amplifeco, sed estigas plistabilecon. La pozitiva okazigas ekcitiĝon kaj estas uzata en la oscilatoroj.	
1045.	**retrokurento**	Kurento, kiu estas mezurebla en la „nul” aŭ „baz” konduktilo, refluante al la nutrilo.	
1046.	**retropoluso**	Komuna poluso de la enirejo kaj la elirejo.	bazpoluso
1047.	**retropunkto**	Tiu punkto, al kiu estas konektita la retropoluso.	retropoluso

1048.	**returno**	Movo de relajso al baza pozicio.	
1049.	**rezerva tensioreto**	Certigas nutradon dum la malfunkciiĝo de la ĉefa tensioreto. Ekz., motorgeneratoro.	
1050.	**rezinhava plumbostano**	Fandigebla dratforma metalo por fiksi la konsisterojn sur muntopanelon per lutado.	*rezinstano*
1051.	**rezistancmetro**	Aparato, per kiu oni povas mezuri la valoron de la rezistanco.	
1052.	**rezistanco**	Efiko, kiu baras, limigas la intenson de la kurentofluo. Ĝi bremsas la movon de la ŝargoportantoj.	rezisteco
1053.	**rezistanto**	Materio, en kiu estas malmultaj liberaj elektronoj, tiel estas kapabla bari, limigi la intenson de kurento.	
1054.	**rezistilo**	Konsistero fabrikita el rezistanta materio.	
1055.	**ricevilo**	Aparato por aŭskulti radiodissendojn.	ricevatoro
1056.	**rilaksa cirkvito**	Cirkvito, en kiu fluas, nek sinusoidaj, nek diĝitaj signaloj. Ekz.: cirkvito kun segildent-forma signalo en TV-aparato, ktp.	
1057.	**rilatdetektilo**	Demodulilo por frekvenco-modulitaj signaloj.	
1058.	**ring-modulilo/miksilo**	Cirkvito, kiu estas kapabla krei eksterordinarajn sonojn el la signaloj de muzikinstrumentoj. La enirajn du signalojn tiel modulas/miksas, ke en la elira signalo ĉeestas ties, kaj adiciita, kaj diferenca frekvencoj. Tiuj frekvencoj plej ofte malharmonas, pro tio la kunsono okazigas disonancon.	Vidu ankaŭ la Duobla Balans-Modolilo/Miksilo (**DBM**)!
1059.	**ringosparkado**	Okazas ĉe komutilo de motoro dum kurtcirkvita difekto. (Mi mencias, ke estas sperteblaj iom da sparko ankaŭ dum sendifekta funkciado inter la frotilo kaj komutilo, sed tiuj ne ringiĝas.)	
1060.	**riparejo**	Laborejo (metiejo), kie oni riparas la difektitajn aparatojn.	
1061.	**ripoza kontaktilo**	Kontaktilo de relajso, kiu tiam fermas la cirkviton, kiam la relajso estas en *neekscita* stato.	
1062.	**ripoza stato**	Ekz., kiam relajso ne estas ekscitata.	
1063.	**rotacia kodilo**	Konsistero turnigebla sen finaj pozicioj. Ĝi eligas signalojn pri la nombro de turniĝo kaj ties direkto.	diĝita reostato

1064.	**rotacia nombro**	Nombro, kiu montras, ke kiom turniĝas la rotoro tutronde dum unu minuto.	rivolunombro
1065.	**rotoro**	Rotacia parto de la elektra maŝino (motoro, generatoro, dinamo).	
1066.	**rubandokablo**	La dratoj de la kablo ne estas plektitaj, sed tiuj estas serie lokitaj unu apud la alia.	
1067.	**REPROM**	**REP**rogramebla **ROM** memorilo (storo). Per UV lumo forstrekebla memorilo, kiun la uzanto povas refoje programi.	
1068.	**ROM**	Nur legebla memorilo (storo), havanta nemodifeblajn, fiksinformojn.	
		S	
1069.	**samaksa kablo**	Dupolusa kablo al decida frekvencobendo, kies unu konduktanto estas metalmantelo funkcianta samtempe, kiel ombrumo.	antenokablo koaksiala kablo
1070.	**satura tensio**	Valoro de la bornotensio, ĉe kiu la amplifilo jam ne estas regebla kaj ties kurento atingas la maksimuman valoron. La amplifa konsistero estas jam plena kun ŝargoportantoj.	
1071.	**saturiĝo**	Konsistero aktiva pleniĝas per ŝargo-portantoj.	
1072.	**segilsigno**	Impulsosignalo, kiu havas formon similan al la segildentoj. Tia signalo estas uzata ekz., por la horizontale defleksiga tensio en osciloskopoj.	segilimpulso, segildenta signo
1073.	**sekundara bobeno**	Bobeno de transformilo, el kiu estas prenita la elira tensio.	
1074.	**sekvanta generatoro**	Suplementa aparato por la heterodina spektroanalizilo. Sinusonda generatoro, kiu produktas stabilamplitudan signalon, kies frekvenco egalas kun la samtempa frekvenco de spektroanalizilo.	
1075.	**selektiva relajso**	Relajso, kiu povas funkcii nur en difina frekvencobendo.	
1076.	**selektiveco**	Kapableco de radioaparato por elekti ĝuste la deziratan radiodissendon.	
1077.	**selektoro**	Estas kapabla ŝalti ajnan funkcion el pluraj cirkvitoj.	elektanta ŝaltilo
1078.	**selsino**	Malgranda elektra maŝino, kiu estas kapabla telemezuri rotacian pozicion.	
1079.	**sendejo**	Elektrodo de FET-oj, el kiu fontas, emisiiĝas la ŝargoportantoj.	
1080.	**sendependa kontaktilo**	Speciala kontaktilo de apogita relajso. Ĉi tiu	

		kontaktilo ne estas apogita, do post la malŝalto de la relajsocirkvito, ĝi reviĝas el aktiva pozicio al baza pozicio.	
1081.	**senmova induko**	Oni parolas tiam pri *senmova induko*, kiam dum la indukado la bobeno ne moviĝas. Moviĝas nur la magneto.	
1082.	**sensparka kontaktilo**	Kontaktilparo, je kies al- aŭ diskonektado ne povas estiĝi sparko.	
1083.	**senŝarĝa amplifeco**	Amplifeco de amplifatoro, kiam la elirejo estas malferma, do tio ne estas ŝarĝata.	
1084.	**sentemo**	Propraĵo de cirkvito, aparato kontraŭ la influoj eksteraj, kiuj povas esti ekz., termika, mekanika, elektrostatika kaj magneta.	
1085.	**sentiveco**	Propraĵo de cirkvito, aparato rilate al la enira signalo minimuma.	
1086.	**senzoro**	Konstruelemento, kiu povas transformi neelektran fenomenon al elektra kvanto.	perceptilo, sentilo
1087.	**seria oscikvito**	Cirkvito, kiu konsistas el induktilo kaj kondensilo konektitaj tiuj serie.	
1088.	**seria resonanco**	Resonanco en seria oscikvito, kiu reprezentas la maksimuman intenson de la trafluanta kurento.	kurenta resonanco
1089.	**signalformigilo**	Speciala cirkvito, kiu ne produktas signalon, nur modifas ties formon. El la analoga signalo ĝi produktas diskretan signalon por diĝitaj cirkvitoj.	
1090.	**signalgeneratoro**	Radiofrekvenca sinusonda generatoro, kies elira signalo estas modulita.	
1091.	**sinkrongeneratoro**	1.) Sinkronmaŝino, kiu la mekanikan energion transformas al elektra energio. 2.) Cirkvito en la televidtekniko, kiu certigas la sinkronfunkciadon inter la ricevatoro kaj la dissenda aparato.	
1092.	**sinkroni**	Certigi, reguli la samtempan sinkron-funkciadon inter la kunapartenaj maŝinoj, aparatoj.	
1093.	**sinkronilo**	Cirkvito, kiu aŭtomate regulas la frekvencojn de du memstaraj oscilatoroj, estu tiuj samaj.	sinkronizatoro
1094.	**sinkronmaŝino**	Elektra maŝino funkcianta per alterna kurento, kies rotoro sinkron-rotacias kun la estiĝanta rivolua magneta kampo.	

1095.	**sinkronmotoro**	Elektromotoro funkcianta per alterna kurento, kies rotoro sinkron-rotacias kun la estiĝanta rivolua magneta kampo.	
1096.	**sinkronsignaloj**	Startiga signalo en la televidtekniko por certigi la sinkronfunkciadon (ĝustan, samtempan starton de la elektronradio) en la skanotubo kaj la kineskopo.	sinkroigaj signaloj
1097.	**sinoptika skemo**	Sur la rega tabulo elformita figuro montranta unulinian cirkviton kun regiloj kaj aperigiloj.	
1098.	**sintezilo**	Frekvencotransformilo el la signalo de kvarcoscilatoro, kies frekvenco estas konstanta. La frekvencobendo de la elformitaj signaloj estas larĝa kaj tiu larĝeco estas trapasita kun tre etaj paŝoj.	sinteza generatoro
1099.	**skalfikso**	Precizeckontrolo, alĝustigo de instrumento por mezuri precizan valoron.	
1100.	**skanado**	Procezo, kiam la bildo estas malkomponita al bilderoj, dissendotaj sinsekve unu post la alia.	
1101.	**skanoproporcio**	Numero, kiu tion montras, ke al kiom da ero (ŝtupo) estas disigita ajna analoga signalo.	
1102.	**skemofiguro**	Desegnaĵo pri cirkvito montranta la ligojn inter la konsisteroj.	
1103.	**skemo laŭ munto**	Desegnaĵo pri cirkvito laŭ la vojo de kurento, nehavante krucaĵojn.	muntoskemo
1104.	**skinefiko (surfaca efiko)**	La altfrekvencaj kurentoj nur sur la surfaco fluas tra la konduktilo (fadeno, drato).	
1105.	**skot-transformilo**	Speciala transformilo, per kiu oni povas fari el la trifaza kurento dufazan kurenton.	Scott-konekta transformatoro
1106.	**skribokap(et)o**	Konsistero en la magnetofono, per kiu oni povas „skribi” sur la bendon.	
1107.	**soklo (ingo)**	Konektingo por ampolo, elektronika tubo ktp.	*soklingo*
1108.	**soklo (kapo)**	Parto de ampolo, elektronika tubo ktp., per kiu ĝi estas konektebla en konektingon (*soklingo*).	*soklo*
1109.	**solenoido**	Speciala induktilo, havanta ringforman bobenon.	
1110.	**sordido**	Malpuraĵo en duonkondukt-anta teknologio.	Vidu ankaŭ ĉe la akceptoro!
1111.	**sparkestingo**	Maniero por malebligi la kreiĝon de sparko je al- aŭ diskonektado de kontaktiloj.	

1112.	**sparkilo**	Konsistero, kies sparko ekbruligas la benzinon en la motoro. La sparkon estigas alta tensio inter la elektrodoj.	bruligkandelo
1113.	**sparko**	Momenta kurentofluo tra aero inter du elektrodoj, kio okazigas ekluman fenomenon.	
1114.	**sparkoarko**	Daŭra kurentofluo tra aero inter du elektrodoj, kio okazigas luman fenomenon.	elektroarko
1115.	**sparkobreĉo**	Spaco inter du elektrodoj, en kiu pro supertensio okazas trarompo kreante elektrosparkon. Tiu estas trovebla ekz., sur la bruligkandelo (sparkilo) de la benzinmotoroj.	
1116.	**specifa konduktanco**	La specifa konduktanco estas grava propreco de la materioj, rilate al la elektroniko, kiu reprezentas la movkapablecon kaj nombron de la ŝargoportantoj, do la fluigkapablon de la kurento. Ĉi tiu specifa konduktanco en la ekvacioj estas signata kun la litero (**γ)** „gamo”. Ĝi estas reciproka valoro de la specifa rezistanco. $\gamma = \frac{1}{\varrho} = \frac{1}{\Omega m}$	
1117.	**specifa rezistanco**	Ĉiuj materioj havas t.n. *specifan rezistancon*, kiu rezistanco dependas de la atoma strukturo de materio. La specifan rezistancon oni decidis unuece al ĉiu materio, en heksaedra formo, havanta tiu heksaedro 1m-an eĝon. En la praktiko oni mezuras tion ne laŭ metro (m), sed laŭ milimetro (mm). Specifa rezistanco = $\varrho = \frac{\Omega \cdot mm^2}{m} = \Omega \cdot m$ **ϱ(ro)**, **Ω (omo)** La involucia valoro de la specifa rezistanco estas la *specifa konduktanta poveco* ***(konduktanco)***.	
1118.	**spektro**	Intervalo, en kiu elektronikaj proprajĵoj, rilataj unu al la alia estas analizataj. Unu elektronika proprajĵo, ĉiam la frekvenco estas.	
1119.	**spektroanalizilo**	Aparato, per kiu samtempe estas analizeblaj la amplitudoj rilataj al frekvencoj de periodaj signaloj.	

1120.	**spontanea malŝargo**	Fenomeno ekzistanta ĉe pilo, akumulatoro kaj kondensilo, kiam tiuj sen ŝarĝo ekstera perdis sian ŝargon post tempo, pro la interna rezistanco.	
1121.	**stabila kurentofonto**	Nutrocirkvito, kiu sendepende de la ŝarĝo ĉiam certigas stabilan (konstantan) bornotension.	
1122.	**stabiligatoro**	Cirkvito aŭ aparato, kiu estas kapabla teni je decida nivelo konstante la eliran tension.	
1123.	**stabiligilo**	Konsistero (ekz., *zenero*), kiu tenas je decida nivelo la tension konstante, sur ĝin konektitan.	
1124.	**staranta ondo**	Se la impedanco de la ŝarĝilo diferencas de la la fidroimpedanco kaj de tiu de la generatoro, parto de la altfrekvenca energio reflektiĝas, kaj tiu reflektita ondo kun la antaŭen pasanta ondo formas iun konstantan amplitudo-distribuon. Laŭ la fidro estas observeblaj minimumaj kaj maksimumaj amplitudvaloroj.	
1125.	**statoro**	La *statoro* estas tiu parto de *motoro* kaj *generatoro*, kiu ne turniĝas dum la funkciado.	
1126.	**stelforma konekto**	Alkonekta sistemo ĉe la trifaza nutrado. La tri bobenoj estas stelforme kunmuntitaj. „Y”	*stelkonekto*
1127.	**stopkontaktilo**	Helpŝaltilo, kiun funkciigas finpozicio de iu movanta mekanikaĵo.	stopŝaltilo
1128.	**storo**	Deponilo por diĝitaj informoj.	memorilo
1129.	**strikta kuplo**	Indukta kuplo inter bobenoj, kiam la plej multaj fortolinioj partoprenas en la energiotransportado.	
1130.	**stroboskopo**	Intensan lumon eliga aparato intermite laŭ la regado.	
1131.	**substacio**	En la elektra reto funkcianta nodo, kiu disbranĉigas la alttensian energion kaj faras konekton al la malalttensia publika reto.	elektra substacio
1132.	**subtera kablo**	Speciala kablo havanta plurajn mantel-tavolojn, tiel ĝi estas kapabla elteni la subterajn cirkonstancojn.	
1133.	**subtrahtoro**	Cirkvito per operacia amplifatoro, kies elira tensio egalas kun diferenco de la eniraj tensioj.	
1134.	**superdonita signalo**	Aldonita signaleto al la ĉefsignalo porti apartan informon.	pilotsignalo

1135.	**superharmono**	La frekvenco de la alternaj signaloj konsistas el multaj plialtaj frekvencoj. Tiujn frekvencojn, kiuj estas *entjeraj multobligoj* de la bazfrekvenco, oni nomas *super-harmonoj*.	
1136.	**superheterodino**	Konvertado de la portanta radiofrekvenco al mezfrekvenco tiel, ke dume la modulanta signalo ne modifiĝu.	
1137.	**superkonduktanco**	Ekzistas tre malalta temperaturo, -273^{0}C, ĉe kiu la konduktanco altiĝas en konduktilo miliardoble ol ĝenerale, do ties rezistanco estas praktike nulo. Tiun efikon oni nomas *superkonduktanco.*	
1138.	**superkonduktilo**	Konduktilo, kies rezistanco estas nulo.	*supra* konduktilo
1139.	**superkurento**	Tre intensa kurentonivelo, grave superanta la nominalan kurentointenson.	
1140.	**superkurtondo** **S**uper-**K**urt-**O**ndo	Radio kaj TV dissenda bendo, havanta frekvencojn super 300MHz.	**SKO**
1141.	**supermalŝargo**	Kiam akumulatoro estas malŝargita sub ties minimuma bornotensio. (ekz., tiu minimuma bornotensio ĉe 12V-a akumulatoro estas 10V)	
1142.	**supermalŝarĝo**	Okazas tiam, kiam oni elprenas pli multon da elektra energio el akumulatorto, ol tiu restus reŝargebla.	
1143.	**superponi**	Superdoniĝi, surdoniĝi, surmetiĝi, supermetiĝi fare de iu signalo al la alia.	aldoniĝi
1144.	**superŝargo**	Kiam akumulatoro estas ŝargita plu ties maksimuma bornotensio. (ekz., tiu maksimuma bornotensio ĉe 12V-a akumulatoro estas 16,5V)	
1145.	**superŝarĝo**	Pli granda ŝarĝo ol, kiun povas elteni sen difekto cirkvito, aparato aŭ mem la nutrilo.	
1146.	**superregado**	Funkciostato, kiam la enira signalo estas tiom granda, ke ties aspekto modifiĝas dum la amplifado. Tiu distordo atingante decidan grandecon jam estas aŭdebla. La sento de distordo dependas de la aŭskultanto. Ĝenerala valoro estas la –3dB-a amplifecŝanĝo, kion jam certe oni sentas per orelo. Por bonkvalitaj amplifatoroj tiu valoro estas determinita al –1dB.	
1147.	**supertensio**	Estas pli granda tensio, ol tiom permesata.	trotensio
1148.	**surfaca efekto**	La altfrekvenca kurento ne uzas la tutan sekcon de la konduktilo, nur ĝian surfacon.	
1149.	**surfaca ondo**	La surfaca ondo, aŭ alinome bazondo estas	bazondo

		tiu radioondo, kiun disradias rekte la sendatoro. Ĉi tiu ondo sekvas la surfacon de la tero.	
1150.	**surpaperigilo**	Aparato por skribi aŭ desegni sur paperon, apartenaĵo al komputilo, similas al la elektra tajpilo.	presilo
		Ŝ	
1151.	**ŝalti**	Ekfunkciigi.	
1152.	**ŝaltilo**	Elektromekanika konsistero, kiun la uzanto povas funkciigi permane.	
1153.	**ŝaltmagneto**	Elektromagneto por movi la mekanikan parton de ŝaltilo.	relajso
1154.	**ŝaltodiodo**	Speciala diodo, kiu povas tre rapide traigi aŭ reteni (ŝalti aŭ malŝalti) kurentofluon.	
1155.	**ŝaltoregata nutrocirkvito**	Ne daŭre funkcianta nutrocirkvito. Ĝi estas alterne ŝaltita-malŝaltita laŭ la ŝarĝobezono. Tiu ŝaltoperiodo funkcias inter 10÷100kHz frekvencoj.	ŝaltoreĝima nutrilo
1156.	**ŝaltotempo**	Tempodaŭro, kiu estas bezonata por ŝanĝi valoron inter du tensioniveloj.	
1157.	**ŝargadbobeno**	Estas uzataj bobenoj laŭ decidaj distancoj por grandigi la indukton de la cirkvito en sonfrekvenca signal-transportado per kablo.	pupin-bobeno
1158.	**ŝargilo**	Aparato, per kiu oni povas ŝargi (plenigi kun elektronoj) akumulatoron.	
1159.	**ŝargo**	Havo de elektronoj. Tiu agado, per kiu oni enmetas elektran energion, ekz., en akumulilon, en kondensilon.	
1160.	**ŝargodemovo**	Translokiĝo de elektronoj.	
1161.	**ŝargoportanto(j)**	Konduktaj elektronoj.	
1162.	**ŝargotempo**	Tiu tempo, kiu estas bezonata por plenigi kun ŝargo kondensilon aŭ akumulatoron.	ekz., ĉe *akuo*
1163.	**ŝarĝlimo**	Maksimuma ŝarĝo, kiu ankoraŭ ne okazigas difektiĝon en cirkvito, aparato.	
1164.	**ŝarĝo**	Al la eliro konektita rezistanco, plejofte konsumilo.	
1165.	**ŝarĝrezistanco** **ŝarĝorezistilo**	Rezistilo, plej ofte impedanco, kiu ŝarĝas la eliron de cirkvito.	
1166.	**ŝirmita kablo**	Speciala kablo, kiu havas mantelon ankaŭ el metalo por ŝirmi la konduktan fadenon kontraŭ la eksteraj elektraj kaj magnetaj influoj.	

1167.	**ŝov-registrilo**	Speciala registrilo. La informojn oni povas po bitoj, paŝo post paŝo enskribi kaj ellegi.	
1168.	**ŝtopingo**	Truohava konektilparto, en kiu ŝtope la ŝtopilon oni povas fari elektrajn konekton. Estas fabrikata unu, du kaj multpolusaj konektiloj.	
1169.	**ŝraŭba soklo (kapo/ingo)**	Helica konektokapo/ingo por konekti ampolon. Laŭ mezuro de helicodiametro ĝi havas diversajn tipojn, kiuj estas: liliputa (10mm), miniatura (14mm), normala (27mm) kaj goljata (40mm)	Edison-kapo/ingo
1170.	**ŝtupa ŝaltilo**	Multpozicia ŝaltilo.	ĝekslo
1171.	**ŝtupo**	Cirkvitoparto, kiu povas ankaŭ memstare funkcii.	
1172.	**ŝuntkondensilo**	Paralela ŝarĝkondensilo.	
1173.	**ŝunto**	Paralela ŝarĝrezistilo.	paralelaĵo
1174.	**ŝuntosentiveco** (trakcirkvito)	Signifa propraĵo de trakcirkvito, numerita en omo, kiu montras tiun valoron de ŝunto, sub kiu la funkciado sekura de cirkvito estas certigata.	
1175.	**ŝuntoŝtupo**	Cirkvitero, kiu ŝuntas la elir-signalon.	
		T	
1176.	**taĥometro**	Aparato, per kiu oni povas mezuri rapidon de veturiloj.	
1177.	**tajda elektrocentralo**	Surmara hidrodinamika energiafonto, kiu eluzas la tajdan fenomenon.	
1178.	**taktofrekvenco**	Nombro de la sinsekvaj taktoimpulsoj po sekundo.	
1179.	**takto(signalo)**	Funkciopaŝon reganta impulsoserio kun konstanta frekvenco por diĝitajn cirkvitojn.	
1180.	**tank-ŝtupo**	Povuma elira ŝtupo de sendilo, al kiu estas kuplita la anteno.	tank-oscikvito
1181.	**tardigo**	Prokrasto de iu elektra signalo je iu certa valoro.	prokrastigo
1182.	**tavoltemperaturo**	Temperaturo de duonkonduktila tavolo dum funkciado. Ĝia maksimuma valoro estas grava dateno, kiu superiĝe la konsistero difektiĝas. Por limigi ĉi tiun temperaturon oni kutimas uzi *konvektilon*, *malvarmigan radiatoron, (ripon)*.	
1183.	**telefonlineo**	Vojo por konekti telefonaparaton al la telefoncentralo. Teknike dratparo tra pluraj konektoskatolo.	

1184.	**telefoncentralo**	Teknikaĵo, kiu certigas per mane aŭ aŭtomate la kunkonektigon de la diversaj telefonlineoj.	telefonoficejo
1185.	**telegrafa masto**	Kolono, kiu tenas tiujn kablojn (telegrafajn dratojn), kiuj kondukas la telegrafkurenton.	
1186.	**telegrafo**	Aparato, per kiu oni sendas telegramon radiofone.	
1187.	**telekomandilo**	Aparato, per kiu oni povas regi alian aparaton pere de ondoj radia aŭ luma.	
1188.	**telekontrolo**	De malproksimo oni povas kontroli funkciadon. (Ne certigas influon aŭ regadon.)	
1189.	**telemetrio**	De malproksimo farata mezurado kun elektraj signaloj.	telemezurado
1190.	**teleregado**	Funkcioinfluo de malproksimo.	
1191.	**telereganta kablo**	Kablo, per kiu oni faras teleregadon de malproksimo.	
1192.	**teleregata ŝaltilo**	Aparato, per kiu oni povas de distanco ŝalti aŭ malŝalti alian aparaton. Inter la teleŝaltilo kaj la ŝaltata aparato la ligo povas esti per drato aŭ per ondoj.	teleŝaltilo
1193.	**televidilo**	Aparato por transporti radiofone kaj sonon kaj bildon.	
1194.	**tempokonstanto**	Tempodaŭro, kiu estas bezonata por ŝargi aŭ malŝargi kondensilon kaj induktilon ĝis decida nivelo.	
1195.	**tensio**	Elektra streĉo inter du punktoj. Potencialdiferenco rilate al la energionivelo. La tensio inter la du konektopunktoj de rezistilo proporcias al la intenso de la ĝin trafluanta kurento. **Tensiotipoj laŭ alteco:** Eta tensio estas pli malgranda ol 24V. Basa tensio estas inter 24V÷65V. Uzina tensio estas inter 65V÷110V. Publika tensio variiĝas: 100V (110), 220V (230V), 380V (400V). Linia tensio estas inter 380V÷1000V. Alta tensio estas pli alta ol 1000V. Superalta tensio estas pli alta ol 100 000V.	
1196.	**tensioaldono**	En cirkvito de segilforma impulso-generatoro por akiri linearan ŝargon de kondensilo oni retrokuplas helptension de la elirejo al la enirejo tra kondensilo. Tiu maniero estas uzebla ankaŭ en finamplifatoroj por certigi relative stabilan laborpunkton, kiam pro la granda elira	

		povumo la nutrotensio malaltiĝas.	
1197.	**tensioduobligilo**	Speciala rektifilo konstanta el du diodoj kaj el du kondensiloj, en kiu cirkvito la du diodoj ŝargas la du kondensilojn, serie konektitajn, tiel sur tiuj kondensiloj la duobla tensio estiĝas. Pluajn duobligilojn kunkonektite oni povas multobligi la tensiojn.	
1198.	**tensiofalo**	Valorperdo de tensio inter la ŝtupoeliro kaj eniro.	
1199.	**tensiogeneratoro**	Generatoro havanta tre malgrandan internan rezistancon (R_{in}), tial la bornotensio estas relative stabila, nur iomete ŝanĝiĝas de la ŝarĝo. Se R_{in}=0, tiel la *tensio* estas **sendependa** de la *ŝarĝokurento* (konsumata), tiam la tensiogeneratoro estas **ideala**.	
1200.	**tensiomultobligilo**	Kunkonektitaj tensio-duobligiloj, kies produto dependas de la nombroj de ŝtupoj.	
1201.	**tensionivelo**	Grandeco de la tensio.	
1202.	**tensiopinto**	Pinta valoro de la tensioimpulso.	
1203.	**tensioripetilo**	Speciala operacia amplifatoro, kies retrokupla amplifeco A_{urk}=1. La enira rezistanco estas tre granda kaj la elira rezistanco estas tre malgranda de la ĉi-tipa amplifatoro, kiu vere nur *ripetas* la eniran signalon ĉe la elirejo.	
1204.	**tensioŝanĝilo**	Cirkvito aŭ ŝaltilo, kiu povas elekti el la diversaj tensiotipoj.	
1205.	**tensioŝanĝo**	Ŝanĝo inter la diverstipaj aŭ diversnivelaj tensioj.	
1206.	**tensioŝtupo**	La tensionivelo inter du cirkvitoŝtupoj ne egalas. Ekz., la elira tensio (U_{el}) de la antaŭa cirkvitoŝtupo estas pli alta ol tiu de la enira tensio (U_{en}) de la sekvanta cirkvitoŝtupo.	
1207.	**tensiostabiligado**	Agado, kiu tenas la nutrotension en tre mallarĝa intervalo sendependе de la enira tensiŝanĝo aŭ de la variiĝo de la ŝarĝograndeco.	
1208.	**tensiostabiligilo**	Aparato, kiu tenas la nutrotension en tre mallarĝa intervalo sendependе de la enira tensiŝanĝo aŭ de la variiĝo de la ŝarĝograndeco.	
1209.	**teoria funkciado**	Klariga priskribo pri la funkciado de cirkvito, aparato.	

1210.	**teoria skemo**	Skemo pri cirkvito, kiu ne enhavas la tipojn kaj valorojn de la konsisteroj.	
1211.	**terkonekta stango**	Stango, kiu alterumas la restantan ŝargon post la tensiomalŝalto de sur la katenario. Krom tio, tiu certigas defendon kontraŭ la malintenca ŝalto de tensio por eviti elektrokutiĝon.	
1212.	**terkonektilo**	Konektilo por kunligi la komunan punkton de aparato (*ĉasio*) kun la terpunkto. La kunligo devas esti tre malgrand-rezista.	
1213.	**terkonektila maŝo**	En aparato funkcianta en altfrekvenco la terkontaktilojn oni devas kunligi. Sen tio estiĝas terkontaktilaj maŝoj, kiuj influas la funkciadon de la aparato, okazigas bruon, interferon.	*teruma maŝo*
1214.	**terkontakto**	Kondukta kunligo al la tero.	*terumo*
1215.	**termistoro**	Rezistilo, kies valoro variiĝas grave pro la temperaturŝanĝo. La valorŝanĝo povas esti kaj negativa, kaj pozitiva. La negativŝanĝan oni nomas *negativtemperatur-koeficienta* (NTK), la pozitivŝanĝan *pozitivtemperatur-koeficienta* (PTK) rezistilo.	
1216.	**termoelektra cenralo**	Elektrocentralo, kiu produktas elektran energion el termoenergio.	
1217.	**termomalŝaltilo**	Gardilo kontraŭ superŝarĝo, havanta prokrastitan malŝalton, kiun funkciigas termoefekto fare de la trafluanta kurento.	termoellasilo
1218.	**termorelajso**	Speciala relajso por je difinita termonivelo ŝalti aŭ malŝalti cirkviton.	
1219.	**termoŝrumpanta kablomufo**	Izolanta ujo por kabloligo, kiu estas fermebla kun varmigo pro ties sinteza materio. Tiu specila plastiko ŝrumpiĝas pro varmo.	ŝrumpomufo
1220.	**tersendependa**	Tensioreto, kies nenia poluso estas konektita al la tero.	
1221.	**tersimetria (tensio)**	Tensio, kiun tia generatoro produktas, kiu havas mezan elkondukon konektitan al la tero. Rilate al tiu teruma punkto ambaŭ polusoj de tensio havas egalan grandecon.	
1222.	**temperatura koeficianto**	Grava dateno de konsistero, kiu tion montras, ke pro la ŝanĝo de temperaturo al kiu direkto kaj kiomgrande variiĝas la valoro de ties interna rezistanco.	termofaktoro
1223.	**termobruo**	Kreiĝas pro la movo de ŝargoportantoj.	
1224.	**termoĉelo**	El temperatura energio produktas elektran energion. La temperatura impreso okazigas	

		internan energia- diferenciĝon, kreas *termoelektran tension*, kiu tensio instigas kurenton.	
1225.	**termoelektra tensio**	Tensio, kiu kreiĝas inter du diversaj metaloj kunmetitaj unuflanke, kiam oni varmigas tiujn. Tiu tensio estas tre malgranda, sed la kurento, kiun instigas povas atingi intenson eĉ 10A.	
1226.	**termoelektro**	(PIV: Elektro produktata pro varmo aŭ varmodiferenco.)	
1227.	**termogardilo**	Malŝaltilo pro superkurento. Tiu gardilo havas kontaktilon el ĝemelmetalo, kiu kontaktilo kliniĝas pro la varmiĝo okazigata fare de la trafluanta kurento. Ĉi tiun gardilon eblas reŝalti post la forigo de superkurento.	aŭtomata gardilo
1228.	**termokompensado**	La termoaltiĝo de la konsisteroj okazigas modifon en la funkcioparametroj. Kompensi tiun modifon, oni uzas en la cirkvito tian rekuplon, kies intenso dependas de tiu termoaltiĝo.	
1229.	**termorelajso**	Ŝaltilo, kiu eluzante la termoefikon de la kurento funkciigas kontaktilojn. La ankro estas fabrikita el du diversaj metaloj (bimetalo), kiuj havas jam la kontaktopeceton. La formoŝanĝo de kontaktiloj, okazigita fare de la termoefiko, certigas la kontakton.	
1230.	**termoŝrumpanta kablomufo**	Ĝi estas uzata ĉe kablokunligo por izoli. Plastotubo ŝrumpebla kun varmo.	
1231.	**teruma rezistanco**	Rezistanco, tra kiu elfluas la kurento al la tero dum trarompo aŭ kurtcirkvito. Ju pli malgranda tiu rezistanco, des pli estas efika la defendado kontraŭ elektrokutiĝo.	
1232.	**tetrodo**	Kvarelektroda elektronika tubo, en kiu oni uzas ankoraŭ unu gridon inter la rega grido kaj la anodo. Tiu plua grido estas nomata *ombrela grido (*aŭ *helpgrido)*.	
1233.	**tiratrono**	Estas trielektroda gazotrono. Vere funkcias kiel la vakua diodo ĝis kiam la tensio de la kluzelektrodo (reggrido) atingas la tn. *startigan tension* $U_g=U_{st}$ Post la startiga tensio la anodkurento atingas abrupte la grandecon, apartenantan al la malgrand-tensia elektra arko. Dum la gaskondukto la gridotensio jam ne influas la kurenton, trafluantan la tubon.	
1234.	**tiristoro**	Regebla duonkondukta ŝaltilo por *unu-direkta* kurento.	

1235.	**T-konekto, tokonekto**	Speciala trifaza konektosistemo, en kiu du bobenoj de konsumilo (motoro) estas serie konektitaj inter du faztensioj. La tria bobeno estas konektita inter la tria fazo kaj la nulpunkto.	
1236.	**ton-regulilo**	La *ton-regulilo* estas tia filtrilo, kies traigo, kaj malaltfrekvenca (*baso*) kaj altfrekvenca (*soprano*) estas variebla sendepende rilate al alio, koncerne 1kHz-an resonan frekvencon.	
1237.	**toroidtransformatoro**	Speciala transformatoro, havanta ringforman bobeno-strukturon kun akso en la centro, sur kiun estas muntita turnebla glitilo. Ĝia elira tensio estas variebla movante la glitilon.	*toroido*
1238.	**traiga kondensilo**	Tuboforma kondensilo, kies unu elektrodo estas konduktilo trakondukata la tubon. La alia elektrodo estas mem la tubo.	*tubokondensilo*
1239.	**trakcia kurento**	Kurento fluanta en la katenario.	
1240.	**trakcia tensio**	Potencialo de la katenario.	
1241.	**transformatoro**	Speciala induktilo por altigi aŭ malaltigi alternan tension, kiu estas kapabla transformi (alĝustigi) impedancon, fari galvanan disigon (senmetalan kontakton) inter cirkvitaj ŝtupoj.	transformilo
1242.	**transira rezistanco**	Rezistanco inter du kontaktiloj, kiu dependas de la pureco kaj grandeco de la surfaco de kontaktiloj, kaj de la premintenso inter tiuj.	
1243.	**transistoro**	Duonkondukta konsistero, kiu estas kapabla por amplifado.	
1244.	**transmeto**	Traiga proporcio de transformilo, kiu esprimas la rilaton inter la primara kaj la sekundara tensioj.	
1245.	**transpontado**	Tiu momento je baskulado de ŝaltilo, kiam la moviĝanta kontaktilo (tuŝkontaktilo) tuŝas ambaŭ fiksajn (nemovantajn) kontaktilojn. Simile ĉe relajso tiu momento, kiam la tuŝkontaktilo tuŝas samtempe, kaj la ripozan, kaj la ekscitan kontaktilon.	
1246.	**transporta rapideco**	Tempo, dum kiu la enira signalo ekaperas ĉe la eliro.	transiga rapideco
1247.	**transsparka tensio**	Tensiograndeco, je kiu kreiĝas sparkoarko inter du elektrodoj.	
1248.	**trapasa rezisto**	Rezisto inter du kontaktiloj, kiam tiuj tuŝas unu la alian.	

1249.	**trapezsignalo**	Elektra signalo havanta trapezan aspekton. La formo estas aperigebla (vidigebla) per osciloskopo.	
1250.	**trarompa malŝargo**	Senpotencialiĝo pro trarompo.	
1251.	**trarompa tensio**	Propreco de la izoliloj, kiu estas indikata per kV/cm. Estas tiu alta tensio, kontraŭ kio la izolilo jam ne povas reteni la kurentofluon. Post tiu tensio la kurento havas grandan intensiĝon, atinge tion lavange.	
1252.	**trarompo**	Tiu fenomeno, kiam tra izolanta medio kurento fluas pro supertensio.	
1253.	**tredilo**	Helpilo, per kiu oni povas enmeti drato(j)n (kablon) en izoliltubon, kiu estas en muro.	
1254.	**triako**	Regebla duonkondukta ŝaltilo, kiu estas kapabla ŝalti alternan kurenton. Simetria tiristoro.	
1255.	**triangula signalo**	Simila al la segildento, havante tri signifajn punktojn.	
1256.	**trigero (trigersignalo)**	Startiga signalo, kies pozicio determinas periodon por senso, mezuro aŭ funkciado.	pilotsignalo
1257.	**trinitrono**	Multkolora kineskop-tipo, patentita en Japanio.	
1258.	**triodo**	Elektrona lampo (tubo) kun tri elektrodoj. Plej ofte estis uzate por tensioamplifado.	trielektroda valvo
1259.	**truofiltrilo**	Mallarĝ-benda filtrilo, kiu traigas nur tiujn frekvencojn, kiuj estas en la bendo.	brećfiltrilo
1260.	**tubingo**	Konektilo por elektronikaj tuboj.	tubo-soklingo
1261.	**tuborelajso**	En vitrotubo lokita kontaktilparo, el kiuj unu estas farita el magneta materio. Per magneta kampo eblas regi la relajson.	herkon-relajso, reed-relajso, fingreta relajso, langeta relajso
1262.	**tuhelo (tuĥelo)**	Konektilo speciala por fari samtempe plurajn konektojn. Estas paro, ŝtopilo kaj el ŝtopilingo.	
1263.	**tuneldiodo**	Speciala diodo, kies ecaro enhavas negativ-rezistan parton.	
1264.	**tunelefiko**	Ŝargoportantoj trairas la *potencialmuron.*	
1265.	**tuŝprotektado**	Kompleksa scienco praktika pri la manieroj kaj teknikaĵoj defendi la homojn kontraŭ tio, ke ili senvole povu tuŝi tian parton de elektro-reto, aparatoj aŭ instalaĵoj, kie estas alttensio.	
1266.	**TV-agordbildo**	Tiu bildo, kiu havas geometrie regulitajn	

		formojn kaj kolorvicojn por agordi la kineskopon.	
		U	
1267.	**ultrakurtondo**	Radio kaj TV dissenda bendo, havanta frekvencointervalon 30÷300MHz.	**UKO**
1268.	***unudirekta* kurento**	Kurento, kiun fluigas ŝargoportantoj movantaj nur al sama direkto.	*udikurento* Vidu ankaŭ ĉe – kontinua kurento, rektif(it)a kurento!
1269.	**unujunta transistoro**	La unujunta transistoro havas nur unu P/N junton. Laŭ la strukturo tiu tipa transistoro konsistas el N aŭ P tipa duonkonduktanta „bastoneto”, havanta sur ambaŭ finoj oman kontakton B_1 kaj B_2.	**UJT** dubeza diodo
1270.	**unustabila vibratoro**	Cirkvito, kiu havas nur unu stabilan staton, el kiu stato eblas traŝalti tiun provizore.	monostabila multivibratoro
1271.	**unutakta rektifilo**	Per unu diodo konstruita rektifilo, kiu utiligas nur la samtipajn duonperiodojn el la alterna kurento.	
1272.	**U-ŝtopilo**	Konektilo (konektoŝtopilo) havanta du ŝaftojn.	
1273.	**utila produkto**	El la tuta produkto tiu parto, kiu ne perdiĝas, sed ĝi estas eluzita. Tiu, kiun la ŝarĝilo konsumas.	
1274.	**utila signalo**	Senĵama signalo.	
		V	
1275.	**valencio-elektronoj**	Tiuj elektronoj, kiuj situas sur la plej ekstera ŝelo de atomo.	
1276.	**valvo (elektra)**	Elektronika tubo (lampo), kiu funkcias kiel rektifilo, vakua diodo.	vakua tubo, vakua diodo
1277.	**varaktoro**	Duonkonduktila kondensilo, aplikata por frekvenco-duobligo.	
1278.	**variebla kondensilo**	Valormodifebla kondensilo kun relative larĝa intervalo, manipulebla ekstere de aparato per butono.	
1279.	**variebla rezistilo**	Valormodifebla rezistilo, kies valoron oni ĝustigas tiel, ke la alkonektado okazas per movebla zono, kiun oni fiksas per ŝraŭbo.	
1280.	**varikapo**	Valormodifa kondensilo, kies kapacito variiĝas laŭ la alkonektita tensio. Duonkondukta tensiodependa kondensilo. Praktike estas diodo, kies dielektro estas mem la malplenigita tavolo. La larĝeco de tavolo dependas de la alkonektita tensionivelo. La tension oni devas alkonekti laŭ fermodirekta biaso. Variige la tension	

		ankaŭ la larĝeco de la malplenigita tavolo variiĝas, do la larĝeco de la dielektro.	
1281.	**varikondo**	Valormodifa kondensilo, kies kapacito dependas de la alkonektita tensio. La dielektro izola ne estas duonkonduktilo, sed plejofte segnet-keramiko.	
1282.	**varistoro**	Valormodifa rezistilo, kies valoro dependas de la alkonektita tensio.	**V**olt-**D**ependa **Re**zistilo. **VDR**
1283.	**varmokompensado**	Procedo por certigi termostabilecon por tiu cirkvito, kiu enhavas konsistero(j)n termodependanta(j)n.	
1284.	**vathoro**	Mezurunuo de la laborkvanto.	**Wh**
1285.	**vato**	Mezurunuo de la povumo.	**W**
1286.	**vazlavilo (elektra)**	Dommastra maŝino por purigi manĝilojn, manĝujojn kaj kuirvazojn.	kuireja lavmaŝino
1287.	**Wehnelt-ciliondro**	La unua elektrodo en la elektronĵetilo, kiu estas uzata en la elektronfaskaj tuboj. Ĝi havas plej ofte negativan tension rilate al la katodo. Tiu cilindro ĉirkaŭprenas la katodon kaj per tio oni povas regi la intenson de la elektronradio.	venelta cilindro
1288.	**vekto**	Tiu parto de relajso, kiun movas la magneta kampo altirante.	
1289.	**velda transformilo**	Speciala transformilo, kiu transformas el la reta publika tensio etan tension disigitan de la publika reto, certigante kune tre intensan kurenton. La malalta tensio kaj la intensa kurento estas kapabla krei elektran arkon, kies granda temperaturo povas fandi metalon.	
1290.	**ventolilo**	Aerumilo, kiu artefarite kreas venton por freŝigi aeron, aŭ tiel malvarmigi elektrajn konsisterojn ekz., procezilon.	ventumilo
1291.	**vibratoro**	Cirkvito havanta du statojn ĉe la elirejo(j). Oni diferencigas tri tipajn: Astabila (oscila) /multivibratoro/ Monostabila (unustabila) Bistabila (dustabila, dustata)	vibrilo
1292.	**video-**	Bildosurbendiga kaj aperigila tekniko.	
1293.	**vidikono**	Bildoskanilo en la televidila tekniko. Unu el la tipoj de la ikonoskopoj, uzataj en kamerao.	
1294.	**virtuala nulo**	Stelpunkto de trifaza sistemo. (Funkciigi trifazan maŝinon oni ne bezonas konekti la nul-punkton de la tensioreto.)	neŭtra punkto

1295.	**voblilo**	Oscila aparato por krei alternan signalon, kies frekvenco periode ŝanĝiĝas inter du limfrekvencoj kaj dume la amplitudo estas konstanta.	frekvencopasa generatoro
1296.	**vobloskopo**	Kombina mezuraparato enhavanta voblilon kaj osciloskopon.	
1297.	**voltmetro**	Mezurilo por indiki la tensiograndecon.	
1298.	**volto**	Mezurunuo por decidi tension.	V
1299.	**volv(ad)as**	Faras bobenon, draton metante kun volvado sur cilindron.	bobenas
1300.	**volvotensio**	Tensio, kiu apartenas al unu volvo de bobeno.	
1301.	**volvonombro**	La plej multaj induktiloj estas boben-aspektaj, kiujn oni fabrikas tiel, ke draton volvadas. La *volvonombro* determinas la indukton de la bobeno.	
		Z	
1302.	**zenerdiodo**	Speciala diodo, kiu estas uzata por stabiligi tension. Ĝia malfermodirekta ecaro similas al tiu de la ĝenerala diodo, sed la fermodirekta diferencas. Ĉi tie la fermodirekta ecaro havas tian proprecon, ke ĝis decida tensioaltiĝo la kurento nur malgrave ŝanĝas, sed post tiu tensio la kurento lavange (abrupte) intensiĝas. Ĉi tiu tensio estas la *zenertensio*.	*zenero*
1303.	**zenertensio**	Tensio de speciala zenerdiodo, ĉe kiu la fermodirekta kurento komencas lavange intensiĝi.	
1304.	**ZeroVolt-Ŝaltilo**	Speciala ŝaltilo elektronika, kiu tiam konektas/malkonektas cirkviton, kiam la alterna tensio trairas la nul-valoron. En ĉi tiu okazo ne kreiĝas abrupta superŝarĝo, nek mem-indukta tensio superflua.	**ZVŜ**
1305.	**zumilo**	Sonindikilo por aperigi informon, eligi atenton pri funkciigo de elektronika aparato.	
		Y	
1306.	**Yagi-anteno**	Direktebla anteno por la kurtondoj kaj la ultra-kurtondoj, konstruita el dipoloj.	
1307.	**Y-konekto**	Konektotipo de la trifaza sistemo.	
1308.	**Y/Δ ŝaltilo**	Speciala ŝaltilo, per kiu oni povas konekti la elektromotoron trifazan al la nutrolineo, post la startiga konekto „Y”, al la daŭra funkciadkonekto „Δ”.	

Plejofte uzataj signoj:

U	tensio (*unudirekta,* kontinua, rekta)
u	tensio (alterna)
I	kurento (*unudirekta,* kontinua, rekta)
i	kurento (alterna)
R	rezistanco, rezistilo (ĝenerala aŭ en *unudirekt*-kurenta cirkvito)
r	rezistanco (kontraŭ alterna korento)
C	kapacito, kondensilo
L	indukto, induktilo
X_C	kapacitanco
X_L	induktanco
f	frekvenco
Z	impedanco
A	amplifeco (β)
D	diodo
T	transistoro

La plej oftaj indeksoj:

0	baznivela, senŝarĝa
en	enira
el	elira
N	nutrada
P	pozitiva (plus)
N	negativa (minus)
BE	bez-emitera
KE	kolektor-emitera
KB	kolektor-beza
GS	giĉet-sendeja
DS	devor-sendeja
DG	devor-giĉeta
kc	kurtcirkvita